

ESPERANTA BIBLIOTEKO DE ĈEĤAJ AŬTOROJ

Volumo I

J. ARBES

RAKONTOJ

KUN LA PERMESO DE L' AŬTORO TRADUKIS EL ĈEĤA LINGVO

JOS. GRŇA

Eldonis FERD. BOHÁČEK, Jevíčko
Moravio, Aŭstrio

1908

Presejo Družstvo knihtiskárny, Hranice.

Eldonante tiun ĉi unuan libron de esperantaj tradukoj el la ĉeĥa literaturo mi varme deziras, ke la libro disflugu baldaŭ tra la mondo esperantista kaj helpu vastigi inter la samideanoj la konojn pri la ĉeĥa literaturo, ĝis nun ankoraŭ malmulte konata ekster la limoj de mia patrujo.

Al sinjoroj *H. Bouška* en Praha, *Th. Čejka* en Bystřice-Hostýn kaj *Edm. Kolkop* en Jevíčko mi esprimas mian sinceran dankon por la korekto de tiu ĉi libro

La tradukinto.

ENHAVO

[J. Arbes](#)

[El la vivo de Mozart](#)

[La blanka edziniĝa vesto](#)

[La unua nokto ĉe la mortinto](#)

[Moderna Magdaleno](#)

J. ARBES.

Jakub Arbes, unu el la plej gloraj verkistoj ĉeĥaj, naskiĝis en Smíchov¹ (legu: Smiĥov) 12an de Junio 1840. Fininte la studadon en la teknika lernejo de Praha, li fariĝis redaktoro de ĉefaj ĵurnaloj ĉeĥaj (1866 ĝis 1877). De l' jaro 1879 li vivas sole por la literaturo.

De tiu tempo li verkis serion da romanoj, romanadoj, noveloj kaj rakontoj, krom diversaj tradukoj kaj artikoloj por la politikaj ĵurnaloj. Tiujn verkojn nuntempe eldonas la firmo J. Otto en Praha. La nombro da eldonitaj volumoj atingis jam la numeron 25. Suferinte mizeron en sia junaĝo, J. Arbes havis ĉiam la koron malfermitan por la suferoj kaj mizeroj de l' popolo. Pro tio en siaj verkoj li solvas problemojn socialajn kaj batalas kontraŭ la persekutantoj kaj premantoj de l' malriĉuloj, kontraŭ la neniigantoj de l' spirito kaj la korpo.

Arbes skribis ĉiam pri la vivo reala kaj ankaŭ tie, kie la romano aŭ rakonto estas fonditaj sur scenoj ŝajne misteraj kaj fantaziaj, oni povas ĉion nature klarigi per la trankvila prudento. En siaj verkoj Arbes kunigas filozofon kun la filantropo kaj batalanto por la rajtoj de l' homaro.

Sed la ĉefa merito de Arbes restos por ĉiam tiu fakto, ke krom la sociala romano li kreis ankaŭ tute originalan specon de l' bela literaturo — siajn karakterizajn *romanadojn*, kiuj rezervis al li la unuan lokon inter la ĉeĥaj verkistoj. La romanadoj: *Newtonův mozek* (La cerbo de Newton), *Svatý Xaverius* (Sankta Ksaverio), *Zázračná madonna* (Mirakla madono), *První noc u mrtvol* (La unua nokto ĉe la mortinto), *Akrobati* (Akrobatoj), *Sivooký démon* (Grizokula demono), *Poslední dnové lidstva* (La lastaj tagoj de l' homaro), *Vymírající hřbitov* (Elmortanta tombejo), *Kandidáti existence* (Kandidatoj de l' ekzisto) estas verkoj vere klasikaj, vera kaj daŭra monumento por la tuta estonteco.

La ĉeĥa akademio por la arto kaj scienco nomis lin honora membro; sed la plej bona rekompenco de Arbes estas la ĝenerala estimo kaj amo, kiujn li ĝuas ĉe la tuta ĉeĥa publiko ne sole pro siaj meritoj literaturaj, sed ankaŭ pro siaj personaj ecoj, noblaj penso kaj koro, liberpensa freŝa spirito kaj rekta, sincera karaktero.

EL LA VIVO DE MOZART.

I. EN BERTRAMKA.

Silenta somera vespero...

Sufoka, sed bonodora aero penetras tra malfermitaj fenestroj en teretaĝan ĉambron, en kiu apud la fortepiano sidas pli ol tridekjara viro de malgranda, pli multe ŝvelinta, ol korpulenta talio.

Dum du tagoj kaj du noktoj li ne estas elirinta el sia laborĉambro. Laŭ sia kutimo li estas laborinta kun streĉo de ĉiuj siaj fortoj.

Vane klopodis la dommastro ellogi lin sub la liberan ĉielon en la freŝan, sanigan aeron en la ombroplenan ĝardenon, kuŝantan laŭlonge la vinberejo Bertramka antaŭ la fortikaĵpordego de Oujezd en la silenta valetio inter la okcidenta deklivo de l' altaĵo Mrázovka kaj la orienta deklivo de l' monteto super la tombejo de Malá Strana.

Tiam — en la antaŭlasta dekjaro de la dekoka jarcento — tiuj lokoj estis romantike dezertaj. Sur la Mrázovka, nun parte kovrita de l' amfiteatre dismetitaj dometoj de laboristoj, vastiĝis tiam kampoj; sur ĝia norda deklivo estis vinberejo, brikfarejo kaj kelke da barakoj, konataj jam de longe sub la nomo »Poslovina«.

La orienta deklivo kaj la malsupro de l' altaĵo super la tombejo estis tute kovritaj de l' arboj kaj arbetoj, parte fruktaj, parte arbaraj. Ĉi tie estis pli ombre, pli bonodore, pli romantike ol nun; unuvorte la vinberejo Bertramka kaj la ĝardeno, vastiĝanta parte en la valetio sur la malsupro de l' altaĵo, parte sur la altaĵo mem ĝis ĝia supro, estis ĉarma angulo, en kiu flanke de l' ekscitanta bruoj kaj muĝoj grandurbaj oni povis en kvietaj izoleco trankvile vivi, revii kaj post turmentoj kaj laciga laboro ripozi...

Sed la viro, kiun la tiama posedanto de l' Bertramka estis invitinta, por ke li ripozu en la ĉarma angulo, ne konis ripozon.

Lia spirito eĉ tie ĉi, kie ŝajne estis nenia impulso al la spirita laboro, febre laboris; li laboris ja kun streĉado de ĉiuj fortoj ĝis la tuta senfortiĝo.

Li klopodis pri la afero treege grava, pri finiĝo de l' nova opero, kiun li ĵus kun granda entuziasmo komencis komponi. La genia spirito havis komprenon por nenio, sole por melodioj de siaj herooj — ĉio cetera — eĉ la plej kara amuzo, ludo sur bilardo, cedis tute en malproksimon...

Kaj dum du tagoj kaj du noktoj li ne moviĝis el sia laborĉambro.

La dommastro kaj la amikoj de la gasto, kiuj venis viziti la eminentan gaston, trovis la pordon de l' ĉambro fermita kaj ne kuraĝis interrompi la komponiston...

Sed la neatingeblaj geniuloj estas tamen ankaŭ malfortaj homoj. Ilia organismo estas venkata de samaj influoj kiel tiu de l' homoj tute ordinara — ili ankaŭ malsaniĝas kaj

laciĝas, en ilia vivo ankaŭ okazas momentoj de l' tuta laceco, animpremiteco kaj senespero.

Kaj simile ankaŭ Mozart, kiam loĝante vizite ĉe sia amiko en Bertramka, verkis sian genian operon »Don Juan«.

Lia senekzempla, senfortiganta laboreco estis jam multafoje avertita de l' modera laceco en la kreado; sed tio okazis neniam tiel ekstreme kiel tiun ĉi fojon, kiam antaŭe senĉese freŝa, neelĉerpebla fonto de l' fantazio ŝajnis kvazaŭ subite elĉerpita, dezerta, senfrukta...

Mozart estis morte malĝoja. Lia spirito ŝajnis vagi en la nebuloj, la koron plenigis neesprimebla premiteco.

Kiel volonte ankoraŭ nun li laborus plue! Sed ĉio kuniĝadis en ĥaoson. Ĉiuj, iam tiel libere kaj vigle el la animo fluantaj melodioj kuniĝadis en malprecizan, malklaran ĥaoson — en tutan disonancon...

Vane li klopodis aŭdigi el la fortepiano sonojn interligitajn, harmoniajn; liaj fingroj zigzage kuradis sur la klavoj aŭdigante sole izolitajn tonojn — ne interligitajn...

Kaj longe, longe li sidis poste kvazaŭ rigidiĝinta kun mallevita kapo al la brusto.

Subite eksonis de malproksime unuaj akordoj de l' kanto de najtingalo... Nenio plu ol kelke da tonoj — poste denove silento.

Mozart levis la kapon kaj ekrigardis tra la malfermita fenestro en la ombroplenan ĝardenon.

La suno ĵus subiris; sanga, sed jam paliĝanta sunradiaro superverŝadis per magia lumo la arbojn kaj arbetojn, herbejojn kaj vojetojn, kurbiĝantajn supren sur la kruta deklivo...

Ĉirkaŭe regis profunda silento. Mozart, kiu post la unuaj tonoj de l' kanto najtingala momenton aŭskultis, malrapide stariĝis kaj alproksimiĝinte al la malfermita fenestro, rigardis senpense en la ruĝetan malplenen.

Poste li turnis sin malrapide — senpense malfermis la pordon, senpense malsupreniris en la ĝardenon kaj iris malrapide unue sur la vojetoj surŝutitaj de la flava sablo, poste sur la vojetoj ĉiam malpli ireblaj kaj ĉiam pli tordolinie irantaj supren...

Kiu renkontus lin, tiu nepre devus pensi, ke li vidas vivantan kadavron, havanta atenton por nenio ĉirkaŭ si.

Malrapide, ŝanceliĝante, kun la mallevitaj okuloj al la tero, li iris sur la neireblaj vojoj ĉiam pli supren, ĝis li atingis preskaŭ la supron de l' altaĵo, de kiu vidiĝis belega panoramo de unu parto de Praha.

Ĉi tie li haltis, nevole levis la kapon kaj ekrigardis la ĉarman pentraĵon de Praha dronanta en la ruĝeta, sed ĉiam pli paliĝanta lumo.

Dum kelke da momentoj li rigardis senpense la pentraĵon.

Sed subite lian animon trakuris penso malvarma kaj akrega kiel ŝtalo — penso neniiganta...

En tiu animpremiteco kaj laceco li ekpensis, ke »Don Juan«, kiun li ĵus komponis, estas destinita por la prezentado en Praha — en la ĉarmoriĉa, antikva kaj glorplena urbo plena de spertaj muzikaj specialistoj — en la urbo, kiu en la paliĝantaj rebriloj de l' subirinta suno ĵus ensorĉis lin...

Kaj unuafoje en lia vivo trakuris lian animon la penso, ke li kuraĝas ion neatingeblan, volante sian plej novan verkon, dum kies efektivigado ĉiuj liaj spiritaĵoj fortoj preskaŭ tute laciĝis, prezenti por la prijuĝo antaŭ ĉio al Praha. Ŝajnis al li — kaj tio okazas ofte al ĉiu juste kreanta geniulo — ke lia verko estas malforta, nesufiĉe arta fuŝverko — ke ĝia kreinto ne kompreninte la muzikan spiriton de l' ĉeĥa popolo ne povas kaj ne devas prezenti sian verkon al la specialistoj kun tiel perfekta arta gusto, pro kiu la tiamaj Praha'anoj estis tutmonde konataj...

Kaj li sentis sin premita, neeldireble premita kaj malĝoja.

De l' antaŭa spirita penado la malfortigita rigardo vagis sencele de loko al loko, liaj piedoj komencis tremi kaj li devis sidiĝi en la herbon.

Apoginte la kapon per la manplato, li sidis longe en turmenta, dolora enprofundiĝo... En lia kapo kruciĝis miloj da pensaj fulmoj kaj la senespero enigis siajn akrajn ungegojn en lian animon...

Dume jam krepuskiĝis; ĉirkaŭe regis profunda silento.

Subite el malluma densaĵo de l' malsupra parto de l' ĝardeno profunde sub Mozart eksonis kanto de l' najtingalo.

Mozart levinte la kapon aŭskultis.

Sed la sorĉplena kanto de la plej glora plumoportanto dolore kaj turmente influis lian ekscititan animon. Ŝajnis al li, ke ĝi grimacas la malfortajn klopodojn homajn, la kuraĝajn klopodojn de ĉiuj, kiuj kuraĝas deziri pli multe, ol kion sopiras kaj penas la homa mezeco...

Sed, kio ĝi estas?

Krom la kanto de l' najtingalo subite eksonis tra la vespera silento aliaj tonoj... Ili eksonis de l' alia flanko — de la plej alta supro de l' altaĵo post Mozart...

Mozart aŭskultas dum kelke da momentoj. La kanto de l' najtingalo iras de malsupre — la tonoj de l' homa voĉo de supre...

Unue la tonoj de l' ambaŭ kuniĝas — momenton sonas kanto de l' najtingalo, poste nur la puraj, klaraj tonoj homaj — arĝenta, dolĉa voĉo knabina...

Mozart salte leviĝinte rigardas ĉirkaŭ si. Sur la plej alta supro li vidas malklaran silueton de l' knabina staturo kaj laŭ la konturoj li rekonas simplan knabinon vilaĝan, iranta sur la supro kaj — kantanta —...

Li aŭskultas pli atente.

La knabino kantas kortuŝantan, impresplenan kanton popolan... La sonoj de l' arĝenta voĉo ondiĝas tra la silenta aero kiel seriozaj demonetoj disportantaj kortuŝon, doloron kaj malĝojon en la homajn korojn...

La najtingalo malsupre kantas ĉiam pli pasie. Periode superas ĝian kanton la kanto knabina; kelkaj tonoj de ĝia voĉo eksonas ĝojege — sed tiu kanto ne logas plu la atenton de Mozart...

Li vidas sole malklaran, ĉiam pli malproksimiĝantan silueton de l' nekonata knabino. Li aŭdas sole ŝian voĉon, sole la sorĉoplenajn tonojn de simpla sed tamen tiel poezia kanto popola...

Subite ŝanĝiĝis la kortuŝanta, dolĉe elegia tono de l' kanto en tonon petolan kaj la sonoj de l' arĝenta sonoranta voĉo tremetas en silenta aero vespera kiel petolemaj demonetoj disportantaj tra la mondo bravan gajecon en la homajn korojn...

Mozart staras kvazaŭ en songo.

En lia animo komencas tagiĝi — la kanto knabina efikas kvazaŭ sorĉo...

Silueto de l' knabino malproksimiĝas pli kaj pli, ŝia kanto malaperas, ĝis fine mortas...

Mozart staras ankoraŭ sur la sama loko senmove kiel statuo. Sed en lia animo estas lume — la animpremiteco, la senespero estas tute forpelitaj.

Antaŭ lia spirita rigardo vidiĝas klara, ĝojiga perspektivo; ĉar kie simplaj knabinoj kantas tiajn kantojn, kian li ĵus aŭdis, tie oni devas havi komprenon por natura muziko, pri kiu li ĉiam revas — tie estas neeble, ke lia verko —

Li ne finis la penson.

Refreŝigita kiel neniam antaŭe li malsupreniris la altaĵon kaj pasiginte gajan vesperon en la rondo de l' amikoj, la duan tagon matene li denove daŭrigis sian laboron...

La sufoka laceco estis pasinta. Freŝa, kiel en tagoj de la plej flua kaj libera kreado, laboris nun Mozart kun la konfido je siaj fortoj, ĝis li finis »Don Juanon«, la verkon — senmortan...

II. LASTAJ TAGOJ.

Unuaj radioj de l' somera suno disflugis tra dezertaj ankoraŭ stratoj de Wien.

Antaŭ unu malnova domo haltis malrapida, en tiu tempo — oni skribis 1791 — sufiĉe oportuna vojaĝveturilo.

La koĉero ne opiniis dece desalti de sia sidloko: kelkafoje li sole kraketigis la vipon, donante tiamaniere signon al iu en la domo, ke li jam alveturis kaj, atendas.

Post nelonga tempo malfermiĝis la dompordo kaj dika kuiristino komencis elportadi el la domo, ŝarĝadi sur la veturilon kaj post ĝin kaj alligadi ĉion, kio estis necesa por la granda vojaĝo — en Praha'n — nome: kofrojn, valizojn, skatolojn, tukojn kaj entute ĉiujn eblajn rekvizitojn por la vojaĝo, je kiuj ĉiu, kiu antaŭ cent jaroj volis almenaŭ iom oportune vojaĝi, nepre devis esti provizita.

La preparoj daŭris preskaŭ la tutan horon. Kiam ĉio estis finita, eliris el la domo viro ĉirkaŭe tridek kvinjara kondukanta ĉe la brako sinjorinon de la sama aĝo.

La viro estas de korpulenta, pli malgranda ol meza talio, vestita en oportuna vojaĝvesto de malhele cinema koloro, kia en tiu tempo estis en modo.

Iam bela vizaĝo lia estas ekstreme ŝvelinta kaj vidigas lacecon. La haŭtkoloro estas flaveta, la okulo senbrila kiel post forta, longedaŭra spirita penado kaj ekscitado, la lipoj bluetaj — estas videble, ke tiu viro malsanas jam de longa tempo, sed ĝis nun penas rezisti la malsanon kun la streĉo de ĉiuj siaj fortoj.

La sinjorino ĉe lia flanko estas vestita laŭ la malnova modo en la vesto ne tre eleganta. Ŝi havas sur si longan mantelon, sur la kapo pajlan de la frunto kaj de la vizaĝo supreniĝantan ĉapelon kun diverskoloraj rubandoj kaj floroj.

Ŝia vizaĝo posedas ankoraŭ postesignojn de l' freŝa ĉarmo. La vangoj estas brune ruĝaj, la molaj lipoj ridetantaj, la brilaj okuloj bonanimaj kaj petoleme gajaj.

La viro kaj la sinjorino alpaŝis malrapide al la veturilo. La viro per senbrila rigardo trakuris la objektojn sur la veturilo kaj post ĝi, poste singarde kaj kun videbla penado helpata de la sinjorino eniris en la veturilon.

La sinjorino volis sekvi lian ekzemplon; sed apenaŭ ŝi metis unu piedon sur la ŝtupon de la veturilo, ŝi sentis, ke iu ektiris malantaŭe ŝian jupon.

Turninte sin ŝi ekvidis stari post si nekonatan viron de maldika talio en nigra vesto kaj kun senhara, pli malafabla ol simpatia vizaĝo.

"Ĉu vi deziras ion, sinjoro?" demandis ŝi afable, sed tamen iel eldevige, nepovante kaŝi sian ekmiron pro la nekutima kaj samtempe negalanta maniero, per kiu la nekonato turnis al si ŝian atenton.

"Mi petas pardonon, estimata sinjorino," diris la nekonato humile klinante. "La kaŭzo de mia alveno estas la mendita rekviemo..."

La viro en la veturilo aŭdinte la vorton "rekviemo" diritan per konata voĉo elrigardis el la veturilo.

"Mi tre petas, sinjoro Mozart — kio okazos kun la rekviemo?" turnis sin la nigre vestita nekonato al la glora komponisto.

"Ah — pardonu!" respondis Mozart. "Ĝis nun malgraŭ plej bona volo estis al mi tute neeble plenumi la promeson."

"Sed vi forveturas nun en Praha'n," intermetis kun modera riproĉo la nekonato, "kaj neniuj scias, kiam vi revenos. Ĉu estas neeble prokrasti la vojaĝon je tempo pli malfrua, ĝis la rekviemo estos finita?"

"Ne, ne, estas neeble," senkulpigas sin Mozart.. "La glora bohema nobelaro honoris min per la mendo, kiun mi povas nek rifuzi, nek prokrasti. Oni postulis min, ke mi verku por la festo de l' kronado de l' imperiestro Leopoldo seriozan operon »La Clemenza di Tito«. Vi mem devas konfesi, ke la mendon tiel honoran kiel profitan estas neeble rifuzi nek prokrasti. Kaj tial mi petas, diru al via sinjoro nekonata al mi kaj grandanima favoranto de l' arto, ke li senkulpigu min. Kiam mi estos reveninta el Praha, mi senprokraste komencos la verkon, se volas kaj povas via nobla sinjoro tiel longe atendi."

La nekonata sendito de l' nekonata mendinto estis tute kontenta je tiu certigo; li promesis, ke li bone komunikos ĉion kaj aldonis, ke lia sinjoro atendos pacience, ĝis Mozart revenos el Praha kaj povos komenci la promesitan laboron.

Per tio la necesega afero estis por momento finita.

La sendito foriĝis.

La edzino de Mozart eniris en la veturilon kaj sidiĝis kontraŭ sia edzo. Post kelkaj momentoj ekmovis sin la veturilo celante la centron de l' urbo por trapasi la urbon, deflankiĝi en la strato de Leopoldo en la straton de Tábor kaj plue iri al Praha.

Tuj post la unua ekskuo de la veturilo ekparolis la edzino de Mozart, dirante:

"Domaĝe, kara Wolfgang, ke pro amasiĝo de neprokrasteblaj laboroj estis al vi neeble komponi la menditan rekviemon. La honorario estas vere granda kaj la mendinto eble mendus ankoraŭ novan verkon..."

"Nenio okazis, kara Konstancio," intermetas Mozart; "mi penos ja baldaŭ plenumi la promeson kaj ni vidos poste, kio okazos..."

"Sed kredu al mi," daŭrigis la edzino, "ke ĝis hodiaŭ nenio tiel longe okupis mian penson, kiel la mistere mendita rekviemo. Tuj, kiam vi antaŭ nelonge sciigis min, ke per pero de l' nekonata sendito vi ricevis anoniman leteron, ke vi komponu funebran meson por nekonata favoranto de l' arto kaj kiam vi difinis, kiam ĝi estos finita kaj kian honorarion vi deziras por ĝi, mi estis konvinkita, ke la mendinto ne povas esti tute simpla entuziasmulo, sed nobla, potenca persono, kiu interesiĝas pri vi kaj precipe pri via arto kaj estas preta helpi nin en nia malfavora, malĝoja situacio. Kaj tial mi konsilis al vi, ke vi akceptu la proponon kaj kiel eble plej baldaŭ komencu labori..."

"Kaj mi obeis, karulineto, vian konsilon," respondis Mozart. "Mi skribis al la nekonata favoranto, ke mi volonte faros la laboron por tiu kaj tiu honorario, sed ke mi ne povas

precize difini, kiam mi estos fininta ĝin kaj ke tial mi petas, ke li afable komuniku al mi, kien mi sendu la rekviemon, kiam ĝi estos finita. Post nelonge, kiel vi scias, alvenis denove la nekonata sendito, alportis postulitan honorarion kaj samtempe promesis alporti ankoraŭ sufiĉe grandan aldonon, kiam la verko estos finita, ĉar, oni diris, mi estis postulinta honorarion neproporcie malgrandan. Cetere la nekonata mendinto tute lasis al mi, kiam mi volas fini la verkon; li diris, ke mi laboru tute senĝene kaj laŭ mia kutimo, kaj faru al mi nenian perforton, kiel decas al la vera artisto..."

"Kaj tial kredu al mi, kara Wolfgang," interrompis lin la edzino, "mi bedaŭras, ke parte pro la amasiĝo de neprokrasteblaj laboroj, parte pro via malsano estis al vi tute neeble komenci senprokraste la menditan verkon. Mi havas strangan antaŭsenton. Senĉese mi pensas, okazos grava ŝanĝo en nia vivo. Mi timas sole tion, ke vi ne laciĝu en via fervoro al la entreprenota laboro..."

"Ah, pri tio, karulineto, estu tute senzorga! Kun aparta plezuro mi ĉiam studadis pli altan stilon de la religia muziko kaj en la lasta tempo ofte mi eksentis bezonon provi tion ankoraŭ unufoje. Tial estas tute neeble, ke mi laciĝus. Cetere mi pensas sufiĉe ofte pri la mendita verko kaj ke mi ankoraŭ ne komencis ĝin, okazis, kiel vi scias, nur tial, ĉar mi devas ĉiujn miajn pensojn koncentrigi al la komponado de la »Tito« kaj la »Sorĉa fluto« kaj ĉar pro la malsano mi ne laboras de ia tempo laŭ mia kutimo — sufiĉe rapide. Sed tuj, kiam mi revenos el Praha kaj almenaŭ iom resaniĝos, antaŭ ĉio la mendita rekviemo venos sur mian tablon. Cetere — mi esperas, ke dum la vojaĝo kaj en Praha mi povos labori pri la rekviemo kaj eble ĝi estos finita pli frue, ol mi pensas en ĉi tiu momento..."

"Estus dezirinde," respondis la zorgema edzino; "ĉar mi dubas, ke denove prezentos sin tiel profita mendo kiel tiu ĉi. Kaj kredu al mi, la vojaĝo en Praha'n ne estas al mi tre kara..."

"Al mi ĝi venas ĝustatempe," komencis rakonti Mozart. "De la momento, kiam mi ricevis la inviton de l' glora bohema nobelaro, mi ĝojas kiel infano je la vojaĝo en Praha'n. Mi eksopiris ja kvankam ne multajn, sed karajn amikojn en muzikamanta Praha, kie mi laboris, kiel vi scias, ankaŭ pri mia »Don Juan« kaj kie oni juste ŝatas min, kion mi povas diri pri nemultaj lokoj. La centtura Praha estas al mi pli kara ol kiu ajn alia urbo — tie oni scias kompreni kaj ŝati la veran arton... Cetere mi sentas, ke mi nepre bezonas kelktagan ripozon. Mi estas laca; mi bezonos refreŝigon kaj kredu, ke nenie mi resaniĝus tiel rapide kiel en la rondo de miaj amikoj kaj adorantoj de l' arto en Praha..."

Tiamaniere amuzis Mozart kun sia edzino, kiam la balanciĝema vojaĝveturilo bruis sur la stratoj de Wien.

Poste ili interparolis pri alia temo; sed ĉiam denove ili revenadis dum la interparolo al la mistera mendo de l' funebra meso interŝanĝante siajn pensojn pri la mistera mendinto...

Mozart, kiel oni scias, estis unu el plej pasiemaj laborantoj. Miloĵ da pensoj senĉese bolis en lia animo; li mem ne konis la ripozon. Muziko kaj laboro estis al li ĉio; li laboradis dum tagoj kaj noktoj kaj ofte oni perforte devis forkonduki lin de la fortepiano, lia plej kara instrumento.

Nelonge antaŭ la entreprenita vojaĝo en Praha'n li laboris longan tempon kun superhoma penado kaj oni ne miru, ke lia korpa organismo de la senĉesa spirita streĉado estis grave ekskuita.

Mozart atendis, ke la vojaĝo en Praha'n refreŝigos lin; sed al la senĉesa laboro lia kutiminta spirito laboris ankaŭ dum la vojaĝo. La nova opero »La Clemenza di Tito«, kiu ĵus okupis lin, maturiĝis tiel dum tiu tempo, ke post dek ok tagoj ĝi estis finita.

En Praha estis Mozart akceptita de siaj amikoj kaj adorantoj kun granda entuziasmo.

La plimulto de liaj amikoj tuj ekkonis, ke li danĝere malsanas. Lia senbrila rigardo, la laceco, eĉ premiteco vidiĝanta sur lia ŝvelinta vizaĝo, devis frapi eĉ la observanton plej supraĵan. Sed neniuekspensis, ke tio estas komenco de la fino kaj ke la malsano tiel baldaŭ malaperigos la gloran majstron.

Mozart neniam plendis. Li kuniĝadis kiel alifoje kun siaj amikoj vizitante la plej karajn el ili kaj akceptante vizitojn. Li laboris, vizitis koncertojn, estris ekzamenojn, amuzis kaj sole al la plej intimaj amikoj konfesis, ke koncerne sian sanon li devas periode konsiliĝi kun la kuracisto.

Vesperojn pasigis Mozart ordinare en la kafejo, kie li amuzis kun siaj amikoj ludante bilardon, kiun ludon li tre ŝatis.

Sed eĉ dum la ludo lia kreema spirito ne mallaboris; ĝi laboris ja kiel ordinare.

Iam, kiam Mozart estis ŝajne tute enprofundiĝinta en la ludo, aŭdis lin liaj amikoj murmuri ian melodion per »hm, hm, hm«. Tiun murmuron li ripetis kelkfoje kaj kiam ludis lia kontraŭulo, elprenis Mozart el la poŝo pecon da papero, notis ion kaj ludis plue, dume murmurante senĉese sian »hm, hm, hm«.

Al granda miro de siaj amikoj kondukis Mozart tiel dum tri tagoj; poste invitis ilin al si, sidiĝis al la fortepiano kaj ludis la ĉarman kvinludon el la unua akto de l' »Sorĉa fluto«, kiun li komponis ludante bilardon kaj kiu, kiel oni scias, komenciĝas per la nomitaj interjekcioj »hm, hm, hm«, ĉar Papageno havas seruron sur buŝo.

Sed Mozart komponis en Praha ne nur la »Sorĉan fluton«, kiel estis jam dirite, sed ankaŭ la »Titon«. Krom tio ofte li rememorigis sin pri la mendita rekviemo, en unu vorto li laboris febre, kvazaŭ li sentus, ke li devas rapidi, se li volas fini ankoraŭ siajn du ĉefajn verkojn.

Post la kelksemajna loĝado en Praha li adiaŭis siajn amikojn kaj unuafoje en sia vivo ĉe la simila okazo — li ploris. Sed nek li, nek kiu ajn el liaj amikoj ekpensis, ke Mozart lastan fojon adiaŭas la karan Praha'n kaj revenas Wien'on, por ke li vidu ankoraŭ unufoje sian gloron kaj sciiĝinte, ke post la multjara atendado kaj klopodado li ricevis monan rekompenco — li mortu.

Reveninte Wien'on li finis la »Sorĉan fluton«. La uverturo kaj la marŝo de l' pastroj je la komenco de la dua akto estis, se ne komponataj, do almenaŭ skribataj du tagojn antaŭ la prezentado de la opero.

»Tito« estis finita antaŭ la »Sorĉa fluto« kaj prezentata 6an de Septembro; »Sorĉa fluto« estis unuafoje prezentata 30an de Septembro.

De tiu tago havis Mozart neniun pli gravan laboron kaj nun la mendita rekviemo ekskluzive okupis lin.

La laboro tiel interesis lin, kvazaŭ nenio alia ekzistus por li. Laŭ sia kutimo li laboris denove dum tagoj kaj noktoj kun la streĉo de ĉiuj fortoj malgraŭ tio, ke li sentis laciĝi la fortojn. Jam dum la skribado de l' partituro² de l' »Sorĉa fluto« periode lin atakantaj svenoj komencis alvenadi pli ofte; sed Mozart laboris, streĉante ĉiam pli siajn fortojn, sen ripozo, ne obeante konsilojn de l' kuracisto, ke li ripozu kaj formetu la laboron, ĝis li almenaŭ iom resaniĝos.

Mozart videble malfortiĝadis, lia spirito mallumiĝadis. Animpremiteco kaj timemo vidiĝis sur lia malsane flaveta vizaĝo, precipe en la senbrila, periode febre brilanta okulo. Ĝis tiam li mem opiniis, ke la malsano estas pasonta; sed nun, kiam li fariĝis por ĉio, kio antaŭe amuzis lin, apatia kaj indiferenta, nun; kiam la kreemo komencis laciĝi kaj la spirita laboro postulis ĉiam pli grandan streĉadon de l' fortoj, kiuj mankis al li kaj malkreskis ĉiam pli kaj pli, nun li ekamikiĝis kun la penso de l' fina, nedeturnebla morto.

La fidela kaj zorgema edzino vane klopodis dispeli la malĝojajn pensojn; la melankolio kaj animpremiteco de Mozart ne estis simpla simptomo, sed natura sekvo de l' danĝera malsano.

Li pensis plu pri nenio nur pri la morto kaj la rekviemo, kiun li ĉiam komponadis malgraŭ ĉiuj avertoj de l' amikoj kaj la kuracisto.

"Kredu min," li diris en unu bela posttagmezo aŭtuna, kiam li veturis en kaleŝo kun sia edzino Prateron³, "kredu min, kara Konstancio, ke mi verkas la rekviemon por mi."

Ĉe tiuj vortoj larmoj elsaltis el liaj okuloj kaj dolore plorante li aldonis:

"Ne, ne — tio ne povas longe daŭri: oni venenis min!"

Tiuj vortoj kaj precipe la stranga maniero, per kiu ili estis diritaj, tre konsternis la edzinon de Mozart.

Ŝi penis konsoli sian edzon kaj konvinki lin, ke ĉio estas sole la sekvo de l' malsane ekscitita fantazio kaj ke ĉiuj ĉi kaj similaj pensoj denove forlasos lin, kiam li almenaŭ iom resaniĝos; sed Mozart ploris maldolĉe kaj parolis kelke da tute deliraj frazoj, kiuj atentigis lian edzinon pri la minacanta danĝero.

Reveninte kun la edzo hejmen ŝi senprokraste venigis la kuraciston, kiu konstatis simptomojn de l' grava malsano. Tiun ĉi fojon la kuracisto ne nur konsilis, ke Mozart ĉesu por iom da tempo en la spirita laboro, sed li nepre malpermesis al li, ke li okupu sin per kia ajn laboro kaj forlasu la ĉambron.

Mozart obeis.

Li sentis, ke per tiu ofero li ne plibonigos daŭre sian staton, sed la ordono de la kuracisto estis severa kaj ankaŭ motivita, tial oni povis neniel protesti kontraŭ ĝi.

Sed tiamaniere la melankolio kaj la animpremiteco de Mozart ne estis neniigitaj. La deviga restado en la fermita ĉambro sen kia ajn spirita okupo premis Mozart-on ankoraŭ pli multe kaŭzante en lia animo doloran antaŭsenton.

Dume ricevadis Mozart ĝojigajn raportojn pri la brila sukceso, kun kiu estis akceptata ĉiu prezento de la »Sorĉa fluto«.

La opero atingis sukceson neniam aŭdeblan. Ĝi estis prezentata senĉese en la tute disvendita teatro kaj ĉiu pli grava loko estis brue aplaŭdata.

Sed Mozart ne povis persone ĉeesti la festadon de sia plej brila triumfo. Li estis sola en sia laborĉambro, okupante sin sole en la spirito per la pasado de l' prezentado.

Sed kion neni atendis ne esceptante Mozart-on, tio okazis.

La kelktaga deviga ripozo redonis al Mozart almenaŭ iom da fortoj. La 15an de Novembro li sentis sin tiel freŝa, ke li povis denove labori. Li verkis malgrandan kanton: »Laŭdo de l' amikeco« por la loĝio framasona, kies ano li estis kaj la favora akcepto de la verketo tre ĝojis lin.

Nerezisteble li sopiris denove labori.

Li insiste petis sian edzinon, ke ŝi redonu al li la partituron de la formetita rekviemo kaj la edzino opiniante, ke la danĝero pasis, plenumis lian peton. Sed apenaŭ Mozart komencis denove labori, apenaŭ li denove enprofundiĝis en la laboron kaj en la pensojn tiel seriozajn, verajn kaj malĝojajn, kiaj sekvas la komponadon de la rekviemo, atakis lin denove la animaj kaj korpaj doloroj kun duobla forteco.

Tiun ĉi fojon, rakontas la biografiisto de Mozart, kies laboro donis materialon por tiu ĉi skizo, la batalo ne daŭris longe. En kvin tagoj falis Mozart en la liton, ne leviĝis plu de ĝi kaj senĉese estis okupata de la preparoj al sia enterigo.

Dume, kiam Mozart kun ŝvelintaj manoj kaj piedoj, nepovante sin movi, kuŝis en la morta lito, oni raportis al li, ke li estas elektita kapelestro ĉe la katedrala preĝejo de la sankta Stefano en Wien. Tiun oficon, kun kiu jam de longe estis kunigita granda salajro kaj samtempe ankoraŭ tiel grandaj flankaj enspezoj, donis al li la magistrato de Wien.

Baldaŭ direktoroj de l' multaj teatroj, al kiuj la brila akcepto de la »Sorĉa fluto« malfermis la okulojn, komencis aspiri la favoron de la glora komponisto konkurante inter si kaj proponante sumojn, kiujn Mozart mem postulus por siaj laboroj. Samtempe ricevis Mozart el Breslau kaj Amsterdam skribajn proponojn, ke li faru por granda honorario periodajn verkojn de diversaj specoj.

Tiu ĉi neatendita turno al pli bona stato instigis Mozart-on al la memorinda kaj samtempe karakteriza eldiro.

"Ĝus nun," li diris, kiam oni komunikis al li unu el plej ĝojigaj novaĵoj, "Ĝus nun mi devas foriri, kiam mi povus trankvile vivi. Nun mi devas forlasi mian arton, kiam ne estante plu sklavo de la modo kaj kaptaĵo de la spekulaciistoj mi povus labori tute laŭ mia inklino, laŭ la dikto de mia sento, kiam mi povus verki libere kaj sendepende tion, kion inspiras al mi mia koro. Mi devas forlasi la familion kaj miajn bedaŭrindajn

infanojn en la momento, kiam mi povus pli bone zorgi pri ilia farto. Ĉu mi ne antaŭdiris, ke mi verkas la rekviemon por mi?"

La malsano de Mozart malpliboniĝis; la kuracistoj konstatis brulumon de la cerbo.

Mozart suferis grandegajn dolorojn. Malgraŭ tio li toleris ilin pacience; bonkorecon kaj afablecon de sia karaktero li ne malkonfesis eĉ en la momentoj plej doloraj.

Pri la lastaj momentoj de Mozart konserviĝis multekosta dokumento devenanta de la plumo ne tre sperta — de lia bofratino Sofio Haibel, kiu estis kiel juna knabino apud la lito de Mozart, kiam li batalis kun la morto.

Sofio loĝis kun sia patrino en la distrikto Wieden ne malproksime de la domo, kie loĝis Mozart kaj ofte vizitis lin mem aŭ kune kun sia patrino.

En la nomita letero ŝi skribas:

"Kiam Mozart malsaniĝis, ni kudris al li noktan kamizolon, kiun li povis de l' antaŭe preni sur sin, ĉar pro la ŝvelo li ne povis sin turni. Kaj ĉar ni ne sciis, ke li estas danĝere malsana, ni kudris ankaŭ al li longan vatitan hejmsurtuton (ŝtofon kaj ĉion necesan donis al ni lia bona edzino, mia plej kara fratino), por ke li resaniĝinte estu bone provizita.

Ni ofte vizitadis lin kaj li havis grandan ĝojon je la nova surtuto.

Mi vizitadis lin ĉiutage.

Iam mi vizitis lin sabate kaj li diris al mi: »Nu, kara Sofio, diru al via panjo, ke mi fartas hodiaŭ sufiĉe bone kaj ke jam post ok tagoj mi alvenos gratuli ŝin okaze de ŝia nomtago.«

Kiu povus havi pli grandan ĝojon ol mia patrino, kiam mi povis alporti al ŝi tiel ĝojan sciigon; ŝi neniam atendis ion similan. Tial mi rapidis hejmen kaj ankaŭ pro tio, ĉar ŝajnis al mi, ke Mozart estas gaja kaj vidiĝas bone.

La sekvantan tagon estis dimanĉo.

Mi estis juna kaj mi konfesas, ke ankaŭ vanta — kaj mi tre amis ornami min. Sed bele vestita mi ne amis piediri de l' antaŭurbo en la urbon kaj por la veturigado mi ne volis elspezi monon.

Tial mi diris al mi bona patrino:

»Kara panjo! Hodiaŭ mi ne iros al Mozart. Li vidiĝis hieraŭ tre bone, certe hodiaŭ li fartas ankoraŭ pli bone kaj pro tio ne estos malbone, se mi venos unu tagon pli frue aŭ pli malfrue.«

»Se estas tiel,« respondis la patrino, »preparu tason da kafo kaj poste mi diros al vi, kion vi faru.«

La patrino konsentis lasi min hejme; ŝi sciis ja, ke mi devis ĉiam longan tempon pasigi ĉe Mozart.

Mi foriris en la kuirejon. Ĉar estis mallume, mi devis ekbruligi la kandelon kaj ekhejti la fornon.

Sed mi tute ne povis forgesi Mozart-on. La kafo estis preparita kaj la fajro ankoraŭ brulis.

Nun mi nur rimarkis, kiel mi estis malŝparema, ĉar la kandelo brulis ankoraŭ. Mi rigardas fikse ĝian lumon kaj pensas ĉe mi, ke mi ĝoje sciis, kion faras Mozart.

Kaj dum mi pensas kaj rigardas la lumon, la kandelo estingiĝis, kvazaŭ ĝi estus brulinta neniam; sur la longa meĉo restis neniuj fajrero. Kaj tamen la aero ne moviĝis — mi povas ĵuri tion.

Mi ektremis de la teruro, kuris al la patrino kaj rakontis ĉion al ŝi.

»Vestu vin rapide,« diris la patrino, »rapidu al ili kaj tuj revenu kun la raporto, kiel li fartas; sed ne restu tie longe.«

Mi rapidis per ĉiuj fortoj; Dio, kiel mi ektimis, kiam mia fratino duone malespera sed tamen kun tiel trankvila mieno venis al mi renkonte kaj diris:

»Dank' al Dio, kara Sofio, ke vi estas ĉi tie. Hodiaŭ en la nokto li fartis tiel malbone, ke mi pensis, ke li ne ĝisvivos la hodiaŭan tagon. Restu hodiaŭ ĉe ni; ĉar se li denove fartos tiel, li mortos en ĉi tiu nokto. Iru tamen al li, kion li faras«. Mi penis ekregi min kaj iris al lia lito. Ekvidinte min li ekkriis:

»Ah bone, kara Sofio, ke vi estas ĉi tie. Vi devas ĉi tiun nokton pasigi ĉe ni; vi devas vidi min morti.«

Mi penis resti trankvila kaj senkredigi tion al li; sed li respondis je ĉio:

»Mi sentas jam morton sur la lango — kaj kiu helpas poste mian karan Konstancion, se vi ne restos ĉi tie?«

»Sed, kara Mozart,« respondis mi, »mi devas iri ankoraŭ al mia patrino kaj sciigi al ŝi vian deziron, ke mi restu hodiaŭ ĉe vi — ŝi povus ja pensi, ke okazis al mi ia malfeliĉo.«

»Jes, faru tiel,« diris Mozart, »sed revenu baldaŭ!«

Dio, kion mi sentis en tiu momento! La bedaŭrinda fratino eliris kun mi kaj pro Dio petis min, ke mi haltu en la paroĥejo ĉe la sankta Petro kaj petu, ke iu el la pastroj kvazaŭ okaze alvenu al ili.

Mi faris tiel, sed la pastro rifuzis kaj nur post longaj klopodoj mi sukcesis konvinki lin, ke li iru —

Poste mi kuris al la patrino, kiu maltrankvile atendis min.

Estis jam mallume.

Ŝi tre ektimis! Mi diris al ŝi, ke ŝi faros plej bone, se ŝi pasigos la nokton ĉe la plej maljuna filino — kaj ŝi obeis.

Poste denove per ĉiuj fortoj mi rapidis returne al mia bedaŭrinda fratino. Apud la lito de Mozart estis Süßmayer (unu el la lernantoj de Mozart), sur la litotuko kuŝis la konata rekviemo kaj Mozart klarigis al Süßmayer, kiel li deziras havi la rekviemon finita post sia morto. Plie ordonis Mozart al sia edzino, ke ŝi sekretigu lian morton ĝis tiam, kiam ŝi estos sciiginta pri tio Albrechtsberger-on, »ĉar tiu servo al li apartenas antaŭ Dio kaj mondo«.

La kuracisto Glosset estis longe serĉata kaj fine trovita en la teatro. Sed li devis atendi, ĝis la prezentado estos finita; poste li alvenis kaj ordonis, ke oni ĉirkaŭvolvu la febre varman kapon de Mozart per malvarmaj ĉirkaŭvindo, kiuj tiel ekscitis lin, ke li sveninte ne rekonsciiĝis plu, ĝis li mortis.

Lastafoje li volis ankoraŭ imiti per la buŝo la tamburojn en sia rekviemo; mi aŭdas tion ĝis hodiaŭ...

Poste venis Müller el la artista kabineto kaj enpresis en gipson lian palan, malvivan vizaĝon.

Lia fidela edzino treege suferis. Ŝi ĵetis sin sur la genuojn kaj petis ĉiopovan Dion pri la helpo. Kvankam mi insiste petis ŝin, mi ne povis disigi ŝin de li.

Ŝia doloro estis ankoraŭ pli grandigita dum la sekvanta tago, ĉar la homoj amase preterirantaj laŭte ploris kaj kriis pro li.

Dum mia tuta vivo mi ne vidis Mozart-on incitita, des malpli kolera.«"

Ĉi tie finas la simpla, karakteriza letero, kvankam skribita de plumo primitiva kaj enhavanta en la originalo aron da sintaksaj, gramatikaj kaj ortografiaj eraroj, sed tamen pro sia simpleco pli kara, pli elokventa.

Pli kredindaj dokumentoj pri la lastaj momentoj de Mozart ne ekzistas.

LA BLANKA EDZINIĜA VESTO.

Arabesko.

Ankoraŭ unu fojon ŝi ekrigardis atente la grandan starantan spegulon, en kiu de l' kapo ĝis la kalkano rebrilis ŝia gracia talio...

Per la dekstra maneto ŝi ordigis kelke da molaj blondaj bukloj, kiuj perfide eliĝis el sub la mirta florkroneto, per la dekstra mano iom levis la neĝoblankan elegantan veston kun la longa trenajo — kaj poste malrapide sin turnis...

Ŝi rigardis la vizaĝon de l' fidela kunulino, multejara amikino, kiu helpis al ŝi ordigi la tualeton.

La oraj radioj de l' matena suno somera, traigante tra la densaj kurtenoj de l' eleganta buduaro, superverŝas per la delikata lumo la belkreskan talion de l' bluokula blondulino.

La freŝa, ridema vizaĝeto kun la rozkoloraj vangetoj, purpuraj lipetoj, hela, bele elstaranta frunteto, greka nazo kaj ĉaste mallevitaj okuloj kun la longaj okulharoj kaj densaj brovoj en tiu momento vidigas tiun specon de l' neesprimebla feliĉo, kiu tiel volonte ĝojege eksplodis, kaj tamen neniigis timeme, kvazaŭ estus nepardonebla peko voli esti nesupereble feliĉa...

Ami kaj esti amata!

Senti, ke la plej dolĉaj revoj fine efektiviĝas — scii, ke post kelke da momentoj ni estos por ĉiam kunigitaj kun la estaĵo, kiu estis nia idolo!

Kies koro ne estus emociita? Sur kies vizaĝo ne vidiĝus la rebrilo de l' malofta sento de l' nesuperebla feliĉo?...

"Kiel vi estas bela, kara Emilio!" ekkriis la fidele kunulino, rigardante la vizaĝon de l' ĉarma amikino.

"Kaj kiel mi estas feliĉa, Rozalio, mia kara, kara!" diris silente Emilio, kvazaŭ ŝi timus, ke neniu krom la fidele kunulino aŭdu tiujn vortojn.

Kaj ŝia ĉaste mallevita rigardo leviĝis.

La rigardoj de l' ambaŭ sin renkontis... En la klaraj, bluaj okuloj de Emilio ekbrilis du larmoj kaj ruliĝis sur la rozkoloraj vangetoj al la ĉebrusto...

"Kiel mi envias al vi tiujn larmojn!" diris post la momento la amikino.

"Oh, ne, kara Rozalio!" respondis rapide Emilio. "Mi scias, ke vi ne envias min, vi ne povas min envii!"

"Kaj tamen mi envias!..."

"Estas ne eble! Vi estis ja antaŭ du jaroj simile feliĉa kiel mi! Kaj ĉu vi ne estas feliĉa ĝis nun?"

"La feliĉo estas ŝanĝema..."

"Kaj pro tio, ĉar la feliĉo estas ŝanĝema, ĉu vi povas — al iu envii la larmojn de l' ĝojo?"

"Mi ne envias la larmojn de l' ĝojo, sed la larmojn entute. Mi neniam ploris de ĝojo kaj mi timas — se iam la feliĉo deturnos sin de mi, ke mi ne povos plori, ke mi ne trovos konsolon en la larmoj..."

"Ĉu eble turmentas vin ia sensenca antaŭsento?"

"Kontraŭe! Al mi ŝajnas, ke mi eĉ ne povas esti malfeliĉa!... Sed la malfeliĉo ne demandas, ĉu iu volas esti plue feliĉa; ĝi venas multafoje neatendite kaj poste estas necese..."

"Ke la homo ploru, ĉu ne vere?" intermetis Emilio. "Kaj ĉu vi konjektas, ke mi scios poste plori, ke mi malgrandigos per la larmoj mian doloron?..."

"Kiel nun senvole vi ellasis larmojn de l' ĝojo, ĵus tiel siatempe la fluo de larmoj malgrandigos vian doloron, sed mi bedaŭrinda..."

Ŝi ne finis. Ŝia nigra okulo eksterordinare ekbrilis, kvazaŭ kiam la subita doloro konvulsie kunpremas la koron.

"Ah, vi estas ja malsaĝeta, kara Ronjo," diris Emilio post mallonga paŭzo. "Sed diru, kio alkondukas vin al tiuj ĉi pensoj?!"

"Via faldoriĉa, neĝoblanka vesto edziniĝa..."

"Mi ne komprenas!"

"Ankaŭ mi havis similan, ankaŭ mi dum la jaroj ŝparis por ĝi krejceron post krejzero, ankaŭ mi mem ĝin kudris, sed ankaŭ mi ĝin, kiel vi, gutetis per mia sango..."

"Per la sango? Per via sango?" ripetis Emilio surprizite trarigardante sian veston; sed tuj poste ŝi ekkriis rapide kaj ĝoje:

"Ĉu vi eble pensas tiun ĉi malgrandegan makuleton ĉi tie, kiun mi kretis tiel perfekte, ke oni eĉ de proksime ne povas ĝin rimarki?"

Dume ŝi montris per la ruĝeta fingreto la malgrandan, apenaŭ rimarkeblan makuleton sub sia koro.

Rozalio malĝoje jesis per la kapo.

Emilio silentis momenton fikse rigardante la vizaĝon de l' amikino, kiu en tiu momento vidigis videblan seriozecon.

"Sed mi ne konmprenas," ŝi diris poste trankvile kaj serioze, "en kia rilato povas esti simila makuleto kun mia aŭ via estonta feliĉo!"

"Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis, kio atendas fianĉinon, kiu kudrante sian edziniĝan veston, makuletas ĝin per sia sango?" demandis Rozalio en la tono serioze mistera.

"Neniam! Sed mi ja ne makulis ĝin! Mi nur pikis min iom per la kudrilo en la fingron kaj unu sola guto da sango falis sur la veston..."

"Kaj tiu ĉi sola guto estos por vi tiel fatala kiel por mi, kara Emilio," ekparolis Rozalio. "Ankaŭ mi per unu sola guto da mia sango makulis mian edziniĝan veston. Min kaj ankaŭ vin pli aŭ malpli frue atendas malfeliĉo... Sed vi trovos konsolon en larmoj, sed mi bedaŭrinda..."

Denove ŝi ne finis; ŝajnis, kvazaŭ ia turmenta antaŭsento estus interrompinta subite ŝian parolon.

Emilio ne povis rezisti ian ekstran senton de l' maltrankvileco.

"Tio ne povas esti vera, animo kara!" ŝi diris post mallonga pripenso. "Vi estas tamen malsaĝeta, ĉar vi kredas similajn superstiĉojn kaj antaŭjuĝojn..."

Rozalio ne ekskuis iom la kapon kaj levinte la ŝultrojn respondis en la tono tute serioza:

"Strange! Mi scias, ke tio estas simpla superstiĉo kaj tamen mi ne povas liberigi min de l' turmenta antaŭsento. Mi konas tiun ĉi superstiĉon de mia plej frua infaneco, kaj pro tio kudrante mian edziniĝan veston mi kudris ĝin singarde kiel neniam antaŭe... Kaj tamen mi pikis min, kiel vi, kara Emilio, tamen unu guto falis sur la veston... En tiu momento ekregis min timemo senmezura kaj —"

"Sencela!" aldonis Emilio kun la pripenso kaj certeco. "Ĉar ĉio tio povas esti nenio alia ol sekvo de l' ekflamiĝinta fantazio..."

"Tio povas esti," daŭrigis Rozalio; "sed tiu timemo atakas min ĉiam, kiam mi rememorigas min pri tiu fatala malfeliĉo —"

Estas certe, ke ambaŭ amikinoj daŭrigus la naivan, okazan kaj sencelan interparolon — sed iu subite mallaŭte ekfrapis la pordon.

"Li alvenas, li alvenas!" ekĝojegis silente Emilio per la tremanta voĉo.

"Volu eniri!" diris Rozalio.

La pordo malfermiĝis, kaj sur la sojlo aperis juna, ĉarma viro en eleganta bala vesto.

Emilio ĵetis sin en lian ĉirkaŭprenon...

Kio sekvis, estas pli simpla, ol kion ni ĵus rakontis; proksimume post duonhoro genuis Emilio ĉe lia flanko antaŭ la altaro...

Feliĉo!

Stranga, tre stranga vorto! Kion la homoj atendas de ĝi!...

Kaj tamen ĝi esence signifas ne pli ol kontentecon. Ĉio cetera estas sole pasontaĵo...

Emilio estis kontenta — do nesupereble feliĉa.

Ŝi deziris nenion alian, ol ke ĉio restu tia, kia ĝi ĵus estas: simpla, trankvila, agrabla sen animaj uraganoj, sen doloroj kaj turmentoj...

Post la unua jaro la feliĉa edzinjo fariĝis neesprimeble feliĉa patrino.

Kaj denove ŝi deziris nenion plu, ol ke ĉio restu tia, kia ĵus estis...

Sed la feliĉo estas ŝanĝema. Ŝi ne dependas de la homo, nek de lia volo aŭ deziro —

Subite — malfeliĉa okazo renversis ĉion en malon. En la fino de tria jaro la amata, eĉ adorata edzo mortis.

Li pereis kiel miloj da aliaj homoj de l' ofta eĉ plej ofta malfeliĉo.

Revenante hejmen unu fojon posttagmeze el la kontoro, kie li estis tiel diligenta kaj konscienca laboranto, kiel bonega kolego, li deglitis sur la glata pavimo kaj rompis al si la piedon.

Komence la malfeliĉa okazo ŝanĝiĝis poste en malfeliĉon.

Dum kelke da tagoj li malsanetis. Sed subite la malsano ŝanĝiĝis danĝere kaj en tri tagoj finiĝis lia vivo.

La juna vidvino preskaŭ malesperis.

Unuan fojon en sia vivo ŝi ekkonis la veran malĝojon kaj tuj poste la malĝojon de la plej terura, plej malespera speco.

Ŝi ploris, ŝi ploregis — ŝi ŝiris al si la harojn... Sed nenio helpis! La naturo ĉe siaj plej oftaj faroj estas nedepetebla, sensenta...

En la unua tempo ŝajnis al ŝi, ke la senmezura doloro estos netolerebla, ke ŝi estos dispremita de ĝi... Sed la plej kara heredaĵo de la edzo, la dujara blondhara anĝeleto — estis ŝia apogo en la momentoj de plej maldolĉa, plej brula doloro.

Havante pri la grandega malfeliĉo familia eĉ nenian antaŭsenton, la infano restis ne tuŝita de l' terura bato de la sorto. Ĝia ridema vizaĝeto, kiam ĝi ekrigardis la patrinon konvulsie ploregantan, mallumiĝis senvole por momento, sed tuj en la proksima momento ludis jam sur la rozkoloraj lipetoj la neesprimeble dolĉa ekrido de l' senzorgemo kaj en la helaj bluaj okuletoj brilis fajreroj de l' petolemo.

Unue al la patrino estis neeldireble malĝoje kaj dolore. Ne komprenante la aferon plej naturan ŝi rigardis sian sole naskiton kun la mieno de l' maldolĉo. Estis al ŝi, kvazaŭ la propra infano mokus ŝian doloron — kaj ŝia koro konvulsie kunpremiĝis...

Subite la ekkompreno trakuris ŝian animon.

Rapide ŝi alpremis la infanon al sia ondiĝanta brusto kaj pasie kisis ĝin...

Ŝi ekkomprenis, ke ŝi ne devas malesperi — ke ŝi devas vivi por sia infano...

Kaj de tiu ĉi momento estis al ŝi pli libere...

Ŝi vivis — ĝuste ŝi mizervivis, kiel scias mizervivi sole la vidvinoj.

La negranda ŝparaĵo kaj la malgranda heredaĵo de l' gepatroj, kiuj mortis dum ŝia frua infaneco, komence ebligis al ŝi la vivon almenaŭ proporcie elteneblan. Sed la profito de l' manlaboro, per kiu ŝi nutris sin, ne sufiĉis — la ŝparaĵo malgrandiĝis kaj post la paso de du jaroj la mizero ekfrapis la pordon de l' malriĉa loĝejo...

Ĉio tiel simpla — tiel ordinara —

Ankaŭ nun kiel antaŭe ŝi streĉis ĉiujn siajn fortojn; laborante dum tagoj kaj dum noktoj kun la diligenteco nelacigebla, ŝi sukcesis almenaŭ defendi sin kontraŭ la morto de malsato —

Oni ne miru pro tio, ke ŝi iom post iom vendis ĉion, kio restis al ŝi el la tempo de l' feliĉo: jen iun malgrandan juvelon, jen iun pli bonan veston aŭ parton de l' meblaro, ĝis fine preskaŭ ĉio plej bona kaj plej valora estis vendita...

Kaj strange! Emilio malfaris tion, kion eble farus ĉiu alia virino estante en simila situacio. La blanka atlasa edziniĝa vesto, kiun ĉiu alia vidvino unue vendus estante en malfavora situacio, restis bone kaŝita en la kofro.

La bedaŭrindulino ofte rememorigis sin pri ĝi kaj ofte, precipe en la unua tempo de malfacilaĵoj de l' vivo ŝi ekpensis, ke ŝi povus ĝin pli bone vendi ol kiun ajn alian oran aŭ arĝentan bagatelon, sed kiam ajn ŝi malfermis la kofron kaj ekrigardis la zorge falditan veston, estis al ŝi neesprimeble malĝoje kaj dolore.

Ŝajnis al ŝi, ke entute estas neeble disiĝi de tiu ĉi memoraĵo. Ŝi malofte uzis tiun veston eĉ dum la tempo de sia feliĉo; ŝi prenis ĝin sur sin kelkafoje — je la okazo de kelke da maloftaj vizitoj, de kelke da baloj, kiujn ŝi ĉeestis kun sia edzo. De tiu tempo

ĝi kuŝis netuŝite en la kofro — Fine, kiam nenio plu estis vendebla, ankaŭ la vendo de tiu memoraĵo necesiĝis.

Estis belega somera mateno, kiam la bedaŭrinda vidvino ne havante rimedojn por prepari malriĉan tagmanĝon, rememorigis sin pri la lasta memoraĵo de l' antaŭa feliĉo.

Ŝanceliĝe ŝi genuis apud la kofro, malfermis ĝin kaj per la tremanta mano elprenis la veston. Dismetinte ĝin sur la tablo antaŭ si, ŝi ekrigardis enpensite antaŭ sin —

Ŝi estis sola en la malriĉa ĉambreto.

La infano, ŝia karuleto, sidis ekstere en la korteto lante kun la plenmano da sablo kaj kelke da ŝtonetoj.

La patrino povis ĝin vidi tra la fenestro; sed ŝi ne vidis — ŝi rigardis fikse antaŭ sin, enprofundiĝante en rememorojn.

Longe ŝi staris senmove. Ŝian malĝojigitan animon kuradis rememoroj; unue maldolĉaj, doloraj, pli poste ĉiam pli klaraj kaj karaj, ĝis ŝi rememorigis sin pri la momentoj plej feliĉaj...

Kaj ŝajnis al ŝi, ke denove ŝi estas tiel feliĉa kiel tiam, kiam ŝi kudris al si sian edziniĝan veston, ŝajnis al ŝi, ke denove la dolĉa sopiro tremigas ŝian animon kaj neesprimeble feliĉa timemo kunpremas ŝian koron... Senvole ŝi prenis la veston de l' tablo.

Momenton ŝi tenis ĝin en la mano — poste, videble ne sciante kial — komencis vesti sin per ĝi.

Kvankam ŝi kondukis dum tio iom mallerte, sed tamen vestis sin sufiĉe rapide kaj lerte.

Kaj denove ŝi restis nedecidite kaj enprofundiĝinta la pensoj senmove stari, fikse rigardante la senfinan malplenon.

La feliĉaj kaj dolĉaj rememoroj, kiuj antaŭ la momento trakuradis ŝian animon, donis la lokon al la rememoroj pli malĝojaj kaj maldolĉaj, eĉ doloraj. Ŝia pala, zorgoplena, sed ĝis nun ankoraŭ ĉarma vizaĝo vidigis melankolion.

Subite ŝi estis interrompita en la enprofundiĝo.

En la korto eksonis malafabla, malagrabla voĉo de l' antikvaĵisto — kaj tiu sono naskis en la animo de l' bedaŭrinda vidvino la plej maldolĉan resonon.

Rapide ŝi alpaŝis al la fenestro kaj faris signon al la antikvaĵisto. Ŝia rigardo ekflugis ankaŭ al la infano kaj du larmoj ekbrilis en ŝiaj belaj okuloj.

Rapide ŝi deviŝis ilin — la antikvaĵisto ĵus eniris. Kaj denove ĉio tiel simpla, tiel ordinara — Per la tremanta voĉo ŝi proponis al la antikvaĵisto, ke li aĉetu la veston. Li volonte konsentis aĉeti ĝin — trarigardis la veston — ĉirkaŭiris la virinon...

En tiu momento li ekvidis apud la koro malhelan, antaŭe kretitan makulon.

"Aj! Kio estas ĉi tio?" li ekkriis montrante al la koro. "La makulo..."

La juna vidvino ektremis...

Tiu fatala vorto nur nun rememorigis ŝin — post tiom da jaroj — pri la stranga profetaĵo de l' amikino, kiu jam de du jaroj estis mortinta — kaj tiu rememoro havis efikon kvazaŭ senkonsciigan.

Senvole ŝi metis la manon al la koro kaj kun la ekkrio de l' konsterniĝo ekŝanceliĝis.

La antikvaĵisto rapidis helpi ŝin.

"Mi petas, morgaŭ — se estos eble al vi, morgaŭ haltu ĉi tie aŭ hodiaŭ posttagmeze!" ŝi balbutis interrompe, ne sciante, kion fari...

Ŝia vizaĝo brulis, la koro rapide batis, la brusto forte ondiĝis.

La maljuna antikvaĵisto ŝanceliĝis — eĉ pli, li proponas rapidi por helpo — iri por kuracisto, por najbarino.

"Ne, ne — mi dankas!" balbutas interrompe la virino. "Mi petas nur morgaŭ — nenion plu — venu morgaŭ!"

Ŝanceliĝe la antikvaĵisto foriras.

Apenaŭ la antikvaĵisto fermis post si la pordon, falas la bedaŭrinda virino kvazaŭ senkonscie sur la seĝon.

La oraj radioj de l' matena suno per rozkolora lumo superverŝas la gracion talion de l' bluokula blondulino en la neĝoblanka, hazarde iom levita vesto kun la longa trenajo.

Ankoraŭ antaŭ la momento la pala vizaĝo estas ruĝa, la lipoj kvazaŭ brulaj, la okulo — tiu profunda blua okulo radias nepriskribeblan fajron el sub la longaj densaj okulharoj.

En tiu momento ŝi estas tiel ĉarma kaj delogema, kiel tiam, kiam ŝi unuafoje prenis sur sin sian edziniĝan veston — sed ŝia animo estas emociita, la koro kvazaŭ frakasita...

Kaj longe, longe ŝi sidas kvazaŭ senkonscie kun la kapo mallevita al la brusto — sole la brulaj lipoj periode ektremas, kvazaŭ ŝi volus ion diri kaj la vorto mortus al ŝi sur la lipoj...

En tiu momento iu mallaŭte ekfrapis la pordon. Ŝi ne aŭdis — ŝi ne ekparolis.

La frapado estis ripetata — kaj kiam eĉ nun ŝi ne ekparolis, la pordo malrapide malfermiĝis, kaj sur la sojlo aperis ĉirkaŭe tridekjara, elegante vestita viro de agrabla aspekto.

Lia rigardo ekrondis en la malriĉa, mizera ĉambreto kaj fiksis sur la blondulino, sidanta en luksa balvesto meze de plej mizera meblaro plej sorĉe lumigita.

La impresado de tiu hazarda bildo ĉe la juna viro estis tiel forta, ke li senvole cedis... Sed post la momento li faris ankoraŭ unufoje paŝon antaŭen kaj en la humila tono ekdiris ion.

Nur nun la juna vidvino levis la kapon.

La rigardoj de l' ambaŭ sin renkontis.

La vidvino leviĝis kun la streĉo de ĉiuj fortoj. Levinte iom la faldoriĉan veston ŝi volis ekiri al la pordo, sed ekŝanceliĝis kaj ekkaptinte la apogilon de l' seĝo haltis.

La nekonato ripetis sian demandon.

Nur nun ŝi ekkomprenis, ke li demandas, ĉu iu loĝas en la domo...

Ŝi pene respondis: "Ne, ne — li ne loĝas ĉi tie," kaj ŝia voĉo tremis de neesprimebla sorĉo.

La nekonato foriris.

La bedaŭrinda vidvino falis denove sur la seĝon — kaj longe, longe ŝi restis en plej turmenta, plej dolora enpeniĝo...

Nur kiam ŝia infano, ŝia karuleto revenis — denove heliĝis ŝia vizaĝo...

Ŝi deprenis sian edziniĝan veston, metis ĝin denove en la kofron — kaj estis denove bedaŭrinda, malriĉa vidvino...

Ankoraŭ tiun saman posttagmezon ŝi ricevis leteron kun la plej ordinara enhavo.

Ĝi estis jena:

"Estimata sinjorino!

Pardonu, mi petas, ke mi kuraĝas fari la skriban klarigon.

Serĉante hodiaŭ en la domo, en kiu vi loĝas, mian iaman amikon, okaze mi renkontis vin kaj — mi konfesas sincere al vi, ke la impresoj de tiu renkonto estas neniigebla.

Sed pardonu ankaŭ mian sincerecon, se mi aldonos, ke demandinte tuj pri via situacio kaj sciiginte almenaŭ tion plej gravan, mi kuraĝas peti vin pri la afabla respondo — ĉu estus ebla ia proksimiĝo inter ni..."

Kun la plej granda ekmiro ŝi tralegis la leteron. Unue ŝajnis al ŝi, ke iu ŝercas kun ŝi — sed pli poste —

Ŝi prokrastis la respondon.

Kiam en la sekvanta tago alvenis la antikvaĵisto — ŝi ĝentile rifuzis lian proponon kaj fine — post kelke da tagoj ŝi skribis je la letero respondon — ne rifuzantan...

Kaj post kelke da semajnoj ŝi genuis en tiu sama neĝoblanka vesto antaŭ la altaro ĉe la flanko de l' viro, kiu fariĝis ŝia amata edzo kaj ekzempla patro de ŝia infano...

LA UNUA NOKTO ĈE LA MORTINTO.

Nokturno.

La aŭgusta suno ĵus subiris...

La ĉielo super Petřín kaj Hradčany⁴ ekbrulis je plej varmaj sangaj rozoj, kiam — ŝtelirante, kun la manoj krucitaj sur la brusto kaj kun la okuloj ĉaste mallevitaj al la tero ŝi forlasis la pordon de l' monaĥejo.

Monaĥina robo de »kompatemaj fratinoj« kovras la korpon, densa vualo ĉirkaŭvolvas la vizaĝon. Sed la ŝtelirantaj paŝoj tamen vidigas elastecon; kvankam la kapo estas mallevita al la brusto, tamen la rekta teniĝo de l' gracia talio kaj periode iu pli elasta ekmovo atestas, ke la monaĥino estas juna.

Kun modera rapideco ŝi trairis dezertan straton en la senpera proksimo de la monaĥejo kaj trairinte poste kelke da mallarĝaj, tordoliniaj, sed dum la vespero vivoplenaj stratetoj, ŝi deflankis en la ĉefan straton.

El la personoj, kiuj renkontas ŝin, unuj sin turnas post ŝi, aliaj eĉ haltas; sed la monaĥino atentante neniun kaj nenion rapidas pluen — kaj pensas sole pri la celo de sia voĵiro.

Antaŭ kvarono da horo la abatino simple kaj seke komunikis al ŝi, ke en tiu kaj tiu domo, en la unua etaĝo, unua pordo — iu mortis, kaj ke la parencoj deziras, ke iu el la monaĥinoj pasigu preĝante la nokton ĉe la mortinto.

Humile ekmovis la monaĥino jese la kapon, vestis sin, kovris la vizaĝon per la vualo kaj konante la straton kaj la domon ŝi ekiris.

Post dudek minutoj ŝi estis antaŭ la celo — en dezerta flanka strato antaŭ ekstremaĵa, malluma domo kun alta, kurbiĝanta tegmento. Per la fero surforĝita pordego kun antikva fera martelo estas tute malfermita; sed la malgranda, mallarĝa korto ĉirkaŭata de la altaj apudaj konstruaĵoj estas dezerta, malafabla kaj en la ruĝeta vespera duonlumo preskaŭ fantoma.

Malrapide ŝi trairis la pordon.

En la korto ŝi ekrigardis ĉirkaŭ si kaj ekvidinte dekstre lignan, kadukan ŝtuparon ŝi komencis malrapide supreniri ĝin. Post kelke da sekundoj ŝi aperis sur malnova ligna balkono antaŭ la unua pordo.

Momenton ŝi haltis, kvazaŭ ŝi volus ekspiri. Sed tuj poste ŝi ekprenis la anson — la pordo estis ŝlosita... Ŝi do ekfrapis — mallaŭte kaj singarde, kvazaŭ ŝi timus interrompi iun.

Post la momento ekbruetis interne la riglilo, la pordo malfermiĝis kaj post ĝi aperis dekdujara blondhara knabino. Ekvidinte la monaĥinon ŝi ekmurmuris ion kvazaŭ saluton kaj cedis; la monaĥino eniris poste malkuraĝe kaj senbrue kiel timema ombro...

Ŝi estis en malplena vestiblo kaj trapasinte ĝin ŝi eniris post la knabino en antaŭĉambron, kiu estis preskaŭ senmebla.

Proksime de la fenestro rigardanta la korton staras ronda nekovrita tablo; sur ĝi brulas simpla petrola lampo. Apud la tablo sidas tri virinoj.

Unu, sinjorino ĉirkaŭe kvindekjara kun akraj, sed tamen ne malagrablaj vizaĝtraĵoj, havas okulojn sange ruĝajn de la plorado; ŝia vizaĝo vidigas malĝojon. Sur la vizaĝoj de du aliaj vidiĝas tiu speco de l' kompato kaj malĝojo, kiu ĉiumomente povas cedi al la indiferenteco.

Kiam eniris la monaĥino, ĉiuj tri kvazaŭ post la komando leviĝis. La sinjorino kun la ruĝaj okuloj iris senparole kelke da paŝoj renkonte al la monaĥino, kiu haltis apud la pordo.

Preskaŭ neaŭdeble defluis de la lipoj de l' monaĥino la kutima saluto: "Estu laŭdata Jesuo Kristo!" La virinoj resalutis. Tiuj du diris la saluton kun akcento akra, la sinjorino kun la ruĝaj okuloj resalutis interrompe kaj poste komencis singulte plori.

La monaĥino staras sendecide apud la pordo kun la okuloj mallevitaj al la tero kaj kun la manoj krucitaj sur la brusto.

Post mallonga momento la ĝemanta sinjorino sin turnis, aliris al la kontraŭa pordo kondukanta al la apuda ĉambro kaj malferminte ĝin cedis iom flanken, por ke la monaĥino povu oportune eniri.

Senparole la monaĥino antaŭeniris kaj transpaŝinte la sojlon ŝi eniris.

La pordo senbrue fermiĝis post ŝi.

Senvole ŝi restis stari apud la pordo kun la mallevitaj okuloj. Ekventumis ŝin la tute nepriskribeblaodoro de brulanta vakso, rezina ligno, freŝa rosmareno kaj diversaj aliaj floroj, kiu preskaŭ narkotizas...

Ŝi estis en vasta, funebre ornamita salono kun tri fenestroj, tra kiuj oni povas vidi trans la straton kaj la nealtan muron en la najbaran ĝardenon, kie ĵus oni vidas sole mallumajn konturojn de larĝbranĉaj arboj.

Meze de la salono estas katafalko, sur ĝi malfermita ĉerko kaj en ĝi la kadavro en blanka virina vesto.

Ambaŭflanke de la ĉerko antaŭe malsupren pendinta neĝoblanka longa gazo estas metita sur la kadavro; tial de malproksime ŝajnas, kvazaŭ ĝi estus kovrita per maldika tavolo de ĵus falinta neĝo.

Antaŭ la ĉerko estas grupo da ekzotikaj floroj kun granda krucifikso en la mezo; sur ambaŭ flankoj brulas po ses grandaj vakskandeloj kun blankaj rubandoj, starantaj sur altaj bronzaĵkandelingoj kun piramidformaj piedestaloj; sub la kandelingoj kuŝas

dismetite multe da pli kaj malpli grandaj florkronoj kun blankaj rubandoj, antaŭe staras nigre tegita preĝbenketo kun la apogpupitro — ĉio estas tiel simpla, eĉ ordinara, kiel ĉiam en la funebraj salonoj de pli riĉaj familioj.

Sed al ĉio ĉi la monaĥino dediĉis preskaŭ nenian atenton.

Ŝia rigardo el sub la densa vualo rondiris momenton timeme en la salono, poste haltis fikse sur unu hazarda punkto de la pargeta planko.

En la ĵus reganta flaveta duonlumo, kiam la krepusko estas venkata de modere flagranta lumo de l' vaksandeloj, ĉio en la salono posedas ian monaĥeje poezian aspekton — funebre malĝojan, malafablan, preskaŭ frostosentigan.

Post momento la monaĥino levis la kapon, kvazaŭ ia neatendita penso estus trakurinta ŝian animon kaj per unu ekmovo de la dekstra mano levis la densan vualon de la vizaĝo.

Ŝi estas knabino ĉirkaŭe dudek kvinjara kun neesprimebla mieno de silenta rezignacio en la paleta, regule bela, preskaŭ infane agrabla kaj simpatia vizaĝo.

La densa nigra hararo estas glate kombita malantaŭen, pro tio la bele eliĝanta alabastra frunteto iel pli energie elstaras; la glataj vangoj apenaŭ tuŝitaj de facila nuanco de l' ruĝo; la mallarĝaj pli maldolĉe kaj dolore ol severe kunpremitaj, sed ĝis nun freŝaj lipoj, la greka nazo, la ronda, sed tamen iel rezistema mentono kaj antaŭ ĉio la ekstreme densaj kaj longaj okulharoj, sub kiuj kvazaŭ tra la densa vualo lumas brilantaj pupiloj de nigraj, profundaj okuloj — ĉio havas ĵus aspekton de rigideco.

En tiu ĉarma kaj simpatia vizaĝo ne moviĝis eĉ unu muskolo dum kelke da sekundoj; ŝajnis, kvazaŭ estus staranta ĉi tie statuo el karara marmoro.

Sed post momento ŝi denove eksvingis la dekstran manon kaj denove mallevinte la vualon ŝi faris kelke da paŝoj antaŭen ĝis la preĝbenketo antaŭ la katafalko, kie ŝi haltis.

Momenton ŝi staris senmove, kvazaŭ en embarasoj, kion fari.

Ŝia rigardo kelkafoje leviĝis kaj transflugis timeme la malfermitan ĉerkon; sed povante rekonii nenion krom simplaj konturoj de la kadavro, ĝi ĉiam haltis fikse sur unu hazarda punkto de la pupitro.

Post kelke da minutoj la monaĥino fine moviĝis. Apoginte la dekstran manon sur la pupitro, ŝi levis per la maldekstra mano la jupon kaj genuis en la preĝbenketo, poste ŝi

faris la signon de l' kruco, kunmetis la manojn sur la pupitro kaj denove restis sen movo kiel statuo...

En la salono regas profunda, preskaŭ sankta silento. Sole periode ekkraketas iu vakskandelo, sed tiel senbrue, kvazaŭ estus diskrevinta aerbulo.

La monaĥino estas enprofundiĝinta en la preĝo.

Unue ŝi preĝis mallaŭte, ŝiaj lipoj movadis sin apenaŭ rimarkeble; sed poste la lipoj restis sen movo ŝi preĝas en la animo...

Dume ekstere preskaŭ tute noktiĝis; la funebra salono en la flaveta lumo de l' vakskandeloj havas aspekton malpli frostigan, sed tiom pli malĝojan. Sed la monaĥino ne rimarkis tiun ŝanĝon, Kun la rigardo fiksita sur unu punkto de l' pupitro ŝi daŭrigas la preĝojn kun la tuta ardo de l' kredanta animo, rifuĝanta en la pensoj ĉe la nekonata nesuperebla estaĵo kun la sincera kaj humila peto pri la paco kaj la savo de l' animo, kiu ĵus estas forlasinta ĉi tiun mondon.

Ŝi preĝas la preĝon por la mortintoj. Ŝi preĝas ĝin unuafoje, duafoje, triafoje — ŝi preĝas en la tomba silento kvaronon da horo — duonon da horo — tri kvaronojn da horo — Subite ŝi estas interrompita.

La tomba silento estas ĉesigita de modera ekbruo en la antaŭĉambro, tra kiu ŝi estis enirinta ĉi tien, kvazaŭ iu estus malferminta la pordon de la vestiblo kaj kvazaŭ la personoj en la antaŭĉambro estus bonvenintaj iun. Tuj poste eksonis el la antaŭĉambro mallaŭtigata, singulta plorado, interrompata sole de izolitaj pli laŭte parolataj vortoj.

La monaĥino estis interrompita en la preĝado sole dum kelke da sekundoj. Mallevinte la kapon pli malsupren al la brusto ŝi daŭrigis duonlaŭte la preĝadon; sed malgraŭ tio ŝi ekaŭdis ne sole izolitajn, pli laŭte parolatajn vortojn, sed ankaŭ tutajn, kompreneble sole fragmentajn frazojn.

"— Ah, bedaŭrinda infano!" estis aŭdata klara, sed iel pene mallaŭtigata soprano. "Kiu ekpensus tion?; Ankoraŭ hieraŭ matene mi — oh, tio estas terura, terura —"

"— Nu, mi antaŭvidis tion" — intermetis post la momento alia voĉo, ankaŭ klara, sed iom pli malalta. "Mi diris ja, ke —"

Paŭzo — plorado kaj ĝemado iom pli mallaŭta; sed la interparolo estas ankoraŭ pli mallaŭtigata, oni aŭdas sole izolitajn vortojn:

"Ah, tial, tial — malfeliĉo — kiu povas antaŭvidi tion — kaj tiel neatendite —"

Kaj denove pli longa paŭzo — la plorado ŝanĝiĝas en plendan, ŝiratan ĝemadon.

Estas nenia dubo, ke la interparolo rilatas la mortinton, antaŭ kiu ĵus preĝas la genuanta monaĥino. La monaĥino komprenas tion kaj senvole, eĉ kontraŭ ŝia volo altrudas al ŝi la demandoj: "Kiu mortis? Kiamaniere? Ĉu li estis juna, maljuna, malfeliĉa?"...

Sed ŝi mem ne respondas tiujn demandojn, ŝia animo estante de neniuj vortoj interrompata dum kelke da minutoj denove enprofundiĝas ankoraŭ pli en la preĝon.

Subite estis aŭdataj el la apuda salono denove vortoj kaj tutaj frazoj: tiun ĉi fojon parolas la ĝema voĉo, kredeble tiu, kiu antaŭ la momento ĝeme ploris...

"— Ah, mi restos ĉiam — sinjorino — danku al vi... Mi ne povas, mi ne devas ĉi tie — Kien mi rifuĝus? — Ĉi tie mia koro — pro la doloro — Ne, ne — mil dankojn — ke mi povos ĉe vi la nokton — Oh, mia koro — kvazaŭ la ponardo ĝin —"

Kaj la voĉo enhavas tiom da impresplena kortuŝo, ke ankaŭ la monaĥino, ĝis nun pli malvarma ol ekscitita, eksentas en la animo ian simpatian al la homoj tute nekonataj al ŝi, kiuj estas trafataj de la malfeliĉo.

Senvole en ŝia animo aperas pensoj, kiuj estas en nenia rilato kun la preĝo kaj transiĝas al la objekto, por kiu ŝi preĝas. Estas al ŝi mole, preskaŭ elegie.

Ŝajnas al ŝi, kvazaŭ ŝia koro komencus degeli — kaj kontraŭ ŝia volo altrudas sin al ŝi la pensoj tute mondaj...

Ŝi preĝas ankoraŭ; ŝiaj lipoj sin movas kaj mallaŭte parolataj vortoj estas vortoj de la preĝo; sed ŝia spirito rondas jam, kompreneble ankoraŭ malproksime kaj alte, super la objekto de la preĝo.

Jen ŝi ekpensas, ke ŝi genuas antaŭ la kadavro de juna knabino, jen denove, ke antaŭ la kadavro de maljuna sinjorino, kiu mortis de la marasmo; sed tuj denove laŭ la aŭditaj fragmentoj ŝi opinias, ke ĝi estas virino en la plena, viva forto, kiun trafis ia granda malfeliĉo...

Foje ŝi eĉ levis la rigardon kvazaŭ alforĝitan al unu punkto de la pupitro por rigardi en la ĉerkon; sed la ĉerko estis tro alte sur la katafalko — ŝi vidas nenion krom la antaŭo de la ĉerko: oritajn lignajn »ungegojn« kaj sur ambaŭ flankoj arĝentajn rondojn — kaj ŝia rigardo fiksas denove sur la sama punkto, sur kiu ĝi estis antaŭe fiksita...

Dum kelke da minutoj alvenas al la oreloj de l' monaĥino sole zumanta muĝo, el kiu sole periode pli laŭte eksonas iu pli akre akcentigita silabo; precipe la interjekcioj »ah«, »oh«... En la antaŭĉambro oni interparolas pli seninterrompe ol antaŭe kaj ankaŭ kun la doloro almenaŭ proporcie moderigita.

Sed ĵus tiu ĉi muĝanta, mallaŭtigata interparolo per siaj akcentigitaj silaboj logas ankoraŭ pli la atenton de l' monaĥino.

Senvole ŝi aŭskultas pli atente, ni dirus pli scivole, se tiu nomo ĝuste esprimus ŝian spirititan staton...

Ŝi preĝas ankoraŭ; ŝiaj lipoj sin movas kaj la mallaŭte parolataj vortoj de la preĝo estas aŭdeblaj: tamen ŝia orelo estas streĉita. Nun ĉiu klara frazo, eble ankaŭ ĉiu vorto naskus en ŝia animo resonon kaj eble ankaŭ imagon havanta nenion komunan kun la preĝo, kiun ŝi ĵus diras.

Tamen en la antaŭĉambro oni faras kaj parolas nenion rimarkindan; la unutona muĝo fine lacigas kaj la monaĥino denove enprofundiĝas kun la tuta pieco en sian preĝon.

Subite eksonis el la antaŭĉambro tiu ekstra, konata ekbruo, kiam kelke da personoj stariĝas de la tablo kaj pretiĝas por foriri.

Izolitaj frazoj estas parolataj pli laŭte; oni aŭdas la vortojn: "Estas nenia helpo, ni devas... La nokto proksimiĝas —"

Iu prenis jam la anson de la pordo kondukanta al la salono kaj premis ĝin; sed la anso sole ekbruetis kaj la pordo iom malfermiĝis.

La monaĥino aŭdis nun la parolon tute klare.

"Mi devas, mi devas ankoraŭ unufoje vidi ŝin," parolis la klara soprano. "Mi tiel amis ŝin kaj ŝi — ah, ŝi estis eksterordinara estaĵo... Ŝi sole ridis! Ankaŭ ŝia frunto kaj la mentoneto ridadis, kiam eksonis ŝia sonoranta voĉo... Ŝi estis vera koboldo —"

"Sed tamen ŝi estis periode tiel malĝoja, tiel melankolia!" intermetis la pli malmola voĉo iel admone. "Ŝia konduto ŝajnis al mi ĉiam stranga. Tiuj subitaj ŝanĝoj de l' gajeco en la melankolion aŭ de l' silentemo en la ĝojantan petolemon antaŭdiradis nenion bonan. Mi estis preskaŭ konvinkita, ke tiun bonan animon turmentas io, kion ŝi kaŝas antaŭ la tuta mondo... Ĝis fine —"

"Oh, tiu bona, dolĉa animo!" ekĝemis la plenda voĉo neniiganta eksplodon de la ploro.

"Kaj hieraŭ, kiam ŝi alveturis kaj ĵetinte sin al mia kolo kisadis min kun la dolora ploro, tiam kunpremiĝis mia koro de nekomprenebla kompato... „Ah, kara, karega onklinjo!" ŝi ĝemis karesante miajn vangojn. "Ne koleru pro tio, ke mi alveturas — mi alveturas lastafoje! Mi plu ne tedos vin — neniam! — Ĉu vi komprenas?... Postmorgaŭ matene alveturos la patro kaj la patrino kaj posttagmeze ĉio laŭ la deziro de l' gepatroj estos finita —"

La monaĥino aŭskultis ĉiam pli atente. De tiuj kuneligitaj kaj klare parolataj vortoj ŝi estis tute interrompita en la preĝado. Senvole ŝi turnis iom la kapon al la pordo; sed vidante tie neniun ŝi denove fiksas la rigardon sur la pupitron.

Dume la plenda voĉo en la antaŭĉambro daŭrigis: "Kompreneble mi konjektis, ke ŝi parolas pri sia edziniĝo kaj pro tio mi ridis. Mi eĉ ne songis pri tio, ke ŝi okupas sin pri tiel terura penso — kaj dume — Oh! Tio estis terura momento, kiam mi eniris hodiaŭ matene en la salonon... Ŝi sidis sur la kanapo vestita en sia blanka edziniĝa vesto, kiun ŝi estis alportinta... Ŝi sidis apogante la kapon per unu mano, la dua estis premita al la koro. Ŝajnis al mi, ke ŝi rigardas min — iel fikse, per kvazaŭ eligitaj okuloj... »Pro Dio, vi estas jam vestita!« mi ekkriis de la pordo. Ŝi ne respondis. Mi aliris rapide kelke da paŝoj pli proksimen kaj restis rigida. La eligitaj okuloj estis kvazaŭ vitraj — la vesto sangmakulita sur unu flanko... Mi ekkriis kaj alsaltinte al ŝi mi metis la manon sur ŝian frunton... Ĝi estis jam malvarma kiel la glacio..."

Kaj denove eksonis el la antaŭĉambro la ĝema, poste daŭra ploro...

Dum kelke da minutoj la monaĥino aŭdis nenion krom tiu ĉi stranga, perforte mallaŭtigata ploro... Antaŭ ŝia spirita rigardo iom post iom elsaltis, dank' al la vortoj, kiujn ŝi ĵus aŭdis, bildo ĉiam pli klara, kvazaŭ elstaranta el la nebulo.

Nur nun ŝi komprenis, por kiu ŝi venis preĝi: por bedaŭrinda, treege bedaŭrinda estaĵo, kiu memmortigis sin — por la junulino, ĝuste por la fianĉino, kiu el la nekonataj kaŭzoj sole kelke da horoj antaŭ sia edziniĝo perforte finis sian vivon...

Kaj ŝi vidis en la spirito gracian kaj majestatan talion kun la mieno de neesprimebla maldolĉo en la pala, bela vizaĝo. Ŝi vidis la nigrokulan, nigraharan fianĉinon kun nigraj okulharoj kaj glataj vangoj, alabastra frunto, greka nazo kaj molaj ĉerizaj lipoj... Ŝi vidis staturon kaj vizaĝon tute nekonatajn — bildon tute hazardan...

Ŝi ektremis, profunde en sia animo.

La frosto trakuris ŝiajn membrojn; sed tuj poste ŝi sentis, ke la sango ruĝigas ŝiajn vangojn...

Ŝi sentis sin premita kaj malĝoja — kaj eble ankaŭ la larmo enŝteliĝis en ŝian okulon, se ŝi povus daŭrigi sian meditadon.

Sed tio ne okazis; post la momento eksonis el la antaŭĉambro la sama perforte mallaŭtigata, ĝema voĉo, kiu rakontis antaŭe tiel simple kaj tamen tiel kortuŝe.

"Kaj morgaŭ matene alveturos la patro kaj la patrino! Oh — kiamaniere mi komunikos tion al ili! La patro havas malmolan koron, la patro restos malvarma... Sed la patrino ŝiros siajn harojn, la patrino amis ja ŝin kiel pupilon de sia okulo; la patrino malesperos..."

"Sed kiu estas kulpa je ĉio ĉi?" intermetis poste tiu klara soprano, kiun la monaĥino estis unue aŭdinta el la antaŭĉambro.

"La fianĉo devenas ja de riĉa kaj ordema familio kaj entute estas ĉarma kaj brava junulo..."

"Vere, vere," ekĝemis respondante la plenda voĉo kaj mallaŭte aldonis ion, kion la monaĥino ne aŭdis.

Poste la personoj en la antaŭĉambro restis silente dum kelke da minutoj kvazaŭ en embarasoj, kion fari. Subite eksonis mallaŭta muĝo kaj tuj poste estis aŭdata mallaŭtigata voĉo, kiu ĝis nun ankoraŭ ne parolis:

"Ah — ni ne interrompos la estimindan fratinon!⁵ Volu do eniri!"

Kaj la mano, kiu videble jam kelkan tempon estis metita sur la anso, malfermis tute la pordon. Kaj malrapide, ŝtelirante, kvazaŭ timante malpacigi per la plej malgranda ekbruo, eniris la virinoj kaj la knabino, kiun la monaĥino estis jam vidinta, akompanataj de la sinjorino en plej bona aĝo.

La monaĥino, kiu aŭskultis atente kaj kun levita kapo antaŭ la malfermo de la pordo, aŭdinte la ekknaron la pordo rapide mallevis la kapon kaj volis denove preĝi.

Sed estis neeble preĝi. Mallaŭte la vortoj fluadis de ŝiaj lipoj, sed la animo estis ekscitita...

Tra la kapo kuras strangaj imagoj kaj de l' stranga maltrankvilo la koro kunpremiĝas kaj denove larĝiĝas...

Malrapide, silente, sur la pintoj alproksimiĝis la irintaj virinoj al la ĉerko kaj unu el ili duone demetis blankan gazon, per kiu la vizaĝo de la kadavro estis kovrita.

La monaĥino tamen ne levis siajn okulojn; sed ŝi sentis, kio ĵus okazas...

Kaj tiu sama vizaĝo, kiun ŝi havis antaŭ la momento en sia penso, elsaltis nun tiel klare kaj plastike antaŭ ŝia spirita rigardo, kvazaŭ ŝi efektive rigardus en la ĉerkon.

Ŝajnis al ŝi, ke ŝi vidas ĉiun bluan vejneton en la pala vizaĝo, ke ŝi vidas ankaŭ sub la longaj okulharoj malforte brilantan pupilon...

Dum kelke da sekundoj regis en la salono profunda silento. Neniu moviĝis, neniu ekparolis; ankaŭ la sinjorino, kiu antaŭe senĉese ĝemis, restis senmove, kvazaŭ ŝia nemezurebla doloro subite estus ŝtoniĝinta.

"Kvazaŭ viva, kvazaŭ viva!" mallaŭte diris fine apenaŭ aŭdeble la klara soprano. "Ah jes, jes, kvazaŭ viva — kaj tamen malviva!" ripetis kaj aldonis la ĝema voĉo, denove ekploranta.

Kaj post la momento daŭrigis tiu voĉo:

"Kaj tien ĉi — sur la vundon en la koro — mi metis laŭ ŝia deziro ŝian lastan leteron, en kiu ŝi adiaŭas la patrinon, la patron, min kaj la tutan mondon — la leteron, en kiu ŝi petas de ni ĉiuj pardonon kaj deziras, ke ni metu ŝin en la ĉerkon en tiu sama edziniĝa vesto, en kiu ŝi mortis kaj sur la vundon en la koro ke ni metu la lastan leteron, en kiu ŝi adiaŭas nin..."

La monaĥino ĉesiginte la preĝadon aŭskultas atente, eĉ avide.

Ĉiu el la lastaj simplaj kaj tamen tiel gravaj vortoj efikas ŝin froste kaj tamen varmegigante ŝin. Ŝi ektremis kaj tuj poste ŝi sentas, ke ŝia sango kuras pli rapide el la kapo al la koro kaj returne...

La paletaj vangoj sub la densa vualo iomete ruĝiĝis, la okuloj fiksitaĵ sur la hazarda punkto de l' pupitro malsekiĝas... Senvole ŝi levas iom la kapon...

En tiu momento unu el la virinoj apud la ĉerko ekĝemis:

"Ah, Dio, Dio! Tio estas terura!"

Kaj la alia ankaŭ mallaŭte aldonis:

"Kaj tamen estas nenia helpo — nenia, nenia helpo!" Kaj denove ekregis la tomba silento, sole periode interrompata de l' singulta ĝemado de la sinjorino, kiu antaŭe pli longe rakontis.

"Kion fari!" ekparolis post la momento la sinjorino en plej bona aĝo, kiun la monaĥino ĝis nun ne estis vidinta. "Ni devas forlasi ŝin — ni devas lasi ŝin sola ĉi tie!"

La singlute ĝemanta sinjorino denove daŭre kaj konvulsie ekploris...

"Adiaŭ, adiaŭ — dormu dolĉe — animo kara — plej kara!" ŝi ĝemis. Poste ŝi kliniĝis super la ĉerko, dum kelke da sekundoj fikse rigardis la vizaĝon de l' kadavro, kaj kliniĝinte ankoraŭ pli ŝi kisis ĝin sur la glacimalvarman frunton...

Rektiĝinte, ankoraŭ momenton ŝi rigardis la kadavron.

La ceteraj — laŭvice — alproksimiĝinte al la ĉerko, faris signon de la kruco sur la frunto, la lipoj kaj la brusto de la kadavro.

La monaĥino, havante la kapon iom levitan, povis vidi, kio ĵus okazis, sed ŝi vidis nenion — ŝiaj malsekaj okuloj estis nedeturneble fiksitaj sur la antaŭo de la ĉerko.

La singulte ĝemanta sinjorino, kiu staris momenton kvazaŭ ŝtoniĝinta apud la ĉerko, subite kliniĝis kaj ĵetinte la blankan gazon sur la vizaĝon de la kadavro, deturnis sin de la ĉerko.

Vidinte tion la ceteraj sekvis ŝin. La jupoj frote ekbruetis — kaj la virinoj denove tiel mallaŭte, kiel ili estis enirintaj, forlasis la salonon.

La monaĥino restis sola.

En la unua momento ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ia ŝarĝo estus defalinta de ŝia brusto. Ŝi ekrigardis al la pordo kaj vidadante, ke ĝi estas fermita, levis la kapon ankoraŭ pli alte ol antaŭ la momento. Ŝia rigardo timeme kaj malkuraĝe rondiris en la funebra salono.

Ĉio estis ĉi tie ĵus tia kiel antaŭe, antaŭ ol la virinoj eniris, sole kun tia diferenco, ke dume ekstere tute noktiĝis, kaj pro tio ĉio en la salono en la flaveta lumo de l' modere flagrantaj vaskandeloj havis aspekton pli klaran kaj samtempe malpli malĝojan ol antaŭe, kiam la vespera duonlumo enpenetradis ankoraŭ en la salonon.

El la antaŭĉambro eksonis ankoraŭ kelkafoje ĉi tien la rapidaj, sed mallaŭtigataj malgrandaj paŝoj, akompanataj de ĥaosa muĝo kaj bruoj, kiam kelke da personoj pretiĝas por foriri. Periode estis ankaŭ aŭdata iu, ankaŭ mallaŭtigata vorto aŭ fragmenta frazo; sed ĉio kuniĝadis en ĥaoson de muĝe krakantaj kaj frapantaj sonoj.

Subite la mallaŭtigata bruo kaj muĝo silentiĝis; sed tuj poste estis aŭdataj paŝoj de kelke da personoj, poste ekknaro de la pordo kondukanta el la antaŭĉambro al la vestiblo — fine la muĝo malproksimiĝas ĉiam pli kaj pli. Sed antaŭ ol ĝi tute ĉesis, ankoraŭ unufoje estis aŭdataj la proksimiĝantaj paŝoj... Apud la pordo de la salono ili haltis kaj iu metinte unu manon sur la anson turnis grince la ŝlosilon en la seruro.

La trapenetranta ekgrinco trakuris la animon de l' monaĥino kvazaŭ maldolĉa riproĉo; sed malgraŭ tio ŝi ne moviĝis, sed avide aŭskultis...

Post la ekgrinco de la ŝlosilo estis aŭdataj rapide malproksimiĝantaj paŝoj, poste pli mallaŭta fermo de alia pordo kaj denove, sed jam apenaŭ aŭdebla ekgrinco de la ŝlosilo, poste ekregis silento —

Ĉion ĉi, kion ni ĵus mallonge estis skizintaj, aŭskultis la monaĥino kun la eksterordinara atento. Ŝi ne preterlasis eĉ la plej malfortan, sole iom pli klaran memstaran sonon — ŝia aŭdsento estis streĉita kaj pro tio ŝia atento iom deturnita de la objekto, kiu antaŭe ekscitis ŝin.

La sekvo estis natura. En tiuj kelkaj minutoj, dum kiuj ŝi atentis la muĝon kaj bruon en la antaŭĉambro, preskaŭ tute ŝi akiris denove sian animan trankvilon. La vangoj havis la antaŭan palecon kaj la malsekiĝintaj okuloj la antaŭan arde pian trankvilon.

Dum kelke da minutoj ŝi restis senmove, kaj samtempe ankaŭ sen pensoj kaj rememoroj. Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ŝi estus preĝinta en la preĝejo la lastan preĝon kaj ankoraŭ genuas — estante en embarasoj, ĉu leviĝi aŭ ankoraŭ preĝi.

Ĉirkaŭe regis profunda silento, sole periode interrompata de modera, apenaŭ aŭdebla ekkrako de iu vakskandelo.

Sed tiu silento ŝajnas nenial stranga al la monaĥino. Turninte la kapon ŝi mallevis ĝin kaj denove fikse rigardis la pupitron antaŭ si kaj havante ankoraŭ la manojn kunmetitajn — ŝi denove komencis preĝi.

Ŝi preĝas en la animo la preĝon por la mortintoj — la preĝon plej konatan. Sed ŝi preĝas iel mekanike, ŝi pensas pri la parolataj vortoj, sed la animo estas iel indiferenta...

Sed malrapide revenas la antaŭa ardo kaj fervoro. Ŝia tuta animo preĝas...

Ŝi preĝas kvaronon da horo, duonon da horo, tri kvaronojn da horo, ne ĉesante preĝi eĉ unu momenton kaj ne malstreĉante almenaŭ iomete siajn pensojn... Subite ŝi estis

interrompita en la preĝado. De proksime, kredeble de la proksima preĝejturo eksonis surda sono de la horloĝo.

La monaĥino ĉesinte en la preĝado levis iom la kapon kaj kalkulas en la animo la surdajn unutonajn ekbatojn.

Ekbatis la dekunua.

La lasta sono estis treme soninta kaj ĉirkaŭe ekregis denove profunda silento.

La interrompita monaĥino vane penas enprofundiĝi denove en la preĝon. Mallaŭte ŝi parolas la vortojn de la preĝo; sed dume ŝia animo meditas, ĝis fine la meditado tute venkas.

Ŝi meditas pri la lastaj aferoj de la homo — pri la morto, la mistera, ĝis nun de neniu solvita enigmo — pri la vivo postmorta: pri la feliĉo de l' bonuloj kaj piuloj, pri la torturoj de l' malbonuloj kaj malpiuloj...

Ŝi meditas momenton pri la aferoj superteraj kaj denove revenas al la »larma valo« — al la turmentoj kaj doloroj teraj, al la stranga, tre stranga miksaĵo de ĝojaj, malĝojaj kaj doloraj momentoj, kiuj estas nomataj »vivo«.

Unue la meditado havas karakteron pli malpli maldolĉan — kvazaŭ kiam la fremdaj pensoj kaj fremdaj aŭtopsoj falas en la animon... Antaŭ la spirita rigardo de l' meditanta monaĥino tremetas kvazaŭ en la nebulo diversaj staturoj; jen pala virino en la ĉifonoj kaj kun la okuloj sange ruĝaj de ploro, jen kaduka maljunulo ŝanceliranta laŭlonge la muro, jen denove iu ĉarma staturo en la reĝa vesto kaj tuj denove io, kvazaŭ kripligita monstro rampanta en la polvo kiel vermo...

Post la momento la atmosfero ŝanĝiĝas.

La nebulo, en kiu tremetis la staturoj, komencas heliĝi, kvazaŭ kiam ĝi forkuras antaŭ la eliranta suno. La krepusko fariĝas malrapide ruĝeto... La ruĝeta nebulo disiĝas kaj antaŭ la spirita rigardo de l' meditanta, ĝuste reveme profundiĝanta monaĥino staras tute klara kaj plastika ĉarmoplana bildo.

Lazura ĉielo arkiĝas super la ĉarmoplana, paradiza ĝardeno, plena de diversaj nekonataj floroj kaj ankaŭ tiaj plejparte palmaj arboj.

Dekstre kaj maldekstre estas vidataj rokoj kaj post ili altaĵoj kovritaj de l' arbaroj. Tie ĉi kaj tie de la rokoj saltas torentoj — sub la rokoj larĝiĝas verdaj herbejoj, tra kiuj serpentumas flavaj vojetoj.

Ĉio estas tiel simpla kaj tamen pro siaj trankvilo kaj paco tiel kara, tiel agrabla, tiel alloganta...

Dum kelke da sekundoj la ĝardeno estas senhoma, senbesta... Subite ĝi viviĝas... La homoj kaj la bestoj ĉiuspecaj promenas trankvile sur la vojetoj aŭ ripozas sur la herbejoj.

Jen juna ĉarma virino staras apud la tigro, tie leono ripozas apud la piedoj de l' blondhara bubeto; ĉi tie la cervo, urso, kato kaj hundo sekvas unu la alian sur la sabla vojo kaj super ili rondflugas aglo super la amaso da neĝoblankaj kolomboj.

En kelke da minutoj kelkafoje ŝanĝis la kara kaj alloganta bildo sian fizionomion. La stafaĝo restis tiu sama, sole la aro da homoj kaj bestoj senĉese ŝanĝiĝis.

Kaj mirinde — la homaj mienoj estis tiel agrable trankvilaj, kvazaŭ la paco ŝtoniĝus sur iliaj vizaĝoj...

Ĉiu, ĉu la maljunulo aŭ la junulo, ĉu la viro aŭ la virino en la tuta forto de la vivo, ĉu la infano apenaŭ elirinta el la lulilo — ĉiu ŝajnas nemezureble feliĉa kaj kontenta...

Estas nenia dubo, ke la monaĥino anime enprofundiĝis en la paradizajn ĝojojn de la vivo en la nekonata, mistera postmorto; sed ŝia modera, malelasta fantazio sciis elsorĉi al ŝi sole la bildon plej simplan, plej primitivan...

Estis al ŝi ĝoje kaj agrable; sed tamen ŝi sentis ian premitecon, ian moderan malkontenton kaj ankaŭ ian trompiĝon. Ŝi ne komprenis la kialon; ia dolĉa melankolio ekregis ŝin simile kiel la feliĉan homon, kies animon trakuras la penso, ke li ne estas izolita kun sia ĝojo kaj feliĉo...

Subite ŝajnas al ŝi, ke en la malantaŭo de la belega ĝardeno vidiĝas ĉiam pli granda perspektivo — kaj plej malproksime — ŝi vidis konatan, tre konatan pejzaĝon: simplan vilaĝon kun ia simpla preĝejo kaj ne malproksime belan bienon.

Senvole ŝi eksvingis la dekstran manon kaj levis la vualon. Ŝia vizaĝo vidigas la nepriskribeblan ekridon de la kontentiĝo — antaŭ ŝia spirita rigardo elsaltas la bildo de l' naska vilaĝo...

Ŝi vidas la patron, la sanegan, rideman, ruĝvangan viron — ŝi vidas la patrinon, trankvilan, seriozan virinon kun la mieno de l' delikata boneco — ŝi konjektas vidi ankaŭ sin mem unue kiel infanon kaj tuj poste kiel virgulinon...

Kaj antaŭ ŝia spirita rigardo rapidege sekvas unu bildo la alian. Jen ŝi vidas la patron sur la kampo kaj tuj poste apud la tablo kun la patrino — jen ŝi mem sidas sur la genuoj de la patrino, karesas kaj kisas ŝin kaj tuj poste ŝi kuŝas en sia infana lito aŭskultante, kion la patro kaj la patrino rakontas.

Ŝi rememorigas sin pri la servistoj kaj servistinoj, ŝi rememorigas sin pri la kunulinoj el sia plej frua infaneco kaj el la aĝo pli posta, ŝi rememorigas sin pri la lernejo kaj la kunlernantinoj, pri la maljuna instruisto kaj la multo, multego da personoj kaj momentoj — entute simplaj, preskaŭ ordinaraĵ, sed tamen karaj.

Subite elsaltis antaŭ ŝi la bildo treege alloganta, kiam ŝi en la vilaĝa veturilo kiel maturiĝanta knabino proksimiĝis kun la patrino al Praha por tie ĉi eniri en la edukinstituton kaj la veturilo haltis sur la monteto, de kiu estis vidata Praha, ĵus dronanta en la ruĝa brilo de l' subiranta suno...

Sed tiu bildo rapide cedas antaŭ la bildo alia: ŝi vidas sin mem en la pensiono — ŝi vidas siajn novajn kunulinojn — ŝi vidas ankaŭ tiun, kiun pli poste ŝia koro tiel amis kaj kiu fariĝis ŝia plej fidela amikino; la gracian, rideman blondulinon kun la profundaj, amplenaj, bluaj okuloj kaj kun glataj ruĝaj vangoj, varmaj lipoj kaj kun tiu enviinda, senzorga penso, kiu facile transportas la homon trans ĉiujn eblajn rifojn de la vivo.

Ŝi vidas ŝin kvazaŭ staranta antaŭ si — tiel klare, tiel plastike...

Oni ne povas imagi al si, kian inklinon ŝi sentis al ŝi, kiel ŝi amis ŝin. La plej varma amo fratina ne povas esti pli varma. Dum tri jaroj ili vivis preskaŭ senĉese sub unu tegmento, en unu ĉambro kaj tre malofte ili disiĝis sole por kelke da momentoj. Unu sen la alia tute ne povis vivi, unu antaŭ la alia havis nenian sekreton, unuvorte, ili estis unu animo.

Kiel ekstra, kiel poezia estis tiu tempo, kiam ili tiel vivis kaj revis interŝanĝante ĉiutage siajn revojn kaj dezirojn, ĝojante je la estonteco kun la plej ĉarmaj esperoj...

Multo, multego da tiuj ĉarmoplenaj revoj de l' juneco trakuris nun la animon de l' monaĥino —

Subite ŝanĝiĝas ŝia mieno — la rideto de l' kontentiĝo en la momento ŝanĝiĝis en la malgajecon, preskaŭ en la maldolĉon: ŝi konjektas vidi sian kunulinon feliĉa...

Ŝi vidas ŝin sidanta apud la lulilo de l' propra infano —

Sed tuj poste denove ŝanĝiĝas la mieno de l' monaĥino: la mieno de l' maldolĉo transiĝas en la mienon de l' rezignacio — sed tuj poste ŝia vizaĝo vidigas la mienon neesprimeble maldolĉe doloran...

Antaŭ ŝia spirita rigardo ekaperis kvazaŭ timema ombro la staturo de l' pala, serioza studento —

Tiu imago sufiĉis, por ke la panoramo de la bildoj elsorĉitaj de la fantazio haltu...

La monaĥino ne povis rezisti ian strangan senton de l' ekfrosto. Ŝi eksvingis rapide la manon kaj mallevinte la vualon komencis laŭte preĝi, kvazaŭ ŝi volus forpeli la teruran ombron, kiu ĵus estis trakurinta ŝian animon, la ombron fatalan, kiu estis la ĉefa kaŭzo, kial ŝi por ĉiam adiaŭis la mondon kaj ĝiajn plezurojn, eĉ tiujn dolĉajn revojn, kiuj tiel feliĉigis ŝin ankoraŭ antaŭ ne multaj jaroj...

Ŝi perforte devigas sin al la preĝo.

La vortoj defluas de la lipoj; sed la ardo, kun kiu ŝi ĉiam antaŭe enprofundiĝadis en la meditado pri la mistera estaĵo, tute mankas al ŝi... Kaj la malhela ombro, la nebula silueto, preteriras antaŭ ŝi ĉiumomente ŝanĝante sian formon kaj vidiĝante jen pli klare, jen; pli nebule, sed dume senĉese terurigante ŝian animon.

Ŝi preĝas kvin minutojn, dek minutojn, kvaronon da horo...

Sed nenio helpas! La imago de l' nebula silueto estas pli potenca ol la preĝo.

Malrapide fariĝas la imago pli klara, pli preciza, ĝis fine denove staras antaŭ ŝia animo tiu sama pala, serioza, juna viro, kiu estis interrompinta ŝin en la revema enprofundiĝo...

Ankoraŭ momenton ŝi provas preĝi; sed la pensoj kaj rememoroj ĉirkaŭflirtantaj la palan studenton ĉiam batalas por sia rajto... Post ne longe la monaĥina kontraŭ sia volo ĉesas preĝi — la rememoroj denove okupas ŝian animon...

Ŝi rememorigas sin pri la momento dum la belega maja posttagmezo, kiam ŝi, revenante kun sia nedisigebla kunulino el la preĝejo de sankta Vito, unuafoje ekvidis lin antaŭ la preĝeja pordo...

Ŝi rememorigas sin pri tio, ke estis al ŝi tiam iel strange — ke li senĉese okupis ŝian penson, ke pli poste ŝi sonĝis pri li, unuvorte, ŝi rememorigas sin pri ĉiuj dolĉaj kaj konataj detalaĵoj, en kiuj manifestas la naskiĝanta unua amo.

Dum kelke da momentoj ŝajnas al ŝi, kvazaŭ ŝi denove sentus emon al la vivo — kvazaŭ ĝis nun ŝi vivus tiel, kiel ĉi tiam...

Subite aperas en ŝia penso bildo alia.

Ŝi sidas mano en mano kun sia kunulino sub larĝbranĉa kaŝtano en la ĝardeno de l' pensiono... Estas aŭtuna vespero — la luno preskaŭ plena — ĉirkaŭe sankta silento...

Ili rakontas, pli ĝuste ili parolas silente, sed ĉiumomente unu aŭ la alia eksilentas... Dum la tuta horo ili ne ekridis eĉ unu fojon, ili ne ekŝercis eĉ unu fojon — ambaŭ estas ĉiam pli silentemaj, ĝis fine ambaŭ kelkan tempon silentas...

Subite la kunulino stariĝis kaj ĉirkaŭpreninte ŝian nukon fikse ekrigardis ŝiajn okulojn...

"Berto!" ŝi diris mallaŭte per la tremanta voĉo.

"Kion vi deziras, kara Henjo?" rediris Berto ankaŭ mallaŭte.

Henjo silentis ankoraŭ momenton kaj poste per la premita, interrompata voĉo komencis konfesi...

Per simplaj kaj tamen varmaj vortoj ŝi rakontis, kiam kaj kiamaniere komencis ĝermi la amo en ŝia koro — poste ŝi komunikis la tutan serion da detalaĵoj, kiuj klare pruvis, ke ŝia amo trovis eĥon en la animo varme, arde amata.

Berto, estinte interrompita en la revema enprofundiĝo, aŭskultis komence kvazaŭ apatie; sed baldaŭ la rakonto de l' kunulino ekinteresis ŝin.

Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ŝi estus aŭskultanta sian propran animon: Henjo pentris similajn maltrankvilojn, similajn dolĉan premitecon kaj suferojn, kiuj jam de kelke da monatoj ĉesigis la trankvilon de Berto. Ŝi sentis tiel neesprimeble dolĉan doloron, tian freŝan esperon, kvazaŭ atendente, ke la plenumo de ŝia plej varma deziro estas tute certa.

Fine Henjo nomis la objekton de sia amo...

La spiro de Berto haltis, ŝia brusto konvulsie kunpremiĝis, la koro komencis forte, konvulsie bati, la sango leviĝis al la kapo. Perforte ŝi kunpremis la lipojn por neniigi la ekĝemon aŭ la ekkriion...

Henjo amis kaj estis amata de tiu sama pala studento, kiu estis kvazaŭ idolo de Berto...

La simpla kaj en la vivo tial ofta fakto, preter kiu la homoj en la pli malfrua aĝo komplete ridetante transiras al la tagordo, tute dispremis Berton...

Vane kun la streĉado de ĉiuj siaj fortoj ŝi penis neniigi sian maltrankvilon, ĝuste la plej fortan animan uraganon, kiu tiel subite atakis ŝin.

Ŝi aŭskultis ankoraŭ momenton, poste eksaltis kun la mallaŭtigata ekkrio, ekŝanceliĝis kaj denove falinte sur la benketon ŝi kovris la vizaĝon per la ambaŭ manoj kaj daŭre ekploris — Henjo penis trankviligi ŝin. Ŝi demandas la kaŭzon, insistas, petas — ĉio estas vana...

Berto silentas kiel tombo; ŝi ne malkovris la dolĉan sekreton de sia koro...

De tiu momento ŝi suferis nemezureble kiel ĉiu, kiu ne volas aŭ ne povas konfesi siajn dolorojn al alia homo — kaj ŝi ne povis, ne devis ilin konfesi...

Melankolio ekregis ŝian tutan animon. La mondo estis indiferenta al ŝi; ĉio, kion ŝi ekvidis, fariĝis malagrabla al ŝi — ŝi vivis sole por siaj malĝojaj revoj kaj ankaŭ por tiaj rememoroj.

En la unua tempo iafoje ŝi havis okazon vidi la nemezureblan feliĉon de sia amikino...

Ofte ŝi aŭdis ŝin rakonti pri li, ofte ŝi vidis ŝin kun li, iafoje ŝi eĉ parolis kun li kelke da ordinaraj, sensignifaj vortoj...

Sed ŝi treege suferis en tiuj ĉi kelkaj momentoj; kaj tio estis la kaŭzo, ke ŝi fine serĉis la rimedon kontraŭ sia anima malsano kaj forlasinte la pensionon revenis kun la rompita koro al la gepatroj en la naskan vilaĝon.

Ĉi tie ŝi vivis preskaŭ en la tuta izoleco for de la mondo kaj ĝiaj plezuroj. La izoleco kaj la meditema enprofundiĝo en la rememoroj estis al ŝi la plej karaj; ŝi vivis kiel »sanktulino«...

En la unua tempo ŝi interkorespondadis kun la feliĉa amikino.

La leteroj de Henjo, skribitaj kvazaŭ per la sango de la koro, disŝiradis la koron de Berto; sed la silenta suferantino respondadis ilin ĉiam kun la senekzempla abnegacio...

Henjo pentris ofte sian feliĉon per tiel vivaj koloroj, ke la okulo de Berto pleniĝis per la larmoj dum la legado kaj multafoje ŝi devis ĉesigi la legadon, antaŭ ol ŝi venis al la fino de la letero.

Sed tamen — kiel ofte okazas en la vivo — ambaŭ amikinoj en la unua tempo interkorespondadis sufiĉe ofte; pli poste ili iom laciĝis en la korespondado kaj post tri aŭ kvar jaroj tute ĉesigis ĝin.

La bedaŭrinda, malfeliĉa Berto restis tute sola kun sia doloro. Kvankam la gepatroj kaj la aliaj homoj klopodis per ĉiuj fortoj revenigi la knabinon, iam tiel freŝan kaj sopirantan je la vivo, denove al la vivo, tamen ilia penado estis vana. Ŝi aŭskultis trankvile ĉiun kaj ĉiam maldolĉe ridetante nee ekskuis la kapon...

Kaj malrapide, sed tiom pli firme maturiĝis en ŝia animo la intenco tute disiĝi de la mondo.

Kaj kiam ĝi estis maturiĝinta, ĝi estis ankaŭ efektivigita: Berto eniris en la monaĥejon de l' »kompatemaj fratinoj« kaj post unu jaro fariĝis »fratino« Magdaleno —

La asketa vivo monaĥeja, kunigita kun la helpado al la mizeruloj, estis preskaŭ tute neniiginta ĉiujn pensojn pri la mondo ekstermonaĥeja; sed tamen ne povis la fratino Magdaleno rezisti la strangajn sentojn kaj pensojn, ŝin periode atakantajn.

Precipe dum la silentaj noktoj aŭtunaj, kiam la animo tiel volonte revas kaj meditas, kiam ŝi laciĝita de la preĝado senvole enprofundiĝis en la rememorojn, kiam ŝi rememorigis sin pri la feliĉa amikino — en tiaj momentoj ŝi eksentis ĉiam neesprimeblan dezerton en la animo, doloran premitecon, multafoje eĉ trakuron de la frosto kaj tuj poste denove febran ekstremon —

Kaj tio okazis ankaŭ nun, kiam ŝi, genuante unuafoje en sia vivo antaŭ la kadavro dum la silenta nokto aŭtuna, enprofundiĝis senvole en la rememorojn tiel, ke ŝi tute forgesis, kial kaj kie ŝi troviĝas.

Bildo sekvas bildon antaŭ ŝia spirita rigardo — jen ĝi estas klara kaj plastika, jen nebula kaj malklara, jen en la formo de simpla silueto...

Subite ekstere leviĝis la vento kaj forte ekskuis la fenestrojn. Tiu ekbruo interrompis la fratinon Magdalenon en ŝiaj meditemaj rememoroj.

Levinte la kapon ŝi timeme rigardis ĉirkaŭ si kaj nur post kelke da sekundoj ŝi tute rekonsciiĝis, kial kaj kie ŝi troviĝas...

Sed ŝi treege konsterniĝis rekoninte, ke ŝi ne trovas sin genuanta kaj ne havas plu la manojn kunmetitajn sur la pupitro por preĝi, sed ke ŝi sidas sur la ŝtupo, sur kiu ŝi antaŭe genuis, ke ŝi havas la manojn preskaŭ konvulsie kunpremitajn sur la genuoj kaj ke ŝi havis antaŭ la momento la kapon profunde mallevitan al la brusto...

Rekonsciiĝinte ŝi stariĝis kaj denove genuis, kiel autaŭe; ŝi denove kunmetis la manojn kaj komencis preĝi.

Dum kelke da momentoj regis profunda silento, interrompata sole periode de modera ekkrako de iu vakskandelo. Subite la vento ekstere denove leviĝis kaj ekfajfinte, kvazaŭ ie proksime la muŝo estus ekpepinta, longe kaj surde ekbruis, kiel en la malproksimo perdiĝas la ekblekego de l' sovaĝa besto...

Tiu stranga kaj preskaŭ teruriganta sono ekscitis momenton la preĝantan monaĥinon.

Ŝi turnis malrapide la kapon al la fenestroj — ŝajnis al ŝi, ke tra la fenestroj ŝi vidas la stelojn brili sur la firmamento; sed la ruĝeta lumo de l' vakskandeloj rebrilanta de la vitro fenestra malhelpis la rigardon.

Momenton rigardas la monaĥino al la fenestroj. Jen ŝajnas al ŝi, kvazaŭ ia flava lumo estus trakurinta antaŭ la fenestroj, simile kvazaŭ iu estus subite elirinta kun la lumo el la mallumo kaj tuj estinginta ĝin...

Kaj samtempe kun la trakuro de la flaveta lumo leviĝis ekstere la ventego pli sovaĝe ol autaŭe kaj ekskuinte forte la fenestrojn, ĝis ili ektintis, malfermis unu el ili.

Malvarma, preskaŭ glacia vento turnis sin en la salono kaj ĉirkaŭblovis ankaŭ la fratinon Magdalenon. La kandeloj ekflagris, iliaj flamoj jen kuntiriĝis, jen denove eksaltis — la salono jen mallumiĝis, jen denove heliĝis...

La monaĥino mekanike stariĝis, levis la vualon kaj ŝteliralite alproksimiĝis al la fenestro, malfermita de la vento, por fermi ĝin.

En tiu momento la fulmo denove trakuris la firmamenton.

La monaĥino farinte signon de la kruco iom cedis kaj deturnis la vizaĝon de la fenestro, tra kiu la surde bruanta vento kuris en la ĉambron.

Ŝia rigardo fiksas unue sur la flagrantaj vakskandeloj, poste sur la ĉerko kaj la blankaj, de la vento modere ondigataj rubandoj de la florkronoj.

En la unua momento ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ĉio ĉirkaŭ la ĉerko viviĝadus, eĉ — kvazaŭ la kadavro en la ĉerko kovrita per la blanka gazo ekmoviĝus.

Malgraŭ tio ŝi ne perdis la trankvilon, kun kiu ŝi antaŭe alpaŝis al la fenestro. Turninte sin al la fenestro ŝi fermis ĝin kaj denove malrapide revenas al la pupitro. En tiu

momento ekstere trakuris la fulmo pli forta. La monaĥino haltinte denove ekrigardis al la fenestroj — post la momento ŝi ekaŭdis surdan bruon de malproksima ektondro...

Kelkan tempon ŝi staris kvazaŭ en embarasoj, poste turnis sin kaj ŝia rigardo fiksitis sur la ĉerko. La vento estis iom levinta la blankan gazon. Estis vidataj du manoj, kruce metitaj sur la brusto —

Nenion plu ŝi vidis ol du blankajn, kvazaŭ vaksajn manojn virinajn kaj malgrandan nigran krucon, sed tiuj manoj kvazaŭ mistere efikas la monaĥinon: ŝia rigardo, kvazaŭ rigidiĝinta, estas fiksita sur ili.

Momenton staras la fratino Magdaleno kiel statuo. En ŝia animo reviviĝas la imagoj, kiujn al ŝi elsorĉis ŝia fantazio dank' al tio, kion ŝi aŭdis rakonti, sed la imagoj nun ankoraŭ kreskas, eĉ — en ŝia animo naskiĝas novaj bildoj...

En la salono regas tamen profunda silento; ekstere la vento silentiĝis kaj la vaskandeloj brulas rekte kiel antaŭe.

Sed jen denove ekfulmo kaj tuj poste jam bruanta ekkraĵo de la fulmotondro. La fratino Magdaleno cedis, poste malrapide proksimiĝas al la pupitro kaj jam volas genui, kiam la tomba silento denove estas interrompita.

Rekte antaŭ la monaĥino eksonis modera ekkraĵo — kredeble la ĉerko...

La monaĥino ekstremitis.

Tuj poste eksiblis ekstere la vento kaj la frapantaj sonoj interrompas la daŭran bruon... Komencis forta pluvego...

La monaĥino momenton staras senmove; poste ŝia mano senvole apogas sin sur la pupitro — kaj la okulo estas denove fiksita sur la blankajn, kruce metitajn manojn de la kadavro.

Ekstere la vento fajfas kaj bruas ĉiam pli daŭre. Periode atakas la pluvo tiel forte la fenestrojn, ke la gutoj tamburas, kvazaŭ ili faladus sur la tintantan plataĵon horizontalan. Fulmo ĉiam pli rapide sekvas la fulmon, la krakado de la tondro estas ĉiam pli brua.

Ŝajnas, ke la monaĥino havas nenian atenton por la furiozantaj elementoj.

Ŝiaj okuloj estas rigide fiksitaj sur la blankajn manojn kun la nigra kruceto, en ŝia animo naskiĝas io kvazaŭ peka scivolo.

"Kiu vi estas kaj kial — kial vi tiel subite disŝiris la fadenon de la vivo?" ŝi pensas. "Oni diris, ke vi estis juna, gaja kaj ĉarma — kaj sur la rando de la tera feliĉo... kaj tamen, tamen — Oh, se mi almenaŭ povus legi la respondon sur via vizaĝo — sur viaj senbrilaj okuloj — sur via glacimalvarma mano!... Eble vi amis — arde, flame, pasie, freneze... Ah — jes, jes! Preskaŭ ŝajnas al mi, kvazaŭ mi envius vin... Morti, kiam vi estis eltrinkinta la pokalon da amo ĝis la fundo — morti en kelke da momentoj kaj mallonge post tiam, kiam vi estis elturninta sin el la ĉirkaŭpreno de la plej amata viro — oh, kiel enviinda estas tiu sorto rilate la sorton, kiam la vivo treniĝas en la turmentoj animaj, kiam la korpa forto malrapide mortas, ĝis fine la homo pereas — de senfortiĝo..."

Subite ŝi mem interrompis sin en la pekaj pensoj. Ŝi ekpensis pri la postmorto. Senvole ŝi ektemis kaj cedis...

Ŝiaj okuloj estas ankoraŭ fiksitaj sur la blankaj manoj de la kadavro. Post la momento, ne sciante la kialon, ŝi malproksimiĝas de la pupitro mallaŭte sur la pintoj kaj post kelke da minutoj staras apud la ĉerko.

Ŝi staras dum kelke da minutoj fikse rigardante blankajn, kruce metitajn manojn sur la brusto. Ŝi vidas sur ili bluajn vejnojn kaj sur unu fingro oran ringon...

En tiu momento falis ŝia rigardo sur la pli malhelan lokon sur la blanka vesto proksime de la koro — ŝi rekonis sangan makulon.

Denove ŝi cedis unu paŝon — ŝian animon trakuris la rememoro pri la lasta letero, en kiu la mortinta knabino estis adiaŭinta la siajn kaj kiu laŭ ŝia deziro estis metita sur la koron.

Sed ĵus sur la brusto estas ĝis nun metita la blanka gazo.

La fratino Magdaleno estas momenton en embarasoj. Subite ŝi decidis. Farinte unu paŝon al la ĉerko ŝi levis iom tremantan manon al la gazo kaj forigis ĝin.

La gazo sur unu flanko de la ĉerko falis — sed la vizaĝo de la kadavro estas ankoraŭ kovrita per la blanka gazo — la letero kuŝas sur la koro...

Estas videble, ke la vesto ĉirkaŭ la koro estis forte sangmakulita; — sed la monaĥino rimarkis sole kelke da malgrandaj makuloj ĉirkaŭ la letero metita sur la koro — aŭ pro tio, ke la makuloj estis kretitaj aŭ pro tio, ke la vesto estis en la ĉerko lerte faldita, por ke la makuloj ne estu videblaj.

Kaj denove ŝi staris momenton senmove, kvazaŭ en embarasoj, ĉu forigi ankaŭ la gazon de la vizaĝo aŭ preni la leteron.

Fine ŝi decidis. Per firma mano ŝi levis la leteron, sub kiu aperis granda sanga makulo...

La monaĥino ektremis. Dum kelke da momentoj ŝi tenis la leteron nedecidite en la mano, poste malrapide per la tremanta mano malfaldis ĝin kaj komencis legi.

Ĝi estis skribita de lerta mano, sed tremanta dum la skribado, ĉar kelkaj vortoj, eĉ tutaj frazoj estis preskaŭ nelegeblaj...

Ekstere furiozis la uragano ĉiam pli sovaĝe — dume la monaĥino pene legis la jenon:

"Kara patrino — kaj vi, patro — kaj vi, bona onklinjo!

Pro ĉio, kio estas kara al vi, pardonu min! —

Mi ne povis fari alimaniere!

Mi adiaŭas vin sen maldolĉo kaj sen riproĉoj. Mi ne riproĉas eĉ la patron, kiu laŭ sia opinio zorgante sole pri mia bono kaj feliĉo, estis destininta al mi la fianĉon, kiun mi tre ŝatas kaj estimas, sed kiun mi malgraŭ tio ne povas ami.

Mi estus nur ŝarĝo por li, — malvarma, glacia ŝarĝo, kiu nepre devus maldolĉigi al li la vivon kaj dum la tempo fari ĝin tute netolerebla. Petu lin, ke ankaŭ li pardonu min.

Mi amis, kiel vi scias — varme, sincere, mi amis arde, flame, pasie, eĉ freneze...

Kaj li, kiu dum la tuta vico da jaroj estis mia idolo, mia dio, ĵus en la tago, kiam mi decidis, ke mi ne povas, ne devas fariĝi edzino de alia viro, kiam mi decidis, ke mi forkuros kun li kaj suferos kune kun li la mizerojn de l' perdita ekzisto — li, kiu estis falinta tiel, ke li ne indas nomi sin homo, li — en la ĝusta senco de l' vorto forĵetis min de si — kiam mi falis sur la genuojn antaŭ li...

Ne malbenu min, ne kulpigu min je la peka faro kaj pardonu min! Mi ne povis fari alimaniere!

Kaj mi petas — insiste petas vin: Ĉio, kion mi konfesis al vi, restu por ĉiam sekreto!

Metu min, mi petas, en la ĉerkon en la sama vesto, kiun mi estus prenonta ĉe mia edziniĝa festo kaj kiu en kisos min anĝelo de la morto — kaj tiun ĉi leteron, en kiu mi ĉion konfesis al vi, metu sur la vundon de mia dispremita koro!

Kaj se iam iu el vi renkontos mian estintan kunulinon, kiu antaŭ kelke da jaroj estis mia fidela amikino kaj kiu lin, kiun mi estis adorinta, ankaŭ vidadis ĝoje — mi konjektas — eĉ amis — se vi rekontos Berton — komuniku al ŝi —"

Fratino Magdaleno ne povis legi plu.

Jam dum la lego de l' unua parto de la letero tremis al ŝi la manoj, dum la lego de la dua parto ŝiaj okuloj pleniĝis per la larmoj tiel, ke ŝi legis kvazaŭ tra la nebulo, dum la lego de la lastaj linioj la letero elfalis el ŝia mano.

Freneza, malespera ekkrio eliĝis el ŝia brusto. Ŝi ŝanceliĝis; sed tuj poste kvazaŭ rekonsciiĝinte ŝi levis la tremantan manon kaj forigis la gazon, per kiu la vizaĝo de la kadavro estis kovrita.

Ŝi konvinkiĝis tute.

Ŝi ekvidis malvivan vizaĝon de sia estinta plej kara kunulino — ŝi ekvidis la belan blondharulinon kun la revemaj, sed nun rigide eligitaj, kvazaŭ vitraj okuloj...

Ŝia spiro haltis, la brusto pene laboris; ŝia koro konvulsie kunpremiĝis de la neesprimeblaj kompato kaj doloro. Ŝiaj okuloj pleniĝis per la larmoj...

Dum pli longa tempo ŝi ne vidis, nek aŭdis — ŝi staris apud la ĉerko kvazaŭ rigidiĝinta...

Ekstere furiozis la uragano kun neŝanĝita forteco. Blindigantaj fulmoj kruciĝas sur la firmamento, la bruego de la fulmotondro ne ĉesas. La ventego fajfas, bruas kaj blekegas kvazaŭ furiozanta maro — la fenestroj tremante tintas, la gutoj de la pluvo terurige tamburas — sed la fratino Magdaleno, kiel estis jam dirite, ne vidas, ne aŭdas.

Ŝiaj vangoj brulas, de la larmoj superverŝitaj okuloj febre brilas, la lipoj estas konvulsie kunpremitaj...

Subite ekstere leviĝis la vento kun la triobla forteco. Ekĝeminte dolore, kvazaŭ la koro estus diskrevinta, ĝi ekbruis profunde, poste alpremiĝis al la fenestroj, ektintigis ilin kaj malfermis tiun saman kiel antaŭe. Forta glacimalvarma aerfluo enpenetris tra la fenestro en la salonon kaj turnis sin ĉirkaŭ la ĉerko. La flamoj de la vakskandeloj profunde kliniĝis, sed tuj denove ekflamis.

La ventego enblovis denove — pli forte ol antaŭe kaj estingis tri, kvar kandelojn...

La salono iom mallumiĝis. La monaĥino staras ankoraŭ kvazaŭ rigidiĝinta... En tiu momento la turnanta fluo de la ventego la trian fojon enpenetris la salonon kaj estingis la ceterajn kandelojn — la salono tute mallumiĝis.

La uragano furiozas kun ĉiam kreskanta furiozeco — sole la flamoj periode lumigas la salonon. En tiuj momentoj ĉio eklumigita de la fulmoj havas aspekton preskaŭ terurigan. Frosta fluo de la ventego turnas sin en la salono kaj movigas la rubandojn kaj la florkronojn — sole la fratino Magdaleno staras senmove.

Subite forte ekfulmis kaj tuj poste sekvis la surdiganta ektondro.

La fratino Magdaleno rekonsciiĝis el la agonia rigideco. En la momento de l' blindiganta ekfulmo ŝajnis al ŝi, kvazaŭ la kadavro estus duone leviĝinta en la ĉerko...

La monaĥino dolore ekĝemis kaj preninte la kapon per la ambaŭ manoj ŝi cedis ŝancelirante de la ĉerko.

Tuj poste denove falis al ŝi la manoj — ŝi staras firme, sed ia neesprimebla timemo kunpremis ŝian animon. Malvarma ŝvito aperis sur la frunto kaj la vangoj de la bedaŭrinda monaĥino — ŝia tuta korpo tremas — sed ŝiaj piedoj estas kvazaŭ alforĝitaj.

Jen ekstere trakuris nova fulmo kaj denove ŝajnas al la monaĥino, kvazaŭ la kadavro estus leviĝanta.

Tiun ĉi fojon ŝi ekkriis kaj kuraĝiĝinte penas forkuri kun la streĉado de ĉiuj fortoj.

Ŝanceliĝante en la mallumo ŝi fine sukcesis atingi la pordon; sed la pordo estas ŝlosita.

Ŝi pugnobatas ĝin; ŝi krias, petege krias — vane! Timo kaj teruro skuas ŝian korpon; ekkrioj sole eliĝas stertore el ŝia ondiĝanta brusto —

Jen nova fulmo — al la monaĥino ŝajnas, kvazaŭ la kadavro estus tute leviĝinta en la ĉerko.

Kun la korŝiranta ekkrio ŝi kuras al la fenestroj; sed faletinte en la tuta mallumo ŝi kapbatis la muron kaj falis sur la plankon —

Ankoraŭ la tutan horon furiozis la uragano. La fulmoj terurige lumigadis la funebran salonon, la frosta vento turnis sin ĉirkaŭ la ĉerko kaj ĉirkaŭblovadis la febre ruĝigitajn vangojn de l' sveninta monaĥino...

La fratino Magdaleno restis sen konscio — ŝi restis sveninta dum kelke da horoj.

Nur matene, kiam la uragano jam longe antaŭe ĉesis furiozi, kiam la ventego silentiĝis kaj ĉesis la pluvo, nur kiam la suno jam longe estis leviĝinta super la horizonto — la monaĥino rekonsciiĝis.

Ŝi rekonsciiĝis ĝustatempe.

En la antaŭĉambro estis aŭdataj paŝoj kaj voĉoj...

Pene, kun la streĉado de ĉiuj restintaj fortoj trenis sin la fratino Magdaleno al la preĝbenketo —

Kaj kiam pli poste tiuj samaj virinoj, kiujn ŝi estis vidinta vespere, mallaŭte malfermis la pordon kaj ŝteleniris, ili vidis la monaĥinon genui kiel vespere...

Sed kiam ŝi fine leviĝis por foriri en la monaĥejon, ŝi ekŝanceliĝis kaj falis... Oni devis venigi la veturilon —

Kiom ŝi estis suferinta, neniuj sciigis, neniuj eĉ supozis —

MODERNA MAGDALENO.

Rimarko: En la rakonto »Moderna Magdaleno« mi uzis ĉie la pronomon »ci«, kie ĝin uzis la aŭtoro, por ke la traduko perfekte konsentu kun la originalo.

Kelke da scenoj el la silenta angulo de l' arbaro.

Minace kiel la neniigata pasio malleviĝas la peza aŭgusta vespero super la arbaroriĉa, monta pejzaĝo en Ŝumava.⁶

La firmamento jam preskaŭ la tutan horon estas kovrata de la pezaj, malbonportantaj nuboj, el kiuj tuj post la subiro de la suno elsaltadis senbrilaj fulmoj, akompanataj de la murmuranta tondrado.

Estas nenia dubo, ke plej baldaŭ falos sur la jam tute mallumiĝintan valon unu el tiuj daŭraj uraganoj, kiuj iafoje furiozas la tutan nokton...

El la fenestroj de la ĉasdomo la sole loĝata konstruaĵo en la tuta ĉirkaŭaĵo vibras tra la vespera mallumo ia flaveta lumo, lumiganta la ĉambron originalan kaj interesan.

Ĝi estas kvarangula kaj vasta ĉambro kun ligna plafono, dividita parte per la breta muro en du partojn.

La malantaŭo — la agrabla angulo kun du fenestroj plenaj de floroj — estas la dormoĉambro kaj de l' antaŭo ĝi estas dividita per la nigrobrunaj, duone disigitaj pordokurtenoj.

Unuavide oni ekkonas, ke ĉi tie regis ankoraŭ antaŭ nelonge la zorgema mano de l' amanta, belgusta virino. La meblaro estas simpla, sed ĉie oni povas vidi multe da elegantaj ornamaĵoj kaj la virinaj bagateloj.

Malgraŭ la videbla malordo, laŭ ĉio kaŭzita de la longa forestado de la mastrino kaj de tiutempa mastrumado de l' viroj ne tre ordemaj, la agrabla malantaŭo posedas ian allogantan freŝecon, ekstreme kontrastanta la malĝojan, malnovmodan antaŭon.

Sur la konvenaj kaj nekonvenaj lokoj de la muroj estas pendigitaj cervaj kornoj, paŝiloj, ĉasponardoj kaj diversaj ĉasiloj.

En la angulo dekstre staras granda kahela forno; antaŭe estas pordo kondukanta al la koridoro, el kiu la forno estas hejtata kaj el kiu oni iras per la ŝtuparo en la unuan etaĝon aŭ tra la ĉefa pordo en la korton, ĉirkaŭatan de l' alta stangobarilo.

Sur la muro inter la forno kaj la nomita pordo pendas ligna horloĝo kun la kukolo. Apud la horloĝo en la direkto al la pordo oni vidas grandan portreton de juna viro kun melankolia mieno, vestita kiel arbaristo. Sub la portreto pendas orita kadro kun la fotografaĵo de juna sinjorino en baltualetoj; kaj sub ĝi — revolvero.

En la muro kontraŭ la portretoj estas granda fenestro de bizara formo.

Kiam ajn ekfulmas pli forte, oni vidas tra tiu ĉi fenestro la lumigitan korton kaj malproksiman nebulan silueton de tri krucoj starantaj sur nealta roko, al kiu kondukas tordolinia vojeto kaj kiu supreniras ĝin ĝis la krucoj.

Antaŭ la fenestro staras negranda tablo kaj, tute antaŭe — kontraŭ la jam nomita pordo — troviĝas ankoraŭ alia pordo, kondukanta al la korto. Proksime staras seĝo, sur kiu estas ĵetita malnova ĉevaltuko.

Krom du ŝrankoj kun libroj laŭlonge la muro maldekstre kaj alia necesa meblaro estas meze de l' unua ĉambro granda tablo el kverka ligno kun krucitaj piedoj — apud la tablo staras apogseĝo, en kiu ĵus sidas viro en arbarista vesto kun la kapo apogita sur la ambaŭ manoj, kaj kelke da ordinariaj seĝoj.

Sur la tablo brulas granda petrola lampo kaj apud ĝi kuŝas ia malfermita libro.

Ĉio estas simpla, malnovmoda kaj malafabla kiel en la loĝejoj de maljunaj fraŭloj aŭ pli aĝaj vidvoj, al kiuj la ĉarmo de la proksima ĉirkaŭaĵo, en kiu ili malofte paŝigas la tempon, estas tute seninteresa.

Malgraŭ tio oni povas ankaŭ ĉi tie ekvidi aldonojn renovigantaj la iaman virinan mastrumadon.

En la momento, kiam ni enkondukas la leganton en la ĉambron, oni povas vidi ankoraŭ unu diferencon de l' kutimaj cirkonstancoj.

En la malantaŭa ĉambro duone post la paravento oni vidas infanan liton, kiu estas ŝovita tiamaniere de la muro, ke ĝi ne estas vidata de la pordo kondukanta al la korto. Apud la lito staras tablo kaj sur ĝi botelo da akvo kaj malgrandaj teleroj, pokalo kaj kulero.

La nokta trankvilo estas interrompata en la ĉambro sole de l' unutona iro de la horloĝo kaj periode de la muĝo de l' vento, kiu iafoje modere tintigas la fenestrojn. Ekstere fulmas ankoraŭ post longaj paŭzoj, kaj sole la murmuranta tondrado estas ĉiam pli klara.

La viro en la apogseĝo apud la tablo sidas senmove kiel statuo.

Nur kiam la horloĝo ekkrakis kaj la kukolo kantis la dekan, li levis la kapon kaj rigardinte dormeme ĉirkaŭ si, fiksas la rigardon sur la horloĝon.

"Kio estas?" deglitis malafable de liaj lipoj; sed tuj poste, kvazaŭ li estus tute rekonsciiĝinta, li diris silente, preskaŭ dolore:

"Ah, tiel! Post la sendorme pasigita nokto venkis min la laceco. Mi ekdormis..."

Turninte poste la kapon al la infana lito en la malantaŭo li leviĝis singarde kaj senbrue.

Li estas viro ĉirkaŭe sesdekjara de l' alta, ostoforta talio, nuba mieno, sunbrunigita vizaĝo, kovrita de griziĝinta, antaŭe nigra plenbarbo kaj kun iom malafablaj, sed bonanimaj trajtoj.

La sola rektiĝo malkovris, ke li posedas ankoraŭ plenan forton de l' viro, ke li estas pasiema kaj ne estas bone inciti lin aŭ liajn pasiojn. La rekteco, kuraĝo kaj kategorienco vidiĝas en ĉiu trajto de la vizaĝo, kies brilaj nigraj okuloj sub la griziĝintaj brovoj ŝajnas preskaŭ piki.

Leviĝinte li staris momenton, poste sur la pintoj kaj plej singarde li ŝteliris al la infanlito en la malantaŭon.

Momenton li fikse rigardis la lito, vidigante doloran eksciton, poste same singarde ŝtelforiris en la antaŭon, kie li haltis.

"Bedaŭrinda infano!" li ekĝemis kun la dolora rezignacio. "Ci suferas — ci suferas — sen la propra kulpo..."

"Ah, Dio, Dio!" li ekplendis, silentinte momenton, en la tono de l' kompata riproĉo. "Kial — suferas tiu bedaŭrinda kreitaĵo tiel nemezureble? Kial? Al kiu kaj kiamaniere ĝi faris ion malbonan?... Ankoraŭ antaŭhieraŭ ĝi kuradis kaj petoladis, freŝa kiel cervino, gaja kaj plena de vivo... Kaj hodiaŭ ĝi kuŝas la tutan tagon kvazaŭ duonmortinta — kaj sole la perioda sufoka tusado vekas ĝin el la agonia duonkonscio..."

Jen eksonis la stertora ektuso de la lito el la malantaŭo kaj tuj poste timeme ekkriis la sibilanta infana voĉo:

"Mami — mami!"⁷

"Denove ĝi vokas la patrinon!" ekpensis la viro en la antaŭo kaj turninte sin kun rapida servemo alpaŝis al la lito, de kiu leviĝis al li du infanaj manoj kaj la infana voĉo sibilante balbutis:

"Avĉjo, avĉjo! Kie estas mami?"

Sed la viro, alparolita tiel simple kaj tamen insiste ne respondis rekte tiun demandon.

Laŭ ĉio el diversaj motivoj li penis turni la pensojn de l' malsana infano al aliaj objektoj. Li komencis ĝin amplene kaj iafoje eĉ infane dorloti, parolante parte al la infano, parte — esplorante dume ĝian staton — al si:

"Ci ne dormas, karuleto? Mi pensis, ke ci dormas kiel zizeleto"⁸ Kaj ci kontraŭe rigardas kiel strigeto."

Ĉe tiuj vortoj li kliniĝis al la infano.

"Kaj ĉu io doloras cin — ĉu doloras? Kaj kie, karuleto, kie? Ĉu sub la mentoneto — en la gorĝeto, kiel ci montras? Ah, ĝi estas pasonta, karuleto — ci vidos!..."

Poste palpante la frunton de l' infano, la vangojn kaj la korpon, li daŭrigis en tiu sama tono:

"Ci havas ja la frunteton tute malvarman — kaj ankaŭ la vangetojn kaj la tutan korpeton!"

Ĉe tiuj vortoj trakuris lian animon la esperplena penso, ke la infano, ne havante la febron — pri kiu li konjektis, ke ĝi akompanas ĉiun gravan kaj danĝeran malsanon — tamen ne estas malsana tiel grave kaj senespere, kiel ŝajnas.

"Kaj ĉu ci deziras ion, karuleto — nenion? Ĉu ci volas trinki — ne?... Almenaŭ mi ordigos al ci la kuseneton sub la kapeto. Ci kuŝas ja ĉi tie kiel perfekta friponeto. La litkovrilo estas deĵetita — kunvolvita..."

Ordigante al la infano la kuseneton kaj la kovrilon, kun eldevigita petolemo li aldonis:

"Ĉi tie estis kiel en la vulpejo... Tiel, tiel! Nun ci kuŝos denove kiel princido — ĉu ne?... Nu, ci vidas — mi ankaŭ scias fari — ĉion, ĉion... Kaj nun ci ne tusas tiel konvulsie, kiel matene kaj la tutan posttagmezon. Kredeble tio estas bona signo. Lulu vin denove anĝelete, por ke la dolĉa dormo cin refreŝigu, refortigu, resanigu..."

En tiu momento li ekvidis, ke la infano fermis la okulojn kaj opiniante, ke ĝi jam estas dormanta, li rektiĝis.

Momenton kun dolora rezignacio li rigardis la infanon, kaj poste ŝtelirante de la lito kaj medite konsiderante li diris mallaŭte:

"Ĉu fine tio estas sveno, antaŭiranta la finan agonion?"

Tiu penso haltigis lin.

Volante konvinkiĝi li elpaŝis ekstreme brue; sed la infano ne aŭdas kaj ne vekigis, simile kiel ĝi ne vekigis la tutan vesperon dum kia ajn alia bruo.

Li bruigis poste la seĝon kaj kelkafoje piedbatis, fikse rigardante la infanon; sed en la vizaĝo de l' infano ne ektremis eĉ unu muskolo.

"Do tamen — la svenoj?... Ah, Dio, Dio!" li dolore ekĝemis, poste senĝene elpaŝis kaj trairinte laŭlarĝe la ĉambron rigardis la korton tra la fenestro.

Post momento li sin turnis.

Lia rigardo fiksitis hazarde sur la portreto de l' melankolia juna viro sur la kontraŭa muro kaj lia vizaĝo vidigis maldolĉon,. Kiam laŭ la kutimo de l' homoj izoluloj li komencis, duonlaŭte kaj fragmente paroli al la bildo:

"Nu, jen ci vidas, knabo, jen ci vidas!... Preskaŭ mi ĝojas en tiuj maldolĉaj momentoj, ĉar ci ne estas atestanto de ĉio ĉi — ĉar ci ne vidas cian infanon suferi kaj eble jam morti!

Kaj kiel severe, kiel riproĉe ci rigardas min — kvazaŭ ci volus diri, ke mi — cia patro estas kulpa je cia tuta doloro kaj malfeliĉo!...

Vere — mi devis alie eduki cin, ol kiel mi cin edukis! Mi faris eraron, ĉar mi allasis, ke ci pasigu cian tutan vivon en la arbara solejo, ekskluzive en la societo de l' maljuniĝanta patro.

Mi devis, laŭbezone devige aŭ perforte, se eĉ por iom da tempo, forpeli cin en la mondon, por ke ci ekkonu la homan hipokritecon kaj spite la ĝusteco de cia aŭtopσιο pri la mondo ne estu tiel mola, tiel sentema...

Jes, jes — mi devis doni al ci okazon rigardi pli profunde en la vivoturnon, en la homajn korojn!... Mi faris eraron, ĉar mi ne devigis cin, ke ci akiru spertojn pri la gento virina, ke ci ekkonu, ke nenio estas tiel ŝanĝema, nenio tiel perfida, kiel la koro de l' virino!...

Se estus tiel okazinta, certe tio, kio cin trafis, ne surprizus cin — kaj ne enprenus al ci la mortigan ilon en la manon...

Pardonu, knabo, pardonu al la pentofaranta patro la gravan, nepardoneblan kulpon — ĝuste eraron! Ĝin ne kaŭzis la malbona volo, sed la patra — eble ankaŭ infana amo, kiu ne volis kaj ne povis malhelpi kian ajn cian emon. Mi edukis cin viro — en la plena senco de l' vorto — viro ŝatanta honoron, viro, kies honoro ne estis ĥimero...

Kaj ke la senmezura animdoloro faligis cin antaŭtempe en la tombon, ke la trompita amo, la abomena perfido de l' malfidela edzino... Ne, ne! Laŭ cia karaktero ci ne povis fari alimaniere. Estante en cia situacio mi sendube farus tion saman. Unu premo de risorto de l' revolvero — kaj en la momento la netolerebla sufero estus finita..."

Post tiuj ĉi vortoj li ekrigardis timeme la armilojn pendigitajn sur la muro. Poste li aliris al la muro, deprenis la revolveron, pendantan sub la fotografaĵo de l' sinjorino en la orita kadro kaj momenton rigardis ĝin kvazaŭ relikvon.

Lia vizaĝo vidigas mienon ĉiam pli doloran. Subite li sin turnis kaj rigardinte al la lito en la malantaŭo li diris mallaŭte kaj mole:

"Ah — la infano — infano!..."

Alpaŝinte kun la revolvero en mano al la tablo, li metis ĝin sur la tablon — kaj kvazaŭ li estus nun rememoriginta sin pri la grava afero, li ekmurmuris:

"Sed kion faras la kuracisto? Kial li ne venas? La deka jam pasis kaj la kuracisto ne estas ankoraŭ tie ĉi..."

Sur lia dolore kuntiriĝinta vizaĝo aperis turmenta nedecideco.

Fine li decidis.

Rapide li alpaŝis al la pordo dekstre, malfermis ĝin kaj enirinte la malluman koridoron ekfajfis per la fingroj, Reveninte poste en la ĉambron li aŭskultis tra la duone malfermita pordo de l' koridoro.

Post la momento, vidigante malpaciencon, li ektiris forte du fojojn la tenilon de l' sonorilo apud la pordo kaj cedinte kelke da paŝoj li denove aŭskultis.

En la koridoro eksonis malagrabra sono de lada sonorilo. Tuj poste estis aŭdataj paŝoj de l' nudaj piedoj, malsuprenirantaj la ŝtuparon en la koridoron.

Post kelke da sekundoj aperis antaŭ la pordo en la koridoro ĉirkaŭe dekseŝjara knabaĉo kun la fizionomio, rememoriganta pri la bonkoraj idiotoj. Li havis sole ĉemizon kaj pantalonon pendantan sur unu ŝelko kaj liaj nudaj piedoj leviĝadis unu post la alia, kvazaŭ li starus sur la brulanta karbo.

"Ci dormaĉis, Kiĉjo!"⁹ brue bonvenis la maljuna viro alvokinta lin.

"Ne — ne — mi ne dormaĉis!" senkulpigas sin la alparolito, penante kovri sian dormemon. "Mi kuŝis sole..."

Kaj kun flatema servemo li aldonis:

"Ĉu vi ordonas ion, sinjoro patro?"¹⁰

"Mi ordonis ja, ke ci ne kuŝiĝu antaŭ la alveno kaj foriro de l' kuracisto," intermetis severe la »sinjoro patro«, sed tuj li demandis en la tono pli modera:

"Kion diris sinjoro doktoro, kiam li alveturos?"

Duone dormanta Kiĉjo, ne povante tuj rememorigi sin pri tio, balbutis rememoreme:

"Kion diris sinjoro doktoro, sinjoro patro?"

"Nu, eniru!" invitas lin la sinjoro patro.

Kiĉjo lamante timeme eniris kaj malferminte post si la pordon haltis malkuraĝe antaŭ ĝi.

"Kion diris sinjoro doktoro — vi diras, sinjoro patro?" ripetis palpebrumante la ŝtipforma kaj ĝibiĝinta knabaĉo, kies inflamitaj palpebroj ankoraŭ duone fermiĝadis, kaj poste aldonis decide:

"Mi ne scias. Mi ne estis ja en la urbo por la sinjoro doktoro..."

"Ah, mi scias, mi scias!" intermetis malpacience la sinjoro patro. "Sed ci ĉeestis, kiam sinjoro Floriano revenis posttagmeze el la urbo kaj rakontis, kiel li sukcesis ĉe la kuracisto. Mi volas scii, ĉu li diris, ke la kuracisto alveturos je la deka aŭ je la dekunua?"

"Je la deka, sinjoro patro!" ĝoje diris Kiĉjo, ke li povas servi iom la kolerantan sinjoron patron. "Li diris, ke plej poste ĉirkaŭ la deka li estos ĉe ni..."

"Sed la deka jam pasis!" rimarkigis la sinjoro patro.

Kiĉjo, rigardinte laŭ la ekzemplo de l' sinjoro patro, sed preskaŭ idiote, la horloĝon, daŭrigis:

"Sinjoro Floriano diris, ke la sinjoro doktoro povas forveturi el la urbo je la kvina posttagmeze. Kaj ĉar oni bezonas kvin horojn por atingi nin per la veturilo, do je la deka tute certe..."

"Mi scias, mi scias!" intermetis malpacience la sinjoro patro. "Kaj mi sendis jam antaŭ duonhoru la sinjoron Florianon sur la senarban deklivon al la tri krucoj, por ke li rigardu, ĉu la doktoro jam alveturas. Sed la sinjoro Floriano longe ne revenas. Kaj tial," li aldonis en la kategoria tono, "iru por vidi, kion li faras?"

"Mi?" ekbalbutis Kiĉjo vidigante subitan konsterniĝon.

"Nu, kiu alia?" rimarkigis bonanime la sinjoro patro. "Mi ne povas ja foriri de la infano. Kaj krom ni du estas neniuj en la domo."

"Mi — mi — sinjoro patro —?" ekbalbutis Kiĉjo denove, kaj poste pli kuraĝe aldonis:
"Mi ne povas..."

"Kial ci ne povas?"

"Mi, mi, mi ne vidas malproksimen..." senkulpigis sin Kiĉjo mallerte.

"Ne estas bezone, ke ci vidu. Sinjoro Floriano havas falkajn okulojn, kaj de la tri krucoj, kiam ekfulmas, oni vidas sur la ŝoseo en la malproksimon je unu horo. Li jam diros al ci..."

"Sed mi — mi, sinjoro patro..." komencis Kiĉjo en la tono ĉiam pli timema kaj kunmetinte la manojn li finis konsternite:

"Pro Dio mi petas vin — ne sendu min tien!"

"Al la diabloj, knabo, kio okazas kun ci?" kriis la sinjoro patro kun la kolera ekmiro.
"Ĉu ci freneziĝis?"

Kaj kun severa kategorieco li ordonis:

"En la momento estu post la pordo!"

"Pro la kompato de Dio, sinjoro patro," dolore ekĝemis Kiĉjo, falinte sur la genuojn antaŭ li, "ne sendu min! Mi — mi — timas."

"Malsaĝulo," respondis kolere la sinjoro patro. "Dum kvin jaroj li trakuras tage kaj nokte la arbarojn, ĉirkaŭ la ĉasdomo kaj nun subite li timas kuri al la tri krucoj al la sinjoro Floriano!... Leviĝu! Kaj — kuru! Aŭ mi cin..."

Kaj dume li etendis la manon, kvazaŭ li volus devigi iĉjon per Kla vangofrapo.

Morte timigita Kiĉjo provas leviĝi; sed lia konsterniĝo estas tiel forta, ke li tuj denove falas sur la genuojn kaj kun la mieno kaj gestoj de l' turmentito li balbutas:

"Pro la kompato de Dio — sinjoro patro — mi — mi timas..."

"Kion?" intermetis la sinjoro patro, mallaŭtigante senvole la ridon, "Ĉu eble proksimiĝas la uragano? Ankoraŭ ne falis eĉ unu guto. Kaj antaŭ ol komenciĝos pluveti aŭ ventegi — ci estos denove hejme. Aŭ ĉu ci timas fulmon — tondron?"

"Ne, ne! Tion mi ne timas..." respondas Kiĉjo pli memkonscie.

"Kion do? Parolu!"

"Mi — mi ne povas!" sonas la tremeganta respondo. "Kiel? Ĉu ci ne povas paroli?"

"Jes!" certigas Kiĉjo. "Mi ne povas paroli — mi ne devas..."

"Ci ne devas paroli? Kial ci ne devas?"

"Vi mem, sinjoro patro, malpermesis tion al mi...", respondis nun Kiĉjo malpli konsternita.

"Ah, tiu sensencaĵo?" deglitis al la sinjoro patro de la lipoj, kiu ĵus rememorigis sin, ke oni jam unufoje parolis pri tio.

"Oh! sinjoro patro, tio ne estis sensencaĵo!" oponis Kiĉjo. "La unuan fojon — eble... Sed mi — mi..."

Jen li haltis por la momento kaj poste aldonis decide:

"Antaŭ mi la nigra sinjorino aperis jam tri fojojn!"

"Ne balbutu!" ekkriis la sinjoro patro interrompante lin.

"Ne, ne, sinjoro patro!" ĵuris Kiĉjo. "La vivanta Dio en la ĉielo min vidas kaj aŭdas, ke..."

"Estas jam sufiĉe!" ekriis la sinjoro patro kaj akre ordonis: "Leviĝu!"

Kiĉjo obeis malkuraĝe kaj timeme ĉirkaŭrigardis.

"Kaj parolu!" ordonas plie la sinjoro patro.

"Kiel mi volis al vi, sinjoro patro," komencis malrapide Kiĉjo, "jam antaŭhierau rakonti..."

"Kaj mi interrompis cin post la unuaj vortoj, ke ci ne parolaĉu!" intermetis la sinjoro patro.

"Mi eliris," daŭrigis Kiĉjo ĉiam pli kuraĝe, "antaŭvespere kun malgranda Emaĉjo¹¹ — kiam li estis ankoraŭ sana kiel fiŝo — al la kaplo apud la fonto, post la unua senarbaĵo..."

"Kaj tie vi petolis, ĉu ne vere?"

"Jes, sinjoro patro, ni petolis!" konfesis sincere Kiĉjo.

"Mi faris tiel (dume li montris per gestoj, ke li estis ĉevalo kaj Emaĉjo la rajdanto) kaj — poste ni kaptadis papilietojn por li..."

"Kaj Emaĉjo kuradis kun ci!" intermetis la sinjoro patro en la tono de l' maldolĉa riproĉo.

"Ho ne, sinjoro patro!" certigis Kiĉjo. "Emaĉjo ne kuris. Li sidis en la herbo antaŭ la kaplo kiel kokideto kaj sekvis min sole per sia rigardo, kiel mi kaptas la papiliojn. Sed li rigardis iel malgaje — eble ĉi tiel (dume Kiĉjo mallevis la kapon kaj imitis la malgajan mienon de l' fizionomio de Emaĉjo) — ke mi kompatis lin... La papilietoj ne ĝojigis lin kiel alifoje, ĝis mi kaptis al li la papilion kun la mortkapo... Kaj kiam mi montras ĝin al Emaĉjo, Emaĉjo ĝoje eksaltis... Sed jen — mi ne scias, kiel kaj kial — li montris per la maneto malantaŭen... Kiam mi turnis min — hu! frosto trakuris mian dorson kaj la papilio elglitis al mi el la mano... En la densaĵo post la senarbaĵo — proksimume du cent paŝojn de ni — staris nigra sinjorino kaj ĉi tiel (dume li imitis la misterajn signojn) ŝi vokis nin per la signoj. Sed en tiu ĉi momento en nia ĉasdomo komencis la hundoj boji, kaj la nigra sinjorino malaperis..."

"Sed ĉi tion ci volis rakonti al mi jam antaŭhieraŭ!" rimarkigis la sinjoro patro, kiu aŭskultis pacience.

"Sed vi, sinjoro patro, malafable krie interrompis min, ke mi havis halucinacion — aŭ ke la sentoj min trompis — aŭ kio do... Kiam mi poste la samon rakontis al sinjoro Floriano, li mokis min. Li diris, ke tio estis neniu nigra sinjorino, sed iu virinaĉo kolektanta sekajn branĉojn aŭ fungojn aŭ fragojn... Sed tio ne povas esti! En la ĉirkaŭaĵo de nia ĉasdomo mi neniam vidis iun virinaĉon... Kiam mi diris tion al sinjoro Floriano, li rediris, ke mi povas konvinkiĝi, Li diris, ke — ironte denove en la arbaron — mi prenu kun mi iun hundon..."

"Kaj ĉu ci konvinkiĝis?" intermetis la sinjoro patro preskaŭ scivole.

"Jes, mi konvinkiĝis, mi konvinkiĝis!" certigis la knabaĉo kun la mistera teruro.

"Kaj kiamaniere — mi petas cin?" demandis sarkasme la sinjoro patro.

"Ĉi tiel, sinjoro patro!" ekparolis Kiĉjo pli kuraĝe. "Hieraŭ vespere, kiam vi sendis min al la vulpkavo, mi fajfe alvokis Dianon. Kaj ni kuradis tra la arbaro. Sed jen subite, mi ne scias kiamaniere, aperis la nigra sinjorino la duan fojon antaŭ mi... Kaj denove la frosto trakuris mian dorson — mi tremis, kvazaŭ mi havus febron. Sed

tamen mi jam ne ektimis tiel, kiel antaŭhieraŭ kaj mi instigis Dianon kontraŭ la nigra sinjorino..."

"Nu — kaj Diano?"

"Ĝi ekbojis kaj kvazaŭ furioza kuris al la densaĵo... Sed antaŭ ol ĝi atingis la lokon, kie staris la nigra sinjorino kaj vokis min per la signoj, la nigra sinjorino denove malaperis..."

"Sed Diano? Kion faris Diano, kiam malaperis la nigra sinjorino?" demandis pli scivole la sinjoro patro.

"Vi eĉ ne kredus, sinjoro patro!" respondis Kiĉjo kun la netrompebla certeco. "De la loko, kie malaperis la nigra sinjorino en la densaĵo, mi staris proksimume cent kaj duonon paŝojn kaj mi vidis tute bone tra la arboj kaj la densaĵo, ke Diano ĝoje saltas kaj kuras ĉirkaŭ io. Post la momento ĝi revenis al mi kaj flatis min, kvazaŭ ĝi estus trovinta iun konaton en la arbaro."

"Aŭ neniun!" rimarkigis la sinjoro patro, kiu kvankam aŭskultante atente tamen ne kredis. "Videble ankaŭ hieraŭ ci havis halucinacion, kiel antaŭhieraŭ."

"Ho, ne, ne! sinjoro patro — eterna Dio min aŭdas kaj vidas, ke mi parolas veron!" ĵuris Kiĉjo.

"Ne ĵuru!" admonis lin la sinjoro patro. "Malsaĝulo, kial ci prenis kun ci en la arbaron la bonan Dianon, kiu senĉese vagas libere kaj bojas preskaŭ neniun. Kial ci ne senĉenigis la furiozan Neron? Tiu certe ne saltadus ĝoje ĉirkaŭ la nekonata persono, se tiu estus efektive en la densaĵo."

Sed eĉ tiu ĉi kontraŭdiro ne embarasigis Kiĉjon.

"Eble, eble!" rimarkigis tiu ĉi ŝanceliĝe, sed tuj poste li aldonis decide:

"Sed kredu, sinjoro patro, ke eĉ la furioza Nero ne farus malbonon al la nigra sinjorino."

"Ĉu efektive?" ekmiris la sinjoro patro ne kredante. "Kial do?"

Tiun ĉi fojon Kiĉjo ne respondis la demandon rekte, sed iel malrekte, dirante:

"En la pasinta nokto la nigra sinjorino aperis antaŭ mi la trian fojon."

"Sed laŭ kio ci juĝas, ke eĉ la furioza Nero ne difektus ŝin?" insistis la sinjoro patro.

"Nu — mi ne scias tion!" respondis la demandito, vidigante videblajn embarasojn. "Sed en la pasinta nokto... Eble vi memoras, sinjoro patro, ke hodiaŭ en la nokto ĉiuj tri hundoj furioze bojis?... Ili vekis min... Mi leviĝis, por rigardi, kio okazas... Kaj kiam mi staras apud la fenestro kaj rigardas la korton — la luno estis post la nuboj — mi vidas en la duonlumo, ke sur la tordolinia roka vojeto de la tri krucoj — sur la senarba deklivo kuras iu ombro... Post la momento ŝtelproksimiĝis tiu ombro al la posta pordeto en la barilo, kaj mi ekvidis la nigran sinjorinon — la trian fojon... La frosto trakuris mian dorson. Mi volis ekkrii, sed mi ne povis. Kaj mi staris tiel kvazaŭ ŝtoniĝinta kaj rigardis la korton... La bojado de l' hundoj ĉesis — ankaŭ Nero, kiu antaŭe minacis disŝiri la ĉenon — silentiĝis... Poste mi vidis, ke la nigra sinjorino ŝtelproksimiĝis ĝis tien ĉi — al tiu ĉi fenestro (dume montris Kiĉjo la grandan fenestron rigardanta la korton, tra kiu oni povis vidi el la ĉambro ĝis la tri krucoj sur la senarba deklivo) kaj rigardis internen..."

La sinjoro patro estis konvinkita, ke estas tute neeble, ke fremdulo povu en la nokto ŝtelproksimiĝi en la korton kaj al la fenestro — ĉar en la korto tute libere kuras du hundoj kaj la tria, plej furioza, estas ligita al la ĉeno apud la pordo, tra kiu, laŭ la rakonto de Kiĉjo, la nigra sinjorino eniris la korton. Sed malgraŭ tio tamen li demandis ankoraŭ Kiĉjon:

"Kaj kion ci vidis plie? Kiel kondukis la nigra sinjorino?"

"Nu — ŝi malaperis," respondis la demandito kun la konvinka certeco, "same, kiel ŝi estis aperinta — kiel ombro..."

Nur post tiu ĉi lasta eldiro la sinjoro patro tute konvinkiĝis, ke ĉi tie estis ia optika trompo; aŭ ke Kiĉjo havis ian halucinacion.

"Jen ci vidas, ci havis ja denove halucinacion!" li rimarkigis bonkore, "aŭ la hazarda bojado de l' hundoj vekis cin el la profunda dormo kaj en la dormemo ŝajnis al ci, kvazaŭ ci estus vidanta —"

"Ho, ne, ne, sinjoro patro — eterna Dio vidas kaj aŭdas min, ke mi parolas la veron!" intermetis Kiĉjo kaj ripetis la certigon: "La nigra sinjorino aperis antaŭ mi jam trian fojon — trian fojon —"

"Eh, sensencaĵoj!" grimacis la sinjoro patro, kiun jam lacigis la babilado de l' knabaĉo pri la optika trompo.

"Sed nun estas nenia helpo!" li aldonis kategorie. "Ci devas iri por vidi, kion faras sinjoro Floriano."

Kiĉjo, kiu rekonsciiĝis iom dum la interparolo, post tiu ĉi ordono denove konsterniĝis.

"Pro la kompatato de Dio — sinjoro patro!..." li ekĝemis, kunmetante denove la manojn.

"Timemulo! Rigardu!" diris la sinjoro patro admone kaj preninte la knabaĉon je la mano, trenis lin al la fenestro, rigardanta la korton. "Rigardu! Kiam ajn ekfulmas, oni vidas de tie ĉi ĝis la tri krucoj sur la senarba deklivo. Kaj se ci prenos kun ci la hundon, ĝi flarsentos la homon kaj — se ci volas — ankaŭ la nigran sinjorinon je kvin cent paŝoj..."

"Dianon kaj Vulkanon havas sinjoro Floriano!" kontraŭdiris ŝanceliĝe Kiĉjo esperante, ke la sinjoro patro tamen moliĝos.

"Senĉenigu Neron!" ordonis la sinjoro patro.

"Ne, ne, sinjoro patro!" ekĝemis konsternita Kiĉjo. "Mi — mi..."

Sed li ne finis la balbuton. Lia natura kaj tamen tiel ridinda timo fine indignis la sinjoron patron.

"Sufiĉe," li kriis kun tiel kategoria severeco, ke estis neeble plu kontraŭstari. "En la momento estu post la pordo!"

Kiĉjo, tremante per la tuta korpo kaj vidigante mortan timon, ŝteliris timeme al la pordo.

"Kaj tie ĉi — prenu ĉi tiun ĉevaltukon!" diris la sinjoro patro. "Se pluvegus... Mi pensas, ke jam gutas."

Kiĉjo ŝtelirante revenis, prenis la ĉevaltukon, ĵetitan sur la apogilo de la proksima seĝo, metis ĝin sur la kapon kaj ŝtelirinte al la pordo, malfermis ĝin kaj klakante per la dentoj eliris en la korton.

Sinjoro patro, kiu nube silentante rigardis la konduton de Kiĉjo, aliris al la sojlo de l' malfermita pordo por vidi, kion faras la knabaĉo.

Sed pro la tuta mallumo li vidis nenion. Post la momento li ekaŭdis la ektinton de la ĉeno, poste la ĝojan ekbojon kaj fine la furiozan bojadon de granda hundo.

Juĝante laŭ tio, ke Kiĉjo plenumis lian ordonon, li kriis en la mallumon:

"Tiel, Kiĉjo, tiel!"

Kiam ekfulmis poste, kaj la sinjoro patro vidis, ke Kiĉjo jam foriris kun la hundo, li kriis ankoraŭ unufoje:

"Kiĉjo! Kiĉjo! Ne iru sur la vojo por la veturiloj! Iru renkonte al sinjoro Floriano sur la roka vojeto!"

Kaj vidante ĉe la plej proksima ekfulmo, ke Kiĉjo plenumis ankaŭ tiun ĉi ordonon, li cedis, fermis la pordon kaj enprofundiĝinte en la pensojn li aliris al la tablo kaj apogis la manon sur unu ĝia ekstremaĵo...

La duonridinda sceno, dum kiu la sinjoro patro por kelke da minutoj estis forgesinta la staton de l' aferoj en la domo, preskaŭ subite ĉesis interesi lin.

Momenton li staris sendecide, fikse rigardante la plankon rekte antaŭ si. Subite, levinte la kapon, li turnis ĝin al la horloĝo.

"Kiel limake trenas sin tiu tempo! Ĉiu sekundo fariĝas minuto!" trakuris en lia cerbo.

En tiu momento ekstere la ventego surde ekbruis, kvazaŭ de malproksime estus alveturanta veturilo.

La sinjoro patro momenton streĉe aŭskultis kaj konvinkiĝinte, ke la vento sole ekĝemegis, denove enprofundiĝis en la pensojn.

Sur la vizaĝo de l' maljuna viro denove aperis la maltrankvila zorgemo.

"Bedaŭrinda, bedaŭrindega infano!" li diris mallaŭte. "Ĝi kuŝas senmove — kvazaŭ ĝi dormus trankvile... Kaj dume... Oh, kia pena leviĝado de la brusteto kaj kia malfacila, fajfanta spirado!... — Ah, Dio, Dio — preskaŭ ŝajnas al mi, ke ĝi kuŝas jam mortanta — en ridigeo..."

En tiu momento post la pordo de l' koridoro, el kiu antaŭ kelka tempo estis ŝanceliĝe alveninta la dormema Kiĉjo, eksonis surda sono, kvazaŭ iu en la mallumo singarde palpanta homo estus kunpuŝiĝinta kun io.

La sinjoro patro klinita super la tablo, rektiĝis kaj ekrigardis al la nomita pordo.

Sen embarasoj li aliris al la pordo, malfermis ĝin kaj demandis en la mallumon:

"Kiu estas ĉi tie? Sinjoro Floriano, ĉu vi estas ĉi tie?"

Anstataŭ respondo eksonis la pene mallaŭtigata ekĝemo el la malluma koridoro.

"Kio okazis? Kial vi malrapidas?" demandis rapide kaj kun la modera ekmiro la sinjoro patro, rekoninte Florianon laŭ la ekĝemo.

Kaj ne atendante la respondon li alpaŝis al la tablo, prenis de ĝi la lampon kaj eklumigis la koridoron.

"Kio okazis?" li ekmurmuris surprizite. "Sinjoro Floriano sur la tero?"

Starigante la lampon sur la seĝon apud la pordo, li diris mallaŭte:

"Atendu, atendu! Mi helpos vin!"

Poste li eniris la koridoron, sed tuj denove revenis en la ĉambron; dume el la koridoro eksonis tremeganta malagraba vira voĉo, akcentiganta pene kelkajn silabojn:

"Ah — mi dankas, sinjoro patro — estas jam bone... En la mallumo iel mi sole ekŝanceliĝis..."

Dume, kiam la sinjoro patro, preninte la lampon de l' seĝo apud la pordo starigis ĝin denove sur la tablon — eniris — ĝuste ŝanceleniris — el la koridoro en la ĉambron viro ĉirkaŭe kvardekjara, malgracia, de nesimpatia fizionomio, havanta sur si simplan veston de l' arbara adjunkto.

Lia dekstra vango kaj la ambaŭ manoj estis sangmakulitaj; la vesto kaj la ĉapelo malpurigitaj de la koto, kvazaŭ ili estus rulantaj en ĝi.

Se oni ne vidus laŭ lia mieno, ke li kaŝas doloron per ĉiuj fortoj, oni povus juĝi, ke la homo estas tute ebria.

Kiam la viro eniris, ekparolis la sinjoro patro ankoraŭ duone turnita de li:

"Antaŭ la momento mi sendis Kiĉjon, sinjoro Floriano, al la tri krucoj. Sed dume vi estas jam tie ĉi!"

Turninte sin al la alveninto kaj rimarkinte lian bedaŭrindan situacion, li ekmiregis:

"Pro Dio, kio okazis? Ĉu vi..."

"Nenio, tute nenio!" respondis murmurante la sinjoro Floriano, kies maldekstra vango estis turnita al la sinjoro patro. "Sinjoro doktoro — jam alveturas..."

"Efektive?" rimarkigis kontente la sinjoro patro kaj kun la zorgema ekmiro demandis:

"Sed kio okazis al vi?"

"Nenio, tute nenio, sinjoro arbaristo!" senkulpigas sin Floriano, poste interrompe kaj tremegante li raportas:

"Post kelke da minutoj la sinjoro doktoro estos ĉi tie. De la roka balkono — ĉirkaŭe tri cent paŝojn de la tri kruoj — mi ekvidis — tri fojojn, kiam ekfulmis, la proksimiĝantan veturilon..."

"Mi dankas vin, sinjoro Floriano! Sed kio okazis al vi?"

"Nenio, tute nenio!" ripetas la demandito, unutone akcentigante kelkajn silabojn, kvazaŭ por la klara el parolado mankus al li la sufiĉa nombro da antaŭaj dentoj.

Samtempe li volis ekiri; sed li sole ekŝanceliĝis.

"Vi ŝanceliras! Kio okazis al vi?" insistis zorgeme la arbaristo.

"Nenio, tute nenio!" murmuris kun la laciga unutoneco la sinjoro Floriano kaj volis aldoni ion; sed li diris sole kelke da vortoj:

"Sinjoro doktoro sendube..."

Ĉe tiuj ĉi vortoj li turnis sin al la arbaristo tiamaniere, ke tiu ĉi ekvidis lian sangmakulitan vizaĝon kaj interrompis lian parolon per la vortoj:

"Vi estas ja ne sole malpurigita de la koto, sed ankaŭ sangmakulita..."

"Jes, mi estas sangmakulita..." ripetis apatie la sinjoro Floriano, rigardante siajn sangmakulitajn manojn.

"Ĉu vi faletis?" demandis komplete la arbaristo.

"Ne, ne!"

"Kio do okazis? Parolu!"

"Mi falis de la roka balkono!" konfesis fine kun la vira honto la sinjoro Floriano.

"Sed tio tamen estas ne klarigebla!" kontraŭdiris la arbaristo. "Dum la momentoj, kiam ekfulmas, estas ekstere preskaŭ tiel lume, kiel dum la tago. Kaj vi, viro tiel singarda, lerta, kiu ankaŭ en la tuta mallumo..."

Tiel parolante li proponis per gesto al li la seĝon, mem starante.

"Kaj tamen tiel okazis!" ekmurmuris la sinjoro Floriano, sidiĝante pene sur la seĝon.

"Sed kiel — kiel tio povis okazi? Klarigu al mi tion!"

"Mi ektimis!" sincere konfesis la sinjoro Floriano.

"Kiel? Vi, viro tiel forta, kuraĝa —"

"De l' teruro kaj konsterniĝo mi perdis por la momento la konscion!" konfesis la ŝajne kuraĝa arbara adjunkto.

"De l' teruro kaj konsterniĝo?" ekmiris la arbaristo, nekredante la propran aŭdsenton.

"Jes, sinjoro patro... Kial mi ne dirus la veron?..."

"Kaj kia estas la kaŭzo?" demandis subite la arbaristo kun la akra severeco. "La tuja perdo de l' sentoj — la teruro kaj la konsterniĝo — ĉio tamen devis havi ian kaŭzon."

"Kompreneble!" respondis firme la sinjoro Floriano. "La sango rigidiĝis ĉe tio al mi..."

Poste kvazaŭ konsiderante, ĉu konfesi ĉion aŭ ne li aldonis:

"Antaŭ mi, sinjoro arbaristo — kial mi ne dirus tion — simile kiel antaŭ Kiĉjo — aperis la nigra sinjorino..."

La efiko de tiuj ĉi vortoj estis tiel eksterordinara, ke la arbaristo rigidiĝis, kvazaŭ oni estus komunikinta al li raporton tute neatenditan.

"Ĉu ankaŭ vi, sinjoro Floriano?" li ekriis kun la malafabla severeco kaj maldolĉa riproĉo. "La viro, kiu kun mia mortinta filo dum pli ol dudek jaroj tage kaj nokte trairadis ĉiujn ĉirkaŭajn arbarojn, profundaĵojn kaj intermontojn — ĉu ankaŭ vi kredas tian malsaĝan fabelon, kiel la malsaĝa Kiĉjo?"

Sed eĉ tiu ĉi akra riproĉo ne detimigis la arbaran adjunkton.

"Mi ne kredas, sinjoro patro!" li respondis serioze kaj en la tono tute konvinka. "Sed estas malfacile ne kredi, kiam la homo per siaj propraj sentoj — konvinkiĝis."

"Kaj ĉu vi konvinkiĝis?" intermetis grimace la arbaristo. "Kaj kiamaniere, mi petas vin — kiamaniere?"

"Mi ĉion rakontos simple kaj sincere!" komencis la konfeson la sinjoro Floriano. "Kiam starante sur la ŝtona balkono mi ekvidis en la malproksimo la alvenantan veturilon, mi volis konvinkiĝi ankoraŭ la trian fojon. Tenante la manplatojn super la okuloj mi fikse rigardis la lokon, kie ĝi ĵus povus esti, kaj mi atendis la ekfulmon. Post la momento efektive ekfulmis, du fojojn. Unue mi ekvidis la veturilon kaj la alian fojon, hazarde rigardinte al la tri krucoj, mi vidis en la interspaco de du cent paŝoj tute klare, ke apud la meza kruco leviĝis nigra staturo de l' virino kaj — kiu etendis la manojn..."

"Halucinacio, simpla halucinacio!" kontraŭstaras la arbaristo kun la glacia trankvilo. "Ĉu vi ne havis hundojn?"

"Mi havis Dianon kaj Vulkanon — ambaŭ ligitajn al unu rimeno. Kaj mi konfesas — la ambaŭ hundoj jam antaŭ la momento flarsentis ion..."

"Kaj ĉu vi instigis ilin kontraŭ la teruriga fantomo por konvinkiĝi, ĉu tio ne estas simpla halucinacio?"

"Mi ne instigis ilin..."

"Nu, jen vi vidas!" intermetis kun la kontentiĝo la arbaristo.

Sed la sinjoro Floriano ekskuis la kapon, dirante:

"La hundoj elŝiris sin el mia mano..."

"Nu, kio okazis?"

"Kaj furioze bojante ili kvazaŭ vetkuris al la tri krucoj..."

"Kaj kio poste?"

"Ĉirkaŭe regis tuta mallumo!" komencis la sinjoro Floriano konfesi la ĉefan kaŭzon de sia konsterniĝo. "Mi aŭdis sole la bruadon de l' vento kaj la bojadon de l' hundoj. Subite la bojado moderiĝis kaj post la momento tute ĉesis. Kaj kiam poste denove ekfulmis post kelke da sekundoj, mi ekvidis apud la meza kruco duone leviĝintan, malluman staturon de l' virino kaj apud ŝiaj piedoj sur la ventroj rampantajn ambaŭ

hundojn. Kaj nur en tiu ĉi momento tiel atakis min la teruro, ke forgesinte, kie mi staras, senvole mi cedis kaj falis en la densaĵon en la profundaĵo sub la roko."

"Kaj kion faris la hundoj? Ĉu ili restis apud la tri krucoj?" demandis la arbaristo nekredante ankoraŭ, kiam la sinjoro Floriano finis sian simplan rakonton.

"Kiam post pli longa tempo mi rekonsciiĝis," respondis la adjunkto, "mi aŭdis ilin vagi ĉirkaŭ mi. Mi ekfajfis — kaj ambaŭ alkuris al mi..."

"Kaj ĉu vi ne iris poste al la tri krucoj?"

"Mi eĉ ne ekpensis pri tio!" konfesis la sinjoro Floriano. "De la teruro mi estis preskaŭ sen konscio kaj tiel vundita falinte de la roko, ke neniigante la doloron sole kun peno mi atingis la ĉasdomon kaj falis ankoraŭ en la malluma koridoro."

"Nu, tiel, kara sinjoro Floriano!" konvinke kaj bonkore respondis la arbaristo. "Fine ni alvenis feliĉe — al io saĝa."

"Kion vi pensas, sinjoro patro?"

"Se vi tuj sekvus la ambaŭ hundojn al la tri krucoj, vi konvinkiĝus tute certe, ke tio — kio ŝajnis al vi malluma staturo virina — estis sole simpla halucinacio. Kion vi pensas?"

Tiuj vortoj estis parolataj kun tiel serioza konvinko, ke fine la sinjoro Floriano mem komencis dubi pri la mistera fantomo.

"Estas eble!" estis ĉio, kion li diris en la tono de l' homo duone konvinkita.

"Nu tiel!" diris kontente la arbaristo, kaj poste aldonis zorgeme:

"Sed nun, kara sinjoro Floriano, rapidu lavi vin kaj kuŝiĝu! — Mi ne bezonas plu viajn servojn. Kiĉjo, kiam li ne trafos vin apud la tri krucoj, revenos post la momento kaj faros, kio estos necesa."

La arbaristo preninte de la tablo la lampon, lumigis al li la koridoron kaj post la momento diris al li en la tono de l' bonkora intimeco:

"Se vi bezonas ion, sinjoro Floriano, komuniku tion al mi!"

La arbaristo ferminte la pordon post sia foririnta adjunkto, alproksimiĝis ŝtelirante al la tablo kaj stariginte sur ĝin la lampon, enprofundiĝis en la pensojn.

En lia cerbo turnis sin pensoj, kiuj estis en la plej granda rilato kun la alveturo de la kuracisto.

Unue li ekpensis, ke fine proksimiĝas la decida momento, kiam li sciiĝos pri la malsano de l' infano, ĉu ĝi estas resanigebla aŭ ne.

Kaj mirinde.

Antaŭ la momento li deziris ankoraŭ, ke la kuracisto estu jam ĉi tie kaj diru pri la malsano sian sinceran opinion — sed nun kiam la kuracisto estas jam sole kelkcenton da paŝoj de la domo, ŝajnas al li, la turmentato de la zorgoj, ke alveturas ne la konsolanto, sed la demono, kiu ŝanĝos la doloran, sed tamen ankoraŭ esperdonan, kvankam ŝajne, malcertecon per unu vorto, per unu gesto en la neniigeblan senesperon.

Dume preskaŭ senvole li ŝteleniris en la malantaŭon kaj de la interspaco de kelke da paŝoj rigardis la infanon kuŝantan sur la lito kaj kvazaŭ jam mortantan.

"Sed kial — kial mi estas tiel alligita al tiu ĉi kreitaĵo?" li ekpensis. "Kio estas por mi tiu ĉi bedaŭrinda, apenaŭ kvinjara vermeto kun la malpreciza spirita fizionomio anstataŭ la matura filo, kiun mi edukis mem, kun kiu mi vivis sub unu tegmento pli longe ol kvardek jarojn, kiu dum tiu longa tempo estis ne sole bonega filo, sed ankaŭ mia bonega amiko — kaj super kies sangmakulita kadavro tamen mi ne ellasis eĉ unu larmon?..."

Kiel klarigi, ke mia koro ne kunpremiĝis eĉ unufoje ĉe la plej terura katastrofo, kiu povas trafi la patron; ke mi staris kun la nuba obstino kaj la maldolĉe dolora rezignacio apud la kadavro de mia filo kaj apud lia tombo, kaj kontraŭe ke ĉe la simpla ekpenso pri la suferanta nepo ŝajnas al mi, kvazaŭ jam jam la larmo eniĝas en mian okulon?..."

Li turnis sin rapide de la lito kaj ŝtelirante denove al la tablo en la antaŭo li meditis:

"Sed tiaj estas preskaŭ ĉiuj homoj," li ekpensis. "Nian spiritan staton aŭ la humoron ni scias kompreni almenaŭ malklare, sed la ĉefa kaj propra kaŭzo tamen restas por ni enigmo... Sen la bonega filo, kun kiu dum longaj tempoj mi kune ĝuis ĉiujn plezurojn kaj dolorojn de la vivo, mi vivas kaj povas vivi, kvankam en la rememoroj plej doloraj. Sed se la kruda sorto forrabus al mi tiun ĉi lastan kreitaĵeton, vere — mi ne scias..."

En tiu momento li estis interrompita en siaj meditadoj.

Ekstere, aŭ en la korto aŭ antaŭ la korto, eksonis ekkrio, kvazaŭ iu terurigite kaj konsternite krius helpon.

La arbaristo streĉe aŭskultis kaj kiam post kelke da sekundoj la ekkrio ripetiĝis, li ekpensis, ke eble Kiĉjo krias.

Rapide li alpaŝis al la fenestro kaj rigardis la mallumon.

Kaj ankaŭ kiam ekfulmis post ne longe, li rimarkis neniajn postesignojn de Kiĉjo.

Sed jen subite malfermiĝis la pordo, kaj en la ĉambron enkuris Kiĉjo — kun la malseka ĉevaltuko sur la kapo kaj la mieno de nesuperebla teruro.

Tremante per la tuta korpo li rigardis ĉirkaŭ si.

"Kio estas?" alparolis lin trankvile kaj kun la akra akcento la arbaristo.

"Pro la kompatato de Dio, sinjoro patro — sinjoro patro..." tremante parolis Kiĉjo; sed li tuj haltis vidigante mortan timemon.

"Kio okazis?" demandis pli severe la arbaristo, proksimiĝinte je kelke da paŝoj al la knabaĉo.

"Ah, sinjoro patro —" balbutis Kiĉjo tremante, "apud la tri krucoj — mi — mi — bedaŭrinda Nero — oh!"

Post ĉi tiuj vortoj li falis kvazaŭ senkonscie teren; sed tuj poste li denove leviĝis kaj rigide rigardis tra la pordo, kiun li ne estis ferminta, en la mallumon.

En tiu momento ekfulmis kaj samtempe de malproksime estis aŭdata la ekbojo de l' hundo.

"Nero estas proksimume cent paŝojn de la ĉasdomo. Mi rekonas ĝin laŭ la ekbojo!" rimarkigis la arbaristo. "Kion ci do balbutas?"

Kaj imperative li aldonis:

"Almenaŭ fermu la pordon!"

"Fermu — fermu!" balbutis Kiĉjo, klakante per la dentoj kaj ĉirkaŭrigardante, kvazaŭ li ne estus kompreninta.

La arbaristo alpaŝis mem al la pordo kaj kolere ferminte ĝin ekrigardis kun la nuba severeco Kiĉjon, kiu etendante la manojn balbutis ian sensencaĵon.

Poste svinginte kolere la manon, mallaŭtigite sed kategorie li ordonis:

"Nun parolu! Aŭ —"

Kiĉjo cedis kaj eligis la okulojn.

"Ĉu denove — la nigra sinjorino?" moke rimarkigis la arbaristo.

Kiĉjo — klakante per la dentoj — senparole jesis per la kapo; kaj poste pli kompreneble komencis:

"Oh, sinjoro patro — se vi estus — vidinta..."

"Nu, kion?"

"Kiam mi estis proksimume cent paŝojn de la tri krucoj," daŭrigis Kiĉjo, "ekfulmis neatendite kaj — la nigra sinjorino aperis — ĵus apud la meza kruco —"

"Kaj kion faris Nero?" demandis insiste la arbaristo. "Per kelkaj saltoj ĝi atingis la nigran sinjorinon kaj komencis flati ŝin" — raportis Kiĉjo kaj tremante aldonis

"Oh, sinjoro patro — se vi estus — vidinta..."

"Kaj ĉu ci forkuris?" ekridis la arbaristo.

Kiĉjo jesis sincere kaj senembarase, sed poste kun la mieno de l' konsterniĝo aldonis:

"Kaj kiam mi min turnis preskaŭ apud la ĉasdomo, mi vidis, ke la nigra sinjorino iras sur la vojeto post mi..."

"Ĉu vi freneziĝis ambaŭ? Ci kaj la sinjoro Floriano —" rimarkigis kolere la arbaristo.

"Ĉu sinjoro Floriano — ankaŭ —?" demandis Kiĉjo mirigite.

En tiu momento estis aŭdata de ekstere la malklara bruo de l' proksimiĝanta veturilo, kio igis la arbariston fari la konforman ordonon.

"Estas jam sufiĉe da balbuto. Nun iru kaj zorgu pri la hundoj; por ke ili ne boju, kiam la kuracisto enveturos en la korton —."

Kiĉjo denove vidigante la konsterniĝon haltis kvazaŭ konfuzita.

"En la momento estu post la pordo!" komandis la arbaristo kun plej granda severeco, sed tuj aldonis pli modere:

"La pordon lasu malfermita!"

Nur poste Kiĉjo malrapide obeis kaj malaperis en la mallumo en la korto.

La arbaristo poste alpaŝis al la sojlo de l' malfermita pordo kaj rigardante la mallumon li demandis:

"Nu, kio? Ĉu estas iu tie ĉi?"

"Nenie — neni!" respondis Kiĉjo per timigita voĉo el la mallumo.

"Nu, ci vidas — ke tio estis denove simpla halucinacio!" trankviligis Kiĉjon la arbaristo. "Ĉu ci ne aŭdas, ke Nero vagas ie apud la pordo?"

Kiĉjo ekfajfis, kaj poste estis aŭdataj la kurado kaj la tintado de l' ĉeno.

"Sed nek fermu, nek alligu Neron. Restu kun ĝi, ĝis kiam la sinjoro doktoro estos enirinta en la ĉambron.

Poste lasu Neron vagi denove libere kaj revenu ĉi tien — ĉu ci komprenas?"

"Mi komprenas, sinjoro patro!" respondis Kiĉjo duonlaŭte, okupante sin ekstere per Nero.

Preskaŭ en la sama momento silentiĝis ankaŭ la malklara bruo de l' alveturanta veturilo. Laŭ ĉio la avizita kaleŝo kun la kuracisto enveturis en la korton kaj haltis...

La arbaristo ne ferminte la pordon, kondukantan al la korto, aliris al la tablo, prenis la lampon kaj rapide foriris en la koridoron renkonte al la kuracisto.

Post kelke da sekundoj en la koridoro aperis la kuracisto, akompanata de la koĉero en malseka mantelo.

"Bonan vesperon, sinjoro arbaristo — se mi memoras, sinjoro Podhradský¹²..." diris la kuracisto enirante.

"Via servanto, sinjoro doktoro!" respondis la arbaristo starigante sur tablon la lampon, per kiu li lumigis la koridoron antaŭ la alveninto.

"Tiel, Marteno!" turnis sin la kuracisto al la koĉero. "Ne maljingu la ĉevalojn — sendube ni tuj denove forveturos."

"Estos plej bone," rimarkigis la arbaristo, "se vi enveturos en la veturilejon antaŭ la ĉasdomo, por ke la ĉevaloj estu ŝirmitaj kontraŭ la pluvo."

La koĉero metis la mankofreton, kiun li portis, sur la seĝon kaj malproksimiĝis senparole.

Antaŭ lia foriro alvokis la arbaristo Kiĉjon, kiu laŭ ĉio spionis la alvokon apud la malfermita pordo. Li englitis kiel angilo en la ĉambron, fermis la pordon, riverencis antaŭ la kuracisto laŭ la signo de l' arbaristo kaj foriris post la koĉero.

La kuracisto, forta, meztalia sesdekjarulo kaj kun la serioza, preskaŭ malĝoja mieno, staris dum kelke da momentoj sen kia ajn intereso.

"Volu pardoni, sinjoro doktoro," ekparolis la arbaristo, kiam li estis sola kun la kuracisto, "ĉar en tiel maloportuna tempo kaj dum tiel malbela vetero —"

"La devo estas plej grava!" rediris la doktoro. "Ni kuracistoj estas kutimintaj al pli malbonaj malagrablaĵoj. Unue mi devas peti pardonon de vi, sinjoro Podhradský, ĉar mi ne forveturis tuj al vi. Por iom da tempo detenis min la neprokrastebla kaj samtempe danĝera operacio, per kiu estis savita la vivo —"

Sed li ne finis la parolon kaj interrompis sin mem per la demando:

"Sed kie estas la paciento?"

Alpaŝinte poste al la infanlito li rimarkigis kun la glacia trankvilo:

"Sendube la difterito..."

"Sed sen la febro, sinjoro doktoro —" aldonis la arbaristo, ŝtelirante maltrankvile post la kuracisto.

"Jes — sen la febro!" ripetis la kuracisto unutone. "Eble ankaŭ anĝino... Nu, ni vidos!"

"Vi eĉ ne kredus, sinjoro Podhradský, kiel mi estis mirigita de via sendito," aldonis pli vigle la kuracisto.

"Kiamaniere, mi petas?"

"Kiam li eniris kaj elbalbutis kelke da vortoj, mi konjektis, ke mi havas antaŭ mi iun sentaŭgulon..."

"Kompreneble — tian impreson faras ĉiam la sinjoro Floriano en la unuaj momentoj."

"Sed en kelke da minutoj mi konvinkiĝis," daŭrigis la kuracisto, "ke li estas viro inteligenta. Li komunikis al mi la simptomojn de l' malsano kun tiel detala ĝusteco, ke mi tuj rekonis diferiton aŭ anĝinon."

"Volu ne miri, sinjoro doktoro!" klarigis Podhradský. "En la solejoj, kia estas la nia, estas libro la plej fidela amiko. La sinjoro Floriano estas en la liberaj horoj, precipe dum la longaj vintraj vesperoj preskaŭ tia diligenta, persistema kaj pasia leganto, kia estis mia filo."

"Nu, ni vidos, ĉu via diagnozo estis ĝusta!" rimarkigis malvarme la kuracisto, alpaŝis poste al la infanlito, rigardis explore la infanon, ekzamenis la pulson kaj kliniĝinte super ĝi explore aŭskultis.

"La diagnozo estis ĝusta," li raportis post la mallonga paŭzo. "La tuta faringo estas brulumita — la spiro interrompe fajfanta — la pulso malforta —"

"Kaj ĉu oni povas esperi — sinjoro doktoro —?" demandis la arbaristo kun la plej dolora mieno.

La kuracisto denove levis la ŝultrojn.

"Vi estas viro inteligenta, sinjoro arbaristo," ekparolis poste la kuracisto, "mi ne havas la kaŭzon kaŝi antaŭ vi la eblan katastrofon; la infano estas jam preskaŭ senĉese sen konscio..."

"Pro la kompato de Dio!" ekĝemis Podhradský atakata de la doloro.

"Sed tamen oni povas esperi, ĝis la spiro ne ĉesos tute," rimarkigis trankviligante la kuracisto. "Ni provos nun la lastan medikamenton — la plej fortan!"

La arbaristo, vidigante la dispremitecon, eksvingis senparole la manojn.

"Ni ne devas plu prokrasti eĉ unu momenton!" rimarkigis la kuracisto, poste rapide aliris al la seĝo en la antaŭon, sur kiun la koĉero estis metinta la mankofreton, malfermis ĝin, elprenis botelon kun medikamento kaj denove revenis al la infanlito.

Doninte la medikamenton al la infano, rimarkigis la kuracisto:

"Se ni ne sukcesos en la plej mallonga tempo per la ĝenerala incito de jam senfortigita organismo liberigi la traĥeon de la sufokanta muko, tiam restos sole — la operacio..."

"Operacio?" ripetis Podhradský malklare, kvazaŭ li ne estus kompreninta la sencon de l' vorto.

"Por tiu celo la infano devus esti transportota en la urban malsanulejon —" aldonis la kuracisto.

"Ol permesi la infanon kripligi por ĉiam —" intermetis la arbaristo kaj kun la pasia forteco aldonis: "Ne, ne — neniam!"

La kuracisto levis la ŝultrojn.

"Cetere, sinjoro Podhradský," li ekparolis, "mi diros al vi sincere la veron — la stato de l' infano estas plenmezure kriza. La infano estas jam tiel senfortigita, ke ankaŭ la lasta rimedo ŝajnas al mi tute vana. La infano povus facile morti al ni sub la tranĉilo."

"Kion do fari?" ekĝemis malespere la maljunulo.

"Ĉar la naturo ofte faras miraklojn, kiujn neniuj atendis," ekparolis denove la kuracisto, "kaj la ebleco de l' subita ŝanĝo estas ĉiam atendebla, restas nenio alia, ol — atendi trankvile kaj konfidante la resanigantan forton de l' naturo. Lasu, sinjoro arbaristo, la infanon nun al ĝia neniigebla sorto kaj samtempe kiel viro preparu vin ankaŭ al la katastrofo!..."

"Oh!" ekĝemis la arbaristo kun la plej dolora mieno kaj ekŝanceliĝis.

La doktoro rigardis lin momenton kun trankvila kompato; poste li diris:

"Se vi permesos, sinjoro arbaristo, mi atendos tie ĉi ankoraŭ kelkan tempon, por ke mi konvinkiĝu pri la efiko de la lasta medikamento. Se la efiko ne venos aŭ se ne aperos almenaŭ ĝiaj simptomoj post la duonhoru, tiam kia ajn helpo estos tute vana."

Dume la ambaŭ interparolantaj viroj ne rimarkis, ke ekstere la uragano fariĝas ĉiam pli furioza.

Fulmoj kaj tondrado alternis ĉiam pli rapide kaj pli forte. Ifoje ankaŭ la forta ventego alpremiĝis al la fenestroj kaj la forta pluvego vipis ilin kvazaŭ hajlo.

Post la lastaj vortoj de l' kuracisto vidigis la arbaristo fortan animan eksciton kaj samtempe la penon neniigi ĝin.

Kaj meditante, kvankam kun la akcento treege dolora li diris:

"Kontraŭ la sensenta naturo estas neniam rimedo — kaj plej malmulte imponas al la naturo la doloro, eĉ la plej malespera... Ni ĉiuj estas sub ĝia potenco —"

"Jes, kompreneble — ĉiuj!" intermetis maldolĉe la doktoro. "Kvankam mi mem ne estis indulgita de similaj katastrofoj..."

"Ĉu ankaŭ vi, sinjoro doktoro!" demandis komplete la arbaristo.

Dume la kuracisto sidiĝis en la apogseĝon, turninte la dorson al la pordo, kondukanta al la koridoro kaj rigardante la grandan fenestron al la korto.

Ankaŭ la arbaristo ekiris senparole, sed ŝanceliĝe al la tablo kaj sidiĝis en la seĝon rekte kontraŭ la doktoro tiel, ke per sia korpo kovris al li parton de l' fenestro.

Momenton daŭris la turmenta silentado.

Fine la kuracisto, dezirante interparoli, komencis paroli:

"La ĉirkaŭaĵo estas ĉarmoriĉa. Mi estis ankoraŭ neniam ĉi tie. Sed kiam mi alveturadis kaj al apartaj, kvankam nesufiĉe fortaj fulmoj lumigis ifoje la pejzaĝon, mi devis konfesi, ke mia filo estis prava priskribante iam al mi la pejzaĝon kiel veran paradizon..."

"Sinjoro filo?" rediris la arbaristo sen kia ajn intereso, fikse rigardante la pordon kondukantan al la koridoro.

"Jes," respondis la kuracisto. "En la pasinta aŭtuno li estis ĉi tie — invitita al la ĉaso — kaj li rakontis —"

Dum ĉi tiu parolo aperis Kiĉjo, kiun la arbaristo jam antaŭe alvokis, tute silente sur la sojlo post la dorso de l' kuracisto.

Podhradský leviĝinte faris simplan signon per la mano, kaj la knabaĉo denove malaperis. Aŭdinte parton de la parolo de l' kuracisto, la arbaristo poste parolis mem, komence preskaŭ senpense:

"Jes — la ĉasoj!..."

Kaj nur post mallonga paŭzo, enprofundiĝinte malrapide en la plej karan elementon, li daŭrigis ĉiam pli vigle:

"Iam — antaŭ proksimume dudek aŭ ankoraŭ pli multe da jaroj, oni aranĝis ĉasojn ĉi tie preskaŭ ĉiujare. Sed de tiu tempo, kiam preter nia urbo estis konstruita la fervojo, nia solejo estis ĉiam pli forgesata. La nova komunikilo turnis la atenton de l' grandsinjoroj al alia direkto. Jam la mortinta sinjoro princo volis simple nuligi tiun ĉi nian ĉasdomon... La arbarkulturo pro la malfaciligita kaj plikarigita transporto donas ĉi tie preskaŭ nenian profiton... Sed konsiderinte, ke la ĉasdomo estas kvazaŭ hereda, en kiu mia avo kaj la patro dum longaj jaroj fidele servis al la grandsinjoroj kaj kie ankaŭ mi vivas pli longe ol sesdek jarojn, li ordonis en sia testamento, ke nia ĉasdomo restu al ni ĝis la tuta elmorto. Kompreneble oni plu ne pensis pri la ĉasoj en nia ĉirkaŭaĵo preskaŭ dum dudek jaroj ĝis la pasinta jaro, kiam jam la juna sinjoro princo invitis ĉi tien kelkajn gastojn por kelke da tagoj, kiuj ĉiutage alveturadis al ni. Sed tio malplaĉis kaj tiel lacigis ilin, ke la pasintaj ĉasoj de niaj grandsinjoroj en nia arbardistrikto estas sendube la lastaj..."

En tiu momento eniris Kiĉjo, alportante glasojn kaj du botelojn da vino.

"Bone, Kiĉjo," rimarkigis la arbaristo, "restu malsupre — ĉu ci komprenas? Se ni bezonus ion —"

Kiĉjo malaperis denove kiel ombro. Podhradský plenigis la glasojn per vino, kaj la kuracisto trinkis.

"Sed krom la ĉirkaŭaĵo, la pejzaĝo," li komencis, "vi havas ĉi tie, sinjoro arbaristo," — kaj li kontente ĉirkaŭrigardis — "ankaŭ aliajn enviindajn angulojn..."

"Ah, ne, sinjoro doktoro!" intermetis melankolie la arbaristo. "Ĉio, kion vi vidas ĉi tie, estas preskaŭ senŝanĝe tia, kia ĝi estis dum la ses, ĵus pasintaj jaroj, sed la spirito de l' paco, plezuro kaj feliĉo —," dume lia voĉo dolore ekstremis — "subite elmigris de tie ĉi."

"Ĉu antaŭe ne estis tiel?" intermetis la doktoro.

"Tute ne!" respondis la arbaristo. "Mi naskiĝis ĉi tie. Perdinte baldaŭ la patrinon, mi estis edukata preskaŭ en la plena disiĝo de la mondo. Mi kutimis al la izoleco. Vi do ne miros, ke mi eksopiris la ŝanĝon kaj la mondon nek tiam, kiam mi edziĝis, nek tiam, kiam al mi naskiĝis la filo. Kaj ankoraŭ malpli, kiam post ne longe mortis al mi la edzino. Mi restis tute sola kun la kelkmonata infano..."

"Kaj ĝisvivis," rimarkigis la doktoro, kiam la arbaristo eksilentis, "ne sole la plezurojn de l' patro, sed ankaŭ tiujn de l' avo. Ĉar la malsana knabo estas sendube la infano —"

"De la filo!" aldonis malklare la arbaristo kaj post mallonga paŭzo li diris:

"Sed kedu, sinjoro doktoro, ke eĉ la propra infano ne estis por mi en la infaneco tio, kio fariĝis por mi la nepo."

La kuracisto, kiu dum siaj lastaj vortoj ekrigardis al la kontraŭa granda fenestro kaj antaŭ ĝi ekvidis ion, kio mirigis lin, ŝanĝis subite la interparolon.

"Permesu, sinjoro arbaristo — ĉu estas iu en la korto?" li demandis vigle.

"Estas neeble!" respondis la demandito kun la kategorieco allasanta nenian dubon.

"Du el niaj tri grandaj hundoj estas laŭ ĉio ĉe sinjoro Floriano, kun kiu ili faris antaŭ kvaronhoro ekskurson al la senarba deklivo; sed la tria hundo, la plej furioza, kiu estas senĉese alligita, estas ĵus senĉenigita kaj kuŝas aŭ en la budo aŭ kuras en la korto... Kaj ankaŭ, se ĝi ne estus senĉenigita..."

"Kredeble mi eraris!" intermetis la doktoro. "Kiam ekfulmis, ŝajnis al mi, kvazaŭ mi estus ekvidinta momente homan vizaĝon en la maldekstra angulo de l' fenestro."

Post pli longa, preskaŭ turmenta silentado penis la doktoro rekomenci la interparolon.

"Laŭ ĉio, pri kio vi ĵus parolis, sinjoro Podhradský," li diris, "ŝajnas al mi, ke ankaŭ en via vivo kelkaj momentoj estis tamen maldolĉaj kaj eble doloraj."

"Jes, kompreneble!" jesis la arbaristo. "Sed de la morto de l' edzino, do pli longe ol kvardek jarojn, mi vivis en plena trankvilo kaj paco. Mi havis nenian alian deziron, ol eduki mian infanon je viro en la plena senco de l' vorto."

Eksilentinte momenton li aldonis en la maldolĉa ekscito:

"Kaj tamen je mia propra infano mi faris nepardoneblan pekon..."

"Kiamaniere tio okazis?" demandis la kuracisto kun ne malgranda intereso.

"Mi edukis ĝin mem..." daŭrigis la arbaristo. "Ĝi estis edukita sen la patrino kaj entute sen la virina zorgo kaj sen la virina societo. Estas vere — ĝi fariĝis viro, ĉe kiu oni povis nenion kritiki — la viro sincera, honesta, sufiĉe klera — la viro posedanta profundan kaj perfektan senton por la rajto kaj la justeco... Sed tamen li estis viro — en unu rilato simila al mi: — la viro, ne amanta la mondon kaj kontenta en la

solejo, en kiu krom la malgranda paŭzo, kiam li vizitis la lernejon por la arbarkulturo, li pasigis sian tutan vivon..."

"Ĉio ĉi ne estas tamen eraro kaj oni povas kulpigi vin je nenio!" kontraŭdiris la kuracisto.

"Mi mem juĝis ankaŭ tiel, ĝis alvenis la momento, kiam mi konvinkiĝis firme, kiel malnature kaj malbone mi estis edukinta mian propran infanon... Kaj kredu, sinjoro doktoro, kiam mi ekpensas kaj konsideras, ke tiu sama aŭ simila sorto, kiu trafis mian filon, atendas ankaŭ mian bedaŭrindan nepon..."

"Kia sorto, mi vin petas?"

"Ke ĝi estos kaj devos esti," aldonis maldolĉe la arbaristo, "edukita kiel mia filo — sen la patrino..."

"Ĝi estas orfo?"

"Jes — la orfo —," certigis Podhradský kun la mistera akcento kaj eksilentis.

"Sed ĉio ĉe vi atestas, ke ankoraŭ antaŭ ne longe regis ĉi tie la zorgema mastrino..., "rimarkigis la kuracisto.

"Jes — antaŭ ne longe..., " certigis la arbaristo vidigante tiun specon de l' embarasoj, kiam la homo sincere dirus la veron kaj eksentas preskaŭ la honton. "Sed por mi kaj por la infano ŝi estas malviva — por ĉiam..."

"Ŝi do ne mortis?" demandis la kuracisto.

"Ŝi ne mortis!" ripetis malklare kaj unutone la arbaristo, kvazaŭ li parolus el la tombo. "Subite kaj sen kia ajn kaŭzo ŝi forlasis la edzon kaj la infanon —"

Poste li haltis momenton, sed tuj eksplodis en la melankolia ekscito:

"Ah, sinjoro doktoro! En ĉi tiu solejo mi vivas de la plej frua infaneco pli longe ol sesdek jarojn. Estas nature, ke la ĉarme romantika pejzaĝo, kiu ravas ĉiun, kiu unuafoje alvenas ĉi tien, fariĝis por mi tute ordinara. Entute la trankvila kaj kontenta vivo nia havas cetere ankaŭ siajn ombrojn: la senekzemplan unutonecon kaj iafoje, precipe dum longaj vintraj vesperoj kaj noktoj, tute teruran enuon. Kaj tamen mi kaj mia filo ne eksopiris la mondon kaj ĝian vivoturnon. Ni kutimis al la malĝojoj de la solejo kaj — kredu — ni ekpensis neniam, ke la situacio iafoje povus esti alia, ol kia ĵus ĝi estas... Sed antaŭ kelke da jaroj okaze konatiĝis mia filo en Praha, kiam li traktis

tie aferojn tuŝantaj la arbardistrikton, kun la knabino, kiun unuafoje mi ekvidis nur post unu jaro, kiam mia filo enkondukis ŝin en la ĉasdomon kiel sian edzinon. Mia rigardo kun la ekmiro fiksitis sur ŝi. Mi estis konvinkita, ke mia filo ne povis pli bone elekti —"

"Kaj tamen, kiel oni vidas, vi eraris!" rimarkigis la doktoro.

"Ah, ne, sinjoro doktoro," kontraŭdiris la arbaristo kun la konvinka kategorieco. "Evelino estis kaj restis estaĵo tute anĝela... En kelke da tagoj ŝanĝiĝis la trankvila, malĝoja kaj iafoje eĉ senviviganta angulo nia en veran paradizon de l' silenta, dolĉa plezuro... Malgraŭ sia juneco Evelino egalas al la damoj kleraj en la vera senco de l' vorto. Ŝi sciis fari tion, pri kio antaŭe en nia solejo ni eĉ ne songis. Ŝia edukiteco estis ekzempla kaj neniel ŝanĝiĝis. La libro estis ŝia kara kaj sincera amiko. Jes, Evelino konis ankaŭ la mondon... Ŝi faris ja kun sia patrino oftajn kaj multekostajn vojaĝojn tra Eŭropo; unuvorte —"

"Laŭ ĉio ŝajnas al mi," atentigis la doktoro, "ke fine en via solejo tamen ŝi eksopiris..."

"Unue mi mem opiniis," ekparolis la arbaristo, "ke la virino, floranta en la freŝa forto de la vivo kaj kutiminta al la ekscitanta vivoturno grandurba, pli aŭ malpli frue eksopiros tamen la atmosferon, en kiu ŝi estis pasiginta sian junecon. Sed dum ĉiuj ses jaroj mi ne rimarkis eĉ unu simptonon de tiu speco. Evelino ĝis la momento, kiam mi vidis ŝin en la lasta tago de l' pasintaj ĉasoj antaŭvespere lastan fojon foriri malrapide al la tri krucoj sur la senarba deklivo, estis freŝa, senzorga kaj gaja, entute tia, kia ŝi aperis unuan fojon en nia solejo..."

"Eble okazis ia malpaco kun la edzo —"

La arbaristo kontraŭdiris:

"La filo estus almenaŭ skizinta al mi sian konjekton — eĉ ankaŭ tiam, se li estus konvinkita, ke estos bone aŭ necese sekretigi la esencon de l' afero. Sed ankaŭ por li mem ĉio restis nesolvebla enigmo... Evelino estis kaj restis ĝis la lasta momento, kiun ŝi pasigis en nia solejo sub nia tegmento kaj en nia societo, tia bonega bofilino, kia ŝi estis bonega edzino kaj patrino. Ŝi amis siajn edzon kaj infanon varme kaj arde —"

"En tiu okazo," intermetis la kuracisto, "ŝajnas al mi, ke via bofilino nur ŝajnis bonega edzino kaj patrino, sed efektive ŝi sciis bonege hipokriti..."

"Hipokriti?" ekkriis la arbaristo preskaŭ pasie. "Evelino hipokriti? Ne, ne, sinjoro doktoro —"

Poste li stariĝis rapide, alpaŝis al la muro, sur kiu pendis granda portreto de la filo kaj sub ĝi fotografiaĵo de la sinjorino en baltualetu. Preninte la fotografiaĵon de la muro li revenis al la tablo kaj donante la fotografiaĵon al la doktoro li parolis kun la entuziasmo de l' junulo:

"Mi petas, rigardu, sinjoro doktoro, tiun ĉi vizaĝon kaj diru mem — ĉu la vizaĝo estus kapabla hipokriti?!"

La doktoro prenis la fotografiaĵon kaj nerigardinte ĝin ankoraŭ, li rimarkigis:

"La homa vizaĝo kaj precipe la fotografiaĵo de l' homa vizaĝo ne estas ja la fidela kaj la netrompebla rebrilo, tiom malpli la spegulo de l' animo kaj ĝiaj kapabloj kaj ecoj. La fama fizionomiko de Lavater estas jam longe kondamnita kiel la simpla eraro de la scienco."

"Estas vere, estas vere!" jesis la arbaristo. "Ankaŭ mi mem nenion deduktas el tiu ĉi pseŭdoscienco. Sed se post tio, kion laŭ la vero mi rakontis al vi pri Evelino, vi ekrigardos ŝian portreton, vi devos konfesi, ke ŝia mieno estas en la absoluta harmonio kun la ĝenerala karakterizaĵo. Ĉi tie do la teorio de l' pseŭdoscienco de Lavater valoras iel escepte."

"Ĉu vi pensas tiel?" kontraŭdiris la doktoro nekredante.

Nur poste li ekrigardis la fotografiaĵon, tenante ĝin malproksime de l' okuloj, kiel faras la homoj malproksimvidaj.

"Efektive — tio estas ĉarma vizaĝo — plena de sorĉo, milda kaj delikateco...", li diris post la momento en la tono de l' modere surprizita nekredemulo. "Vere — preskaŭ mi estas konvinkita pri la vereco de viaj vortoj."

Sed subite, kvazaŭ li estus rememoriginta sin pri io grava, li rapide demandis:

"Permesu, mi petas! Antaŭ kiom da jaroj estis farita, tiu ĉi fotografiaĵo?"

"Mi pensas, antaŭ sep, ok jaroj!" respondis la arbaristo.

"Vere, ĝi estas jam iom senkoloriĝinta!" konsentas la kuracisto. "Sed strange! La talio kaj ankaŭ la vizaĝo ŝajnas al mi konataj..."

"Eble, ke iam antaŭ kelke da jaroj ie vi vidis ŝin!" allasis la arbaristo. "Eble en Praha, kie ŝi vivis de sia plej frua infaneco. Ŝia nasknomo, vere barbara, estis Brandstruper..."

Ŝia patro mortis antaŭ dek jaroj, kiel altranga oficisto en pensio; la patrino mortis antaŭ unu jaro... Estas eble, ke —"

"Ne, ne!" kontraŭstaris vicle la kuracisto, rigardante fikse la fotografiaĵon kaj dume rememorante. "Mi ne vidis ŝin antaŭ kelke da jaroj. Ŝiajn patron kaj patrino mi ne konis persone kaj ankaŭ mi ne memoras ŝian nasknomon. Unuvorte... via sinjorino bofilino, kiel ŝi estas figurita ĉi tie, estas al mi tute nekonata. Sed kiam mi rigardas ŝian portreton, ŝajnas al mi, pli ĝuste, mi estas preskaŭ konvinkita, kvazaŭ antaŭ ne longe mi estus vidinta sinjorino ekstreme similan al ŝi..."

"Sed kie, mi petas, sinjoro doktoro — kie?" demandis ekstreme scivole la arbaristo.

"Mi ne povas rememorigi min pri tio!" respondis la demandito, levinte la ŝultrojn kaj metante la fotografiaĵon sur la tablon. "Eble, ke mi vidis ŝin en Praha antaŭ kelke da tagoj, kiam mi estis devigita pro la urĝa kaj samtempe tiel dolora afero veturi tien, ke spite mia tuta harditeco, spite mia tuta maldolĉa rezignacio mi havis atenton preskaŭ por nenio."

"Ĉu ankaŭ vin, sinjoro doktoro, trafis dolora katastrofo? Kaj antaŭ ne longe — antaŭ kelke da tagoj — vi diras?" demandis komplete la arbaristo, kiu ne preterlasis, ke la voĉo de l' kuracisto ekstremis de la kortuŝo dum la lastaj vortoj.

"Mi petas vin, kiu en sia vivo estis indulgita de la sorto?" ekparolis la kuracisto, penante ekregi sin. "La sorto iafoje neatendite ŝanĝas niajn planojn de l' vivo tiel brutale kaj sensente, ke la sango rigidiĝas ankaŭ al la plej malvarmsangaj el ni..."

Sed subite la doktoro salte leviĝis kaj per la tute ŝanĝita voĉo, allasanta nenian kontraŭstaron, diris:

"Sed tiun ĉi fojon, sinjoro arbaristo, mi ne eraris! Iu estas en la korto kaj rigardis tra la fenestro..."

Dume li montris la fenestron post la dorso de Podhradský.

"Ĉi tie, sinjoro arbaristo —" dume li montris la maldekstran angulon de la fenestro — "aperis la homa vizaĝo kaj ĝi tuj malaperis..."

Podhradský, kiu ankaŭ leviĝis kaj proksimiĝis malrapide al la fenestro, nee balancis la kapon, dirante:

"Mi ripetas, sinjoro doktoro, ke tio ne estas ebla. Cetere — ni povas ja konvinkiĝi — tute konvinkiĝi!" li aldonis, estante iom incitita de l' obstina malcedemo de la kuracisto kaj rapide direktiĝis al la pordo kondukanta al la koridoro.

Malferminte iom la pordon li ekkriis:

"Kiĉjo!"

"Tuj, tuj, sinjoro patro!" eksonis el la koridoro la ne tre agrabla soprano de Kiĉjo.

"Restu tie, kie ci estas!" ordonis la sinjoro patro. "Kie estas Nero?"

"En la korto, alligita, kiel vi ordonis!" eksonis respondo el la koridoro.

"Kaj kie estas Diano kaj Vulkano?"

"Ili estis kun la sinjoro Floriano apud la tri krucoj kaj poste ĉe li en la ĉambro!" respondis Kiĉjo. "Poste mi prenis ilin al mi kaj nun ili estas ĉe mi."

"Tuj enlasu ilin en la korton, ĉu ci komprenas?" ordonis Podhradský kaj faris kelke da paŝoj de l' malfermita pordo.

"Tuj, tuj!" eksonis la respondo el la koridoro kaj post mallonga paŭzo ekkriis Kiĉjo: "Estas farite! Ambaŭ estas jam en la korto."

Tuj poste aperis Kiĉjo antaŭ la sojlo de la pordo.

"Ĉu vi ankoraŭ ion deziras, sinjoro patro?"

"Nenion, nenion!" rediris la arbaristo; sed rememoriginte sin pri sia adjunkto, li aldonis:

"Kaj tamen! Rapidu al sinjoro Floriano, kiel li fartas kaj ĉu li deziras ion! Tiel — kaj fermu!"

La arbaristo aŭskultis dum kelke da momentoj kaj poste turnis sin al la doktoro:

"Ĉu vi aŭdas?"

"Kion mi aŭdu?" demandis la doktoro, ne komprenante, kion celas Podhradský per sia demando.

"Simplan bruadon de l' uragano... Se estus iu en la korto, precipe iu fremdulo — la ambaŭ ellasitaj hundoj tuj bonvenus lin per furioza bojado."

"Strange!" diris la doktoro duone konvinkita.

"Cetere — ni povas konvinkiĝi ankoraŭ alimaniere..." aldonis la arbaristo.

Rapide li alpaŝis al la pordo, kondukanta al la korto, preninte skurĝon de la hoko kaj duone malferminte la pordon, kies anson li tenis, por ke la ventego ne eligu ĝin.

Moderata trablovo turnis sin en la ĉambro: la pordo en la mano de Podhradský ekskuiĝis.

"Ah, mi petas, sinjoro arbaristo, volu ne peni!" petis la doktoro.

En tiu momento forta ventego eligis la pordon kaj en la ĉambro turnis sin malvarma spiro de la vento.

Podhradský eliris el la pordo, kie penetre ekfajfinte eksvingis la skurĝon kaj poste ekkriis per mallaŭtigata voĉo:

"Nero!"

Cedinte rapide en la ĉambron li brue fermis la pordon, dirante al la doktoro:

"Nero jam kuras!"

Kaj efektive preskaŭ en la sama momento estis aŭdata post la pordo la flaranta ekbojo de la hundo:

"Efektive, sinjoro arbaristo, nun mi estas tute konvinkita!" rimarkigis la kuracisto, sidiĝante sur la saman lokon, kie li estis sidinta...

Podhradský sekvis lian ekzemplon kaj proponis al li vinon.

Ambaŭ trinkis kaj poste silentis kelkan tempon. Fine ekparolis la arbaristo, volante denove rekomenci la interparolon:

"Ĉu vi ne aludis, sinjoro doktoro — en via parolo iun malfeliĉon, kiu vin trafis?"

Tiu demando preskaŭ dolore tuŝis la doktoron.

"Ah, sinjoro arbaristo — estas pli bone ne rememori!" li diris venkante la subitan kortuŝon. "Ni kuracistoj, kiuj estas preskaŭ ĉiutage atestantoj de l' homa senpotenco kontraŭ la neniigeblaj leĝoj de l' naturo, ni ordinare ne diskutas kun la brutala naturo. Ni akceptas ĉiun ĝian baton, kiun ĝi donas al ni, kun pli aŭ malpli granda rezignacio kaj ni uzas, se estas eble, sole unu rimedon — ni evitas la rememorojn."

"Sed kion fari, kiam la rememoroj estas tiel potencaj," kontraŭdiris la arbaristo, "ke la homo kiel mi, vidas la homon, kiun li amis kaj perdis por ĉiam, preskaŭ senĉese antaŭ si. Kiam homon skuas la bedaŭro, doloro, honto kaj kolero; kiam ĉiumomente ekflamas la pasio tiel, ke la homo sufokus aŭ per unu bato de l' pugno faligus teren la iniciatinton aŭ iniciatintinon de sia malfeliĉo — se ili aperus antaŭ li?"

La pasia akcento, kun kiu la vortoj estis diritaj, atentigis la doktoron, ke li sidas kontraŭ la viro pasiema, kiun ne estas konsilinde inciti.

Li diris do iel rezerve:

"Sed permesu! Post ĉio, kion vi diris al mi pri via sinjorino bofilino, mi vere ne komprenas, kiamaniere povis okazi, ke vi fariĝis tiel kolera kontraŭ ŝi, kiel vi ĵus diras, kaj kiamaniere rajte fariĝis kolera kontraŭ ŝi eble ankaŭ ŝia edzo, via filo..."

"Vi konjektas," intermetis maldolĉe la arbaristo, "ke mia spirita stato ne estas rajtigita...?"

"Ne nerajtigita, sed iom nenatura," respondis la gasto. "La familiaj katastrofoj de tiu speco, kiu okazis ĉe vi, estas en la mondo kaj estis ankaŭ aliloke neniam maloftaj. La geedzoj koleras — iafoje pro la simpla vorto, ekmovo aŭ ekrigardo — kaj se iliaj karakteroj estas flamiĝemaj aŭ fine pasiemaj, estas aŭ la tempa disiĝo aŭ la daŭra disiro tute naturaj. Sed kiam la ondiĝinta sango silentiĝas kaj ekregas la malvarma prudento, sekvas en naŭdek okazoj el cent la repaciĝo."

"Sed mia filo ne povas plu repaciĝi!" kontraŭdiris la arbaristo kun la dolora maldolĉo.

"Kial li ne povas?" rediris la kuracisto. "Se ne tuj, do almenaŭ pli malfrue. La espero pri la repaciĝo estas ĉiam ebla. Se via sinjoro filo, kiun vi mem edukis, estas viro simila al vi almenaŭ en la ĉefaj principoj de l' karaktero, estas ne eble, ke li siatempe ne pardonu —"

"Mia filo havis sole unu pasion!" rimarkigis Podhradský. "Li amis Evelinon preskaŭ freneze."

"Tiom pli ebla estas la espero pri la repaciĝo!" opinias la doktoro. "Ĉar ami en la vera senco de l' vorto estas ĝuste nenio alia, ol ĉion forgesi, ĉion pardoni..."

"Estas vere, estas vere!" jesis la arbaristo meditante; sed tuj kun la senmezura maldolĉo li aldonis:

"Sed mia filo povas jam pardoni tute nenion... Mia filo estas mortinta!"

"Mortinta?" rediris subite en la ŝanĝita tono la kuracisto.

"Li penis kiel viro neniigi siajn malĝojn, bedaŭron kaj senmezuran doloron!" daŭrigis la malfeliĉa patro. "Dum tri monatoj li suferis terurajn animajn turmentojn, kaj eĉ ne plendis per unu vorto. Ĝis fine — en la lasta kristnaska antaŭvespero, ornaminte al la infano la kristnaskan abieton — per unu ekpafo de la revolvero..."

Post tiuj ĉi vortoj la arbaristo salte leviĝis, trairis la ĉambron kaj haltinte apud la tablo antaŭ la fenestro rigardanta la korton, li daŭrigis:

"Kiam ni finis la vespermanĝon kaj la infano ekdormis, sidiĝis mia filo ĉi tien apud tiu ĉi tablo kaj longe, longe rigardis senparole tra la fenestro... La luno lumis bele, kaj oni povis vidi ĝis la tri krucoj sur la senarba deklivo. Subite la filo iomete ekmoviĝis kaj la ekpafo de la revolvero ektondis. Lia kapo falis sur ambaŭ manojn, sur la tablon kaj en kelke da momentoj disfluis la sango sur la tablo..."

"Nur nun mi komprenas la kuneligon de ĉio," rimarkigis la doktoro kompate. "Kaj kredu —"

Li ne finis la parolon.

Podhradský, rekonsciiĝinte iom, sed estante ankoraŭ dolore kortuŝita, interrompis lin:

"Kaj pripensu, sinjoro doktoro! La infano eĉ ne vekiĝis post la ekpafo — kaj la sango, la sango restis ĉi tie... Mi ne permesis, ke ĝi estu forlavita... Tiu sango —" la ceterajn vortojn li parolis kun pasia doloro — "tiu sango rememorigu min ĝis la lasta momento de mia vivo pri la ĉarma furio, kiu kaŭzis la memvolan morton de mia filo!..."

"Bedaŭrinda patro!" diris kompate la doktoro, vidigante mem la plej doloran kortuŝon.

"Pardonu," li aldonis, "ĉar mi havas nek por vi, nek por mi vortojn de konsolo. En tiaj teruraj momentoj oni estas frakasita... Kaj se io povas malgrandigi vian doloron, sciu do, ke ankaŭ mi mem —"

"Ĉu vi ankaŭ —?" intermetis komplete la arbaristo. "Via filo, sinjoro arbaristo, mortis antaŭ duonjaro," respondis interrompe la gasto, "kaj mia filo antaŭ kelke da tagoj... Mia filo, leĝosciencisto kaj leŭtenanto en la rezervo, knabo sanega, ankaŭ memmortigis sin. Li sin venenis."

"Kaj la kaŭzo — la motivo?" insistis la arbaristo kun la kompata intereso.

La doktoro, levinte la ŝultrojn, respondis: "Se via filo estis edukita en la solejo kaj sen la zorgo patrina, sen la societo virina, mia filo estis edukita de la klera, afabla kaj entute bonega patrino en la societo de kelkaj siaj pli aĝaj fratinoj en la urbo, do en la atmosfero plena de l' impresoj. Li fariĝis viro plena de l' junula forto de l' vivo. Malofte iu sopiris tiel varme, tiel arde eĉ pasie, eluzi la vivon en ĉiuj eblaj direktoj kiel li. Kaj tio okazis ne sole en la plezuro kaj volupto, sed ankaŭ en la serioza, konscienca kaj pena laboro..."

"Laŭ tio," rimarkigis demande la arbaristo, "estis ĉe via filo neniam gravaj motivoj al la disreviĝo je la vivo?"

"Ĝenerale dirite — estis neniam motivoj..."

"Kaj tamen li malesperis."

"Ah, sinjoro arbaristo," rediris la doktoro, "ni maljunuloj, kiuj jam kliniĝas al la tombo, ni ordinare amas la vivon pli forte, ol la pasiema junularo. La tuta, se ankaŭ la plej longa pasintaĵo nia ŝajnas al ni ĉiuj sole sonĝo de kelkaj semajnoj. Kontraŭe la junularo; precipe la nuna juna generacio —"

"Vi opinias," intermetis la arbaristo, "ke la nuna juna generacio esence diferencas de l' juna generacio, al kiu ni apartenis antaŭ la jaroj?"

"Kompreneble kaj el la motivoj tute naturaj!" komencis klarigi la doktoro. "La modernaj eltrovoj en la sciencoj de ĉiuj fakoj kaj de ili mireginde ŝanĝita la ĝenerala vivo edukis generacion tute novan, kies esencon ni maljunuloj tute ne komprenas, nek scias klarigi ĉiujn simptomojn, motivojn kaj celojn.

Dum nia juneco la tute ne antaŭsentitaj progresoj en la nemultaj fakoj ĵus en la pasintaj du aŭ tri dekjaroj havigas al la juna kaj la plej juna generacioj tute novajn, pli klarajn kaj pli profundajn perspektivojn de la vivo, ol kiaj vidiĝis antaŭ la duoncentjaro al ni...

Kaj ĉar la pli maljuna kaj la plej maljuna generacioj ne iras — kaj estas nature, ne povas iri — kun la ĝenerala progreso egale rapide, rezultas el tio la malkontenteco de ĉiu, antaŭ kies spirita rigardo vidiĝas la perspektivo pli klara kaj pli profunda.

Ni maljunuloj, kiuj dum la tuta duoncentjaro kaj multaj el ni ankoraŭ pli longe, kontentiĝis kun la perspektivo neproporcie pli malklara kaj pli malprofunda, kompreneble ne estas tiel ekscitataj de l' diversaj disonancoj kiel la vivemaj kaj la agemon sopirantaj generacioj pli junaj...

Kaj sole ĉi tiuj disonancoj estas laŭ mia opinio la ĉefa fonto de l' febra, por ni maljunuloj malvarmiĝantaj, aŭ jam malvarmiĝintaj, tute nekomprenebla malkontentiĝo de l' juna generacio.

La spirita horizonto de tiu generacio estas nature pli larĝa kaj pli klara, ol estis la nia. Sed tamen la ĝisnuna senpotenco en la realigo de l' planoj de la vivo ekscitas la junajn spiritojn je la mistere dolora malkontentemo, kiu kvankam similas la dolĉe turmentantan pesimismen de l' pli malnova tempo, sed diferencas de ĝi per la netrankviligebla maldolĉo..."

"Sed pardonu," ĉesigis la doktoro mem sian klarigon, "ĉio estas sole la laciga subjektiva meditado..."

"Sed ĝi ne lacigas la homon," intermetis vigle la arbaristo, kiu aŭskultis kun ne malgranda intereso, "kiu sian tutan vivon pasigis en la solejo kaj kiu kiel malproksima observanto havas sole malklaran ideon pri la nuna vivoturno. Do mi petas, daŭrigu!"

La doktoro plenumis lian peton.

"La junan kaj la plej junan generaciojn ekscitas la varma sopiro solvi la nekalkuleblajn problemojn, kiujn la pli maljuna generacio herede restigis nesolvitaj al ili. Sed ĵus pro tio, ke la solvo estas ankaŭ nun plejparte sensukcesa, penas la juna kaj la plej juna generacioj trovi la elirejon el la mistera labirinto.

Ili penas esprimi sian opinion pli klare, pli precize aŭ almenaŭ pli kolore kaj pli plastike; ili ekzamenas enigmojn laŭ malnovaj kaj novaj metodoj; ili analizas, eksperimentas kaj ofte enfalas en la novajn enigmojn, kiuj estas pli misteraj kaj pli mistikaj ol la problemoj, kiu devas esti solvita...

La kulturo kaj la ideoj pri la mondo, kiujn la pli maljuna generacio restigis al la generacioj juna kaj la plej justa, ne kontentigas plu. La junaj kaj la plej junaj spiritoj sopiras la spiritan regeneracion, la moralan, etikan, eventuale ankaŭ la religian regeneracion — la sociajn, politikajn kaj artajn reformojn...

Unuvorte, la malnova mondo kun siaj ideoj, eraroj kaj antaŭjuĝoj naskas antipation, kontraŭstaron kaj varman netrankviligeblan sopiron, faligi senkompatate ĉiujn idolistajn preĝejojn, kiujn aŭ la spirita miopeco aŭ la malvirta krimeco de l' malnova mondo estis konstruintaj por la idoloj de dubebla valoro...

Kaj mia filo, sinjoro arbaristo, estis membro de ĉi tiu pli juna generacio. Li estis unu el tiuj obstinaj, malcedemaj kaj nevenkeblaj pioniroj de l' nova kulturo, kiuj en la kontraŭstaro kaj la principa batalo kontraŭ la malrapide elmortanta mondo malnova konsumiĝas de l' netrankviligebla malkontenteco kaj trovas en ĝi plezuron, kiun eĉ en la situacio plej brila ne donus al ili la konsento kun la heredaĵo de l' malnova mondo."

La doktoro eksilentis.

"Laŭ tio, sinjoro doktoro," ekparolis la arbaristo, "en via filo vi perdis viron tute netakseblan. Sed kio, mi petas, estas laŭ via opinio la kaŭzo de lia memvola morto?"

"Estas malfacile, ĝuste neeble diri!" respondis la doktoro levinte la ŝultrojn. "La morto de mia filo estas kaj sendube restos enigmo por ĉiam kaj ĝia kaŭzo restos mistero. Unue mi konjektis, ke la krizo okazis ĉe li sekve de l' priskribita lia moderna malsano kaj ke li finis sian vivon en la atako de l' subita senkonscio. Sed kiam mi venis en Praha'n kaŭze de lia enterigo kaj sciigis kelkajn detalojn pri la lastaj tagoj de lia vivo, tuj mian cerbon trakuris la konjekto, ke — lian morton kaŭzis sendube — la virino..."

"La virino?" ekkriis mallaŭtigite la arbaristo.

"Jes — la amatino..." aldonis la doktoro. "Cetere pri la interrilatoj de mia filo kaj lia amatino mi scias nenion gravan kaj neniun mi demandis iam pri tio.

Mi scias sole, ke ili varme amis unu la alian jam antaŭ proksimume dek jaroj, ke ili denove kuniris okaze antaŭ netuta jaro kaj ĵus en kelke da pasintaj monatoj vivis kune kvazaŭ la geedzoj en Praha...

Ĉi tio kompreneble ne faras ilian amrilaton plej bela; sed mi, kiu neniam malhelpis la filon en kio ajn, ĵus pro ĉi tiu fidela amo lia ne ekdeziris malkovri la dolĉan misteron de la filo.

Pri lia amatino mi scias sole, ke ŝia nomo estas Milena¹³ kaj ke ŝi amis lin kun la tuta ardo de sia varma animo... Kaj ĝis hodiaŭ mi ne parolis kun Milena eĉ unu vorton.

En la momento, kiam disprenite mi staris apud la malfermita tombo de la filo en la tombejo de Volšany¹⁴, kaj Milena en la malĝoja ĉarmo de l' sanktulino alvenis

ŝanceliĝe kaj en la neespritnebla doloro haltis rekte kontraŭ mi, mi ekrigardis ŝin sole unufoje kaj sekrete, por ne malhonori eĉ per la rigardo ŝian silentan doloron..."

"Via delikateco, sinjoro doktoro, kontraŭ la estaĵo tiel milda," komencis paroli la arbaristo, "estas kompreneble rajtigita. Sed Evelino, kiu sen kaŭzoj kaj sen motivoj forlasis sensente sian propran infanon kaj la leĝan edzon, kiuj faris al ŝi nenion malbonan nek per unu vorto, nek per unu rigardo, tiu ĉi furio ŝtonkora meritas nenion alian, ol..."

Jen li subite haltis, sed tuj poste en la plej pasia tono aldonis:

"Ah, ne, ne, sinjoro doktoro! Se tiu virino en ĉi tiu momento aperus ĉi tie — kredu — ke per unu bato de la pugno mi —"

Sed lia kolero denove moderiĝis tiel subite, kiel ĝi ekflamis.

En tiu ĉi momento aŭdigis sin Kiĉjo.

Jam ĉe la lastaj vortoj de l' arbaristo li estis malferminta senbrue la pordon de la koridoro kaj haltinta sendecide kaj malkuraĝe antaŭ la sojlo. — Nun li ektusis senvole.

Podhradský, ekvidinte Kiĉjon nur nun, akre demandis lin:

"Kio estas, Kiĉjo?"

La knabaĉo ne respondis, sed vidigante mienon, kvazaŭ li havus ion gravan por diri kaj ĝenus en la ĉeesto de l' doktoro.

La arbaristo do leviĝis kaj proksimiĝis al la pordo.

"Kio okazis?" li demandis kolere.

Kiĉjo aliris kaj diris mistere:

"Sinjoro Floriano — ah, Dio, sinjoro patro — tre plendas...! Kaj li petas — ke la sinjoro doktoro — por mallonga momento —"

"Ĉu iu bezonas helpon de kuracisto?" ekparolis la doktoro leviĝante.

La arbaristo mallonge klarigis al li la malfeliĉon de Floriano.

"Nu, ni vidos!" diris la doktoro. "Sed antaŭe ni devas dediĉi ankoraŭ momenton al la infano..."

Turninte sin post ĉi tiuj vortoj li proksimiĝis al la infanlito en la malantaŭon, serioze esplorante la infanon. Podhradský farinte signon per la mano, ke Kiĉjo foriru, atendis, ĝis Kiĉjo malaperis. Ŝtelirinte poste al la doktoro kaj haltinte proksimume tri paŝojn antaŭ la lito, senparole, sed kun la mieno de la plej maltrankvila scivolo sekvis la konduton de l' kuracisto.

"Kion vi opinias — sinjoro doktoro — nun?" demandis interrompe kaj mallaŭtigite per la tremanta voĉo la arbaristo.

"Preskaŭ mi timas doni la duonan porcion da medikamento...", respondis la doktoro kun la glacia trankvilo. "La infano estas tute senfortigita — ĝi ne tudas ja plu... La ĝenerala stato de la malsano estas tiel kriza, ke ĉiumomente oni povas atendi la agonion..."

"Agonion?" ekĝemis malespere la arbaristo.

"Kuraĝiĝu, sinjoro arbaristo!" diris la doktoro: "Kaj se estas eble, mi petas, montru al mi afable, kie mi povus al la sinjoro adjunkto —"

La arbaristo rapide aliris al la tablo en la antaŭo kaj prenis la lampon.

"Kaj se la infano estus atakata de la tuso," diris la doktoro kun la akcento, "sciigu min tuj pri tio!"

La arbaristo jese ekmovis la kapon.

Poste rapide li alpaŝis kun la lampo al la pordo de l' koridoro, malfermis ĝin kaj per la tremanta voĉo ekkriis en la koridoron:

"Kiĉjo! Rapide lumigu la ŝtuparon! Sinjoro doktoro!..."

Senparole eniris la kuracisto en la koridoron, el kiu eksonis la mallaŭtigite rebruenta sono de liaj malproksimiĝantaj paŝoj.

En la momento, kiam la arbaristo, staranta sur la sojlo de l' pordo kondukanta al la koridoro kaj turnita dorse al la ĉambro, volis sin turni kaj reveni en la ĉambron, malfermis iu staturo en malseka nigra vesto la pordon, kondukantan el la korto al la ĉambro.

Forta malvarma trablovo turnis sin en la ĉambro kaj momenton estis aŭdata la forta pluvego pli klare, ol kiam la pordo estis fermita.

La staturo, englitinte tra la pordo, kiu en ĝia mano knare ekbruis, pene ĝin fermis kaj haltis apud ĝi senmove, kvazaŭ konsiderante, ĉu antaŭeniri aŭ ne...

La arbaristo eksentinte la glacian trablovon, kiu tuj estingis al li la lampon en la mano, rapide sin turnis kaj brue fermis la pordon.

"Kio okazis? Kial tiu trablovo?" li murmuris, fikse rigardante la mallumon en la ĉambro.

Alirinte singarde en la mallumo ĝis la tablo kaj stariginte sur ĝin la estingitan lampon, li iris singarde en la mallumo de l' tablo al la forno, kie sur la breto kuŝis la alumetoj.

La alumeto en la mano de l' arbaristo ekflamis sole momenton, sed tamen ĉe tiu mallonga ekflamo ekvidis Podhradský malklaran silueton de l' homa staturo apud la pordo.

"Kio estas tio? Iu estas ĉi tie?" deglitis al li de l' lipoj kun la modera ekmiro, sed sentime.

Momenton li streĉe aŭskultis, sed kiam neniu respondis, li ekkriis:

"Kiu estas ĉi tie?"

Sed kiam denove neniu respondis, alpaŝis la arbaristo al la tablo, ekbruligis alumeton kaj ne levinte eĉ la kapon ekbruligis la lampon, starantan sur la tablo.

Nur poste li ekrigardis al la pordo.

Efektive li ekvidis tie starantan staturon kaj mirigite, sed tamen sentime, li cedis unu paŝon.

Samtempe malleviĝis lia dekstra mano al la maldekstra kokso, kvazaŭ li volus ekkapti la ĉasponardon kaj la maldekstran manon li metis por momento super la okulojn, por vidi pli bone. Sed tuj poste denove li elpaŝis kaj preninte la revolveron, kuŝantan sur la tablo, li tondre ekkriis:

"Kiu estas ĉi tie? Kion vi volas?"

Nur nun li ekvidis, ke apud la pordo staras virino de meza kresko, havanta sur la kapo transĵetitan tute malsekan nigran mantelon, en kiu ŝi estas tiel envolvita, ke oni vidas sole parton de la vizaĝo kaj brilantajn nigrablujajn okulojn...

En tiu momento la virino, subite, kvazaŭ tamen ŝi estus fine decidinta, deĵetis la mantelon kaj rektiĝinte staris kiel statuo kun la kunmetitaj manoj kaj la mieno de l' kortuŝanta, muta petego.

Podhradský, rekoninte ŝin, cedis mirigite kaj kun la mieno de l' kolero kaj malamo surde ekkriis:

"Evelino!"

"Jes — Evelino...", mallaŭte kaj mole diris la virino per la tremanta voĉo.

La arbaristo, al kiu la apero de l' edzino de lia filo tuj klarigis ĉiujn supozitajn halucinaciojn de liaj homoj, sed ankaŭ tiujn de l' doktoro, staris momenton senmove en la muta ekmiro, vidigante en la vizaĝo fortan animan batalon.

Sed la delikata, petanta rigardo de l' virino iom post iom tamen komencis lin senarmigi.

La mieno de l' kolero kaj malamo, kiun vidigis lia vizaĝo, kiam li rekonis Evelinon, cedis malrapide al la mieno de l' kompato.

"Pardonu, sinjoro patro!..." eksonis post kelka tempo malkuraĝe kaj timeme la dolore tremanta voĉo de Evelino.

"Pardoni?" rediris duonkompate la arbaristo. "Mi ne scias, kion pardoni..."

"Pardonu!" ŝi ripetis ŝanceliĝe kun la plej kortuŝanta akcento de l' peto. "Kie estas — Václav¹⁵?"

"Mia filo?" demandis surde la arbaristo.

"Mia —?" aldonis Evelino, sed ne ŝi finis, ĉar la arbaristo malafable interrompis ŝin:

"Li ne estas ĉi tie!"

"Tio estas tute neebla!" kontraŭdiris Evelino. "Dum tri tagoj kaj preskaŭ tri noktoj mi vagas en la arbaroj ĉirkaŭ la ĉasdomo, por kuniri kun Václav. Václav laŭ ĉio dum la tri tagoj ne forlasis la ĉasdomon, Václav estas ĉi tie..."

La arbaristo respondis decide:

"Kaj se eĉ li estus ĉi tie — laŭ kia rajto ci kuraĝas transpaŝi la sojlon de tiu ĉi domo?"

"Pardonu!" ekĝemis dolore la edzino de Václav. "Mi alvenas kun la dispremita koro, malfeliĉa, pentofaranta Magdaleno, por ke mi sur genuoj petu de Václav pardonon de mia peko..."

"Malfeliĉulino!" ekkriis pasie la arbaristo; sed tuj li aldonis en la dolora tono:

"Kun Václav ci kuniros plu neniam!"

"Pro ĉio, kio estis iam kara al vi, mi petas vin," insiste petegis Evelino, "venigu al mi Václav-on!... Aŭ almenaŭ diru al li, ke mi estas ĉi tie — ke mi revenas —."

"Mi ne povas."

"Ĉu li estas malsana?"

"Ne estas. Sed la infano — la infano malsanas —"

"Pro la kompatato de Dio — mia infano?" ekkriis Evelino malespere kaj ŝia rigardo rondiris sovaĝe en la ĉambro.

Sed ĉar de la loko, kie ŝi ĵus staris, ŝi ne povis vidi en la malantaŭo la infanliton, kiun kovris la paravento kaj la duone disigita pordokurteno, ŝi denove tuj rekonsciiĝis.

"Mi vidis ja ĝin antaŭhieraŭ de malproksime kelkajn fojojn. Ĝi estis sana kaj freŝa..."

"Kaj tamen la infano malsanas," aldonis malĝoje la arbaristo.

Evelino ekĝemis dolore:

"Ah, Dio, Dio — do mia antaŭsento tamen ne trompis min... Kiam proksimume antaŭ duonhoron mi ekvidis de la tri krucoj sur la senarba deklivo kaleŝon alveturantan de l' urbo al la ĉasdomo, mi ekpensis tuj, ke en tiel malfrua tempo nokta ĝi povas esti sole kaleŝo de l' kuracisto. Kaj kiam mi rememorigis min, ke Václav dum tri tagoj ne forlasis la ĉasdomon, ekregis min terura antaŭsento, ke estas li, kiu malsanas. Kaj kiel jam hieraŭ en la nokto, mi ŝteleniris ankaŭ hodiaŭ — antaŭ momento kun la morta timemo, ke iu hundo perfidos min per la bojado aŭ alimaniere, en la korton ĝis la fenestro por tute konvinkiĝi, se estos eble. Sed kiam el nenio, kion mi povis sekrete vidi tra la fenestro, mi povis konvinkiĝi pri la vero, mi kuraĝis fine —"

Evelino falis sur la genuojn kaj kunmetinte la manojn rigardis kun la mieno de plej kortuŝanta muta peto la okulojn de l' arbaristo, kiuj subite ekbrilis de la kolero.

Ekkoleriĝinta Podhradský por momento estis en embarasoj.

La muta peto de l' ĉarma pentofarantino, kiel ŝajnis, tamen senarmigis lin.

La mieno de l' pasiemo, kiun vidigis lia brune ruĝiĝinta vizaĝo, jam jam transiĝis en la mienon de l' eldevigita kompato.

Senvole li cedis rapide, sed tuj poste, ŝajne senkaŭze, denove ekflamis lia kolero.

Li elpaŝis rapide kaj haltinte senpere apud Evelino, levis la dekstran manon por bati...

"Batu! Batu!" ekĝemis Evelino kun la senmezura sindoneco.

La pasiiĝinta arbaristo, kvazaŭ embarasite denove cedis, kaj lia levita mano falis.

"Batu — piedbatu min!" singultis Evelino en la plej forta animdoloro. "Faligu min kiel hundon kaj mallongigu tiamaniere miajn terurajn animturlamentojn. Sed antaŭe diru al mi, kie estas mia edzo?..."

"Plenumiĝu cia peto!" respondis subite la arbaristo, preskaŭ kun la malvarma kategorieco. Kaj post la momento akre kaj severe li ordonis:

"Leviĝu!"

Poste li trairis laŭlarĝe la ĉambron, kaj iom pli trankvile komencis la parolon, dirante:

"Se ci estus alveninta, Evelino, antaŭhieraŭ aŭ hieraŭ aŭ almenaŭ hodiaŭ antaŭvespere, eble — pro la infano — mi estus pardoninta cin... Sed nun — nun la infano ne bezonas plu la patrinon..."

"Oh!" ŝi ekĝemis malespere.

"Sed mi ne volas esti pli kruela, ol estis ci mem kontraŭ mia filo kaj la propra infano!" daŭrigis la arbaristo. "Mi ne volas juĝi cin sen la esploro. Mi volas doni al ci okazon, por senkulpigi cin."

Evelino, penante esti pli trankvila, diris mallaŭte, duone por si:

"Evelino mensogis neniam..."

"Estas vere!" respondis la arbaristo, kiu tamen ekaŭdis la vortojn. "Ĝis nun oni ne kaptis ŝin mensoganta. Sed tiun ĉi fojon la sincera konfeso estos tamen malfacila al ŝi... Parolu!"

Evelino pene ŝanceliris al la seĝo kaj falinte sur ĝin, kovris la vizaĝon per la ambaŭ manoj.

"Aŭdu, Evelino," ekparolis li post kelke da sekundoj pli paciĝeme. "Ĉiu, kiu nun vidus cin tiel dispremita, apenaŭ rezistus kompaton. Sed mi estas kaj restos koncerne cin la severa kaj justa juĝanto."

"Mi ne scias — mankas al mi la vortoj...", komencis Evelino reveme. "Sed se mi devas la ĉefan kaŭzon de mia foriro almenaŭ montri, do mi ne trovas alian vorton, ol — dankemon..."

"Dankemon?" rediris surprizite la arbaristo. "Jes, patro — dankemon, aŭ se vi volas, subitan ekflamon de l' stranga, nekomprenebla, neesplorebla kaj samtempe nerezistebla sento, kiu ekregis mian tutan estaĵon kaj kiu ne estis malsimila al la sento de l' dankemo..."

"Ci parolas enigmojn!" intermetis la arbaristo, ne povante rezisti ian malklaran impreson.

"Dankemon, senfinan dankemon al la homo, al kiu mi ŝuldas mian spiritan regeneracion," daŭrigis Evelino; "al la homo, kiun mi antaŭe amis pasie kaj kies memoro estos ĉiam sankta al mi; al la homo kun la sendifekta karaktero, malofta talento kaj profunda sento, kiu faris el mi tion, kio mi ĵus estas: virinon kun la senantaŭjuĝa aŭtopsio pri la mondo, virinon, kiun vi, patro, antaŭe amis tiel arde."

"Ĉesu!" intermetis la arbaristo severe. "Ĉu ci volas fari laŭdindan virton el la plej peka faro, kiun oni povas pensi pri la edzino kaj patrino?"

"Ne, patro! Sed diru mem — ĉu vi trovis ĉe mi dum tiu tuta tempo, dum kiu mi vivis kun vi sub unu tegmento, almenaŭ unu solan eraron, pro kiu vi povus min almenaŭ nur patre admoni?"

Ĉu mi ne estis sincera kaj varme amanta edzino de via filo?

Ĉu mi ne estis afabla kaj bona patrino de mia infano?

Ĉu mi ne estis, patro, tiu bofilino, al kiu antaŭe vi mem konfesis multajn fojojn, ke ŝi kreis paradizon el via malgaja solejo kaj malĝoja hejmo?"

"Estas vere; mi ne povas kontraŭstari ciajn vortojn!" jesis la arbaristo iom surprizite. "Sed tamen ci perfidis senhonte edzon kaj cian infanon."

"Ne, patro! Mi ne perfidis ilin! Via filo sciis pri la senmezura ofero, kiun mi faris pro dankemo..."

"Ne, ne, tio ne estas ebla!"

"Kaj tamen estas tiel!" daŭrigis Evelino. "Via filo ne estis kaj ne estas viro antaŭjuĝa. Nia reciproka interrilato estis tiel pura, tiel natura, ke inter ni ne estis eĉ la ombro de l' mensogo kaj malsincereco. Kaj kiel mi konis vian filon kaj lian pasintaĵon, tiel ankaŭ li konis la mian kaj min mem ĝis la plej sekretaj anguloj de l' animo.

Kaj pro tio li sole povas kaj scias taksu senantaŭjuĝe la faron, kiu laŭ la juĝo de l' mondo estas nepardonebla peko; sed laŭ lia propra juĝo ĝi ne estas kaj ne povas esti io alia, ol la tute natura kaj pro tio la necesa sekvo de mia estaĵo kaj ĝia pasintaĵo — aŭ, se li tamen malgraŭ tio volus juĝi laŭ la ekzemplo de l' mondo, sole la negrava eraro."

"Kredu," rimarkigis malice la arbaristo, kiam Evelino eksilentis por momento, "ke la pli bonan senkulpigon de l' peko eĉ la diablo ne sciis elpensi!"

"Kaj tamen, patro, ĉio estas tiel simpla kaj natura!" daŭrigis Evelino. "Certe vi memoras ja ankoraŭ, ke mi rakontis ankaŭ al vi sentrompe vere kaj sincere mian pasintaĵon. Mi estis, kiel vi scias, filino de tiel nomata pli altranga familio oficista, ricevinta la kutiman tradician edukon. En la dekseka jaro estis al mi la tasko de l' homo kaj sekve ankaŭ tiu de l' edzino kaj patrino la plej sekreta mistero — ĝis subite, tute okaze, mi renkontis junan homon... Kaj en mia animo komencis tagiĝi..."

"Mi scias, mi scias!" jesis la arbaristo.

"Vi scias, patro, ke unuavide li ŝajnis studento kiel cent aliaj, sed lia karaktero estis tiel neriproĉinda, lia koro tiel pura kaj lia spirito tiel milde pripensema — unuvorte, li estis viro, kiun mi amis kun la tuta ardo de mia animo kaj kiu ripetis ankaŭ mian amon..."

Kaj ĉion ĉi sciis kaj scias, patro, ankaŭ via filo.

Kiam mi konatiĝis kun li, mi konfesis al li tute sincere mian pasintaĵon. Mi diris al li ankaŭ, ke nin disigis la situacio sociala.

Kaj kiam poste via filo, kiun mi arde ekamis, proponis al mi la manon, mi ne kaŝis antaŭ li la eblan krizon: nome, se la objekto de mia unua amo, kvankam post la jaroj, aperus denove antaŭ mi, ke sendube malfacile mi rezistus la ekflamon de la plej forta, plej varma sento, aŭ la ekflamon de l' peka pasio —"

"Kaj kiam fine tio okazis," intermetis denove pli riproĉe kaj pasie la arbaristo, "ci neniigis ciajn sanktajn devojn de l' edzino kaj patrino kaj forkuris kun la amataĉo! En la brakoj de l' amato ci plenmezure trinkis la pokalon da peka volupto —"

"Ne, patro, ne!" kontraŭstaris Evelino. "Mi ne disiĝis kun via solejo kaj kun vi ĉiuj sensente, sed post la kruela, senmezura batalo inter du devoj: inter la simpla devo de l' edzino kaj patrino kaj la mistere nerezistebla devo ne fariĝi maldanka al la viro iam tiel freneze amata kaj nun tiel senmezure malfeliĉa..."

"En la pasinta aŭtuno, dum la lastaj ĉasoj," konfesis plie sincere Evelino, "li estis inter la invititoj. Unuan fojon kaj denove okaze mi renkontis lin sola apud tri krucoj sur la senarba deklivo kaj mi konfesas, ke tiu ĉi unua renkonto naskis en mi multe pli malfortan eksciton de l' sento, ol mi timis.

Sed post la interŝanĝo de kelkaj vortoj ekregis min febra maltrankvilo. En mia iama amato mi rekonis viron ŝajne tute sanan korpe, sed malsanan anime.

La iam plej malcedema, plej batalema spirito, kiu ne timis provojn, solvi problemojn plej enigmajn, vidigis turmentan, senfortigan premitecon kaj bedaŭrindan lacecon.

Anstataŭ homo, iam sopiranta la lumon plej brilan, la veron plej senantaŭjuĝan, staris antaŭ mi homo vundita en la interno de l' animo, homo, kies tuta estaĵo estis rompita, unu el tiuj bedaŭrindaj, en la konvulsioj de l' prudento kaj sento, dolore kurbiĝantaj animoj, kiuj en la labirinto de l' enigmoj trovas nenian elirejon, kiuj trovas savon en nenio, ol en la eterna trankvilo, kiun donas al ili sole — la tombo...

Kaj kiam mi rememorigis min, kiel malofta kaj promesplena talento de tiu bedaŭrinda viro estis jam preskaŭ tute neniigita de la malfavoro de l' cirkonstancoj; kiam mi rememorigis min, kion mi ŝuldas al tiu homo kaj kiam mi ekkonis, ke li ankoraŭ nun amas min kiel min amis antaŭe, tiam elsaltis el la ĥaoso de l' sentoj, kiuj ekregis min, la sento de l' senmezura kompato...

Kaj pli frue, ol mi atendis, trakuris mian animon la nerezistebla penso: ke estas mia devo, provi, se estos eble, la animan resanigon de l' homo, tiel talenta kaj samtempe tiel bedaŭrinda...

Tiel kaj neniel alie, patro," finis Evelino sian konfeson, "okazis —"

"Ke ci forkuris el la hejmo," intermetis moke la arbaristo, "kaj provis... Kaj cia provo," li aldonis en la tono pli moka, "sendube sukcesis — ĉu ne vere?"

Evelino turnis malĝoje la kapon.

"Kaj ĉu ci volas per ĉi tiu nekredebla fablo sankcii cian teruran kulpon kiel la plej puran virton?" daŭrigis la arbaristo, kiu la lastajn vortojn aŭskultis ŝajne trankvile kun la krucitaj manoj.

"Vi agas maljuste kontraŭ mi, patro, se vi konjektas, ke mi volas kiel ajn senkulpigi mian faron," senkulpigis sin Evelino per la tono kaj la motivoj ĉiam pli konvinkaj. "Mi scias kaj konfesas, ke en la nerezistebla atako de l' sento de l' dankemo kaj la unua amo subite denove ekflaminta mi pekis kontraŭ miaj devoj de l' edzino kaj patrino.

Sed krom la devoj, kiuj devenas de la firmaj rilatoj socialaj, ni virinoj havas ankoraŭ naturajn devojn de l' spirito kaj la koro, kiujn rezisti estas tiel malfacile ofte ankaŭ neeble, kiel batali kontraŭ la neŝanĝeblaj leĝoj de l' naturo.

Estas vere — ke ekzistas ankaŭ virinoj, kiuj rezistis en la plej delogaj situacioj, kion unuj nomas virto, la aliaj heroeco. Sed ili ne estas pravaj.

La devoj de l' spirito kaj la koro estis ĉe la edzinoj kaj patrinoj, kiuj sukcesis tion fari, jam de longe dispremitaj de la devoj konvenciacaj¹⁶. Ilia iama amo estis jam longe estingiĝinta, aŭ ĝian lokon estis okupinta — la malamo. Tiuj do povas facile rezisti...

Sed ĉe mi, patro, estis tute male. Mi amis la viron de mia unua amo kaj ankaŭ estante edzino de via filo amas lin kun la tuta ardo de mia koro —"

"Kaj pro tio ci oferis," intermetis moke la arbaristo, "la leĝan edzon kaj cian propran infanon, por ke ci povu trankviligi cian voluptemon —?"

"Ah, patro, patro — ne ŝiru mian dispremitan koron per la moka ironio de sententeco!" petegis Evelino ĉiam pli pasie. "La senmezura doloro, kiu mordas mian koron kaj ne ĉesos ĝin mordi ĝis la fino de la vivo, estas pli ol la plej kruela puno pro tio, ke mi ne rezistis la plej fortan kaj la plej nerezisteblan devon, kiu ordonis al mi, ke mi oferu min... Mi faris tiun oferon esperante, ke mi savos tiun viron de la pereco, kaj dume —"

"Kiam la amataĉo forpuŝis kaj forĵetis cin," intermetis la arbaristo kun la mallaŭtigata moka rido, "ci alvenas, por denove ruze enŝteliĝi en la koron de l' trompita, perfidita edzo —"

"Ne, ne, patro!" defendis sin Evelino ĉiom pli pasie kaj tamen kun la kortuŝanta konvinko. "Mi alvenas, por fari sinceran konfeson al mia edzo, por peti sur la genuoj pardonon de mia granda peko kaj ankaŭ permeson, ke mi povu denove fariĝi patrino de lia kaj mia ido... Kaj kredu, patro, se anstataŭ vi aŭskultus min via filo Václav —"

"Václav ne povas cin pardoni!" respondis serioze la arbaristo kaj kun la dolora ekscito li aldonis: "Václav estas — mortinta!"

"Mortinta?" ripetis Evelino apatie, kvazaŭ ŝi ne komprenus la sencon de l' vorto.

"Kaj ĉu ci eĉ ne ektremos?" ekparolis Podhradský severe.

"Mia Václav — vi diras, patro — mia Václav, estas — mortinta?" demandis Evelino ne kredante kaj tamen kvazaŭ ŝi estus jam almenaŭ duone kompreninta.

"En la tombejo de Doubrava¹⁷ ci trovos lian tombon..." eksonis la respondo en la tono eliranta kvazaŭ el la tombo.

"Oh," ekĝemis Evelino malespere kaj leviĝinte ŝi rigardis ĉirkaŭe, kvazaŭ antaŭsentante teruran katastrofon.

"Pro la kompato de Dio — patro!" ŝi ekriis en la plej forta atako de l' doloro, starante rektiĝinte kaj senmove kvazaŭ rigida.

"Jes, ĉi tie per la kuglo de tiu ĉi revolvero li traboris al si la kapon," finis la arbaristo per la simplaj vortoj la priskribon de l' terura katastrofo. "Kaj lia sango ĝis nun ne estas forigita de la tablo... Rigardu!"

"Li estas mortinta!" ekriis Evelino per la voĉo tiel sovaĝa, ke ankaŭ la arbaristo eksentis froston.

Ŝia vizaĝo vidigis senmezuran malesperon. Ŝi falis kvazaŭ senfortigita sur la seĝon, sed post la momento ŝi denove leviĝis kaj kun la forta, sed dolora pasiemo demandis:

"Kaj la infano? Kie estas mia infano?"

La arbaristo ŝanceliĝis ankoraŭ momenton rekte respondi, sed kiam la mieno de Evelino vidigis la doloron plej grandan, li montris per la mano la malantaŭon kaj surde aldonis:

"Ĝi mortas."

Kun terura ekkrio ŝi leviĝis kiel morte vundita leonino kaj volis kuri en la malantaŭon.

"Halt! Nek unu paŝon!" tondre ekkriis brutale la arbaristo, barinte al ŝi la vojon.

"Kompaton! Kompaton!" ŝi petegis kun la plenda malespero etendante la manojn.
"Pro ĉio, kio estis al vi, patro, iam plej kara...", ŝi balbutis kaj volis denove kuri en la malantaŭon.

Sed la arbaristo brutale forpuŝis ŝin kaj preninte la revolveron de la tablo apud la fenestro direktis ĝin al Evelino.

"Nek unu paŝon," li tondre ekriis kun la plej maldelikata brutaleco, "se ci ne volas, ke ankaŭ mi faru mortigon..."

En muta malespero ŝi ŝanceliris returne. "Por ci la infano estas — mortinta!" li aldonis surde malleviste la manon kun la revolvero.

En tiu momento en la koridoro eksonis bruo de personoj, malsuprenirantaj la ŝtuparon kaj mallaŭtigataj voĉoj.

Post la pordo eksonis la voĉo de Kiĉjo:

"Ĉi tien, sinjoro doktoro — mi petas... ĉi tien — dekstren!"

"Ah, la doktoro revenas!" ekparolis la arbaristo kaj rapide turnis sin al Evelino.

"Alvenas fremda homo," li diris kun la akcento sur la vorto »fremda« kaj kun la patosa imperativo aldonis:

"Kaj tial — silentu!... Ĉu ci komprenas?"

Podhradský volis iri renkonte al la revenanta doktoro, sed apenaŭ li faris unu paŝon, malfermiĝis la pordo kaj Kiĉjo, enlasinte la doktoron, portantan sian mankonfreton, en la ĉambron, senparole fermis denove la pordon.

Nur nun ekiris ankaŭ Podhradský.

La kuracisto, ne rigardinte ĉirkaŭe, metis la kofreton sur la lokon, kie ĝi antaŭe staris kaj tuj raportis:

"La vundo de l' sinjoro adjunkto ne estas danĝera. Sole malgranda deĝrato de la haŭto, sed tamen sufiĉe dolora..."

Sed kiam fine li ekrigardis la arbariston, li ne povis nerimarki lian nenormalan staton.

"Kio estas, sinjoro arbaristo?" li demandis kun modera nuanco de l' zorgemo ekrigardinte al la malantaŭo.

"Ĉu nia malgranda paciento —?"

Kaj kiam li faris unu paŝon al la malantaŭo, li ekvidis la virinon post la arbaristo.

"Pardonu, sinjoro arbaristo!" li diris senkulpigante sin. "Ni ne estas solaj... Vi havas ja viziton..."

"Jes, viziton —," ripetis la arbaristo kvazaŭ en embarasoj.

En tiu momento Evelino mallevis la manojn, per kiuj ŝi estis kovrinta la vizaĝon.

"Milena!"¹⁸ ekkriis mallaŭtigite la kuracisto kaj rapide aliris al ŝi.

"Ĉu vi konas Evelinon?" demandis mirigite la arbaristo.

"Evelinon? Ne!" respondis la doktoro. "Ŝi estas Milena de mia filo..."

"De via filo?" ripetis la arbaristo estante treege surprizita kaj ne povante ekregi sin li turnis sin kun pasia severeco al Evelino:

"Malfeliĉulino! Ĉu ci kaŭzis ankaŭ la morton de filo de la doktoro? Parolu!"

Evelino, leviĝinte kun la streĉo de ĉiuj siaj fortoj, per la malklara kaj tamen tremanta voĉo respondis unue al la doktoro:

"Mia nomo ne estas Milena, sinjoro doktoro, sed Evelino... Sole via filo min nomis Milena..."

"Jes, jes!" konsentis la doktoro.

"Kaj mi," aldonis Evelino kun la malkuraĝa senespero, "ne kaŭzis — la morton de via filo —"

"Mi scias, mi scias —" diris la doktoro. "Kaj — mi scias ankaŭ, kion vi faris por li... Kaj pro tio," li aldonis kun la kortuŝanta dankemo, "akceptu por la senekzempla ofero, kiun vi faris por li en la lastaj tagoj de lia vivo, almenaŭ nun, kiam ni neatendite renkontas unu la alian, mian plej sinceran dankon!..."

Poste li premis ŝian manon.

Podhradský kolere rigardis tiun neantaŭviditan scenon. Kiam la doktoro finis la parolon kaj premis la manon de Evelino, la arbaristo ekregante sin cedis unu paŝon.

La kuracisto turnis sin al li.

"La severa moŝto — la morto — sinjoro arbaristo," li diris kun la akcento de l' kortuŝanta peto, "pacigas ankaŭ la malamikojn nepacigeblajn. Kaj tial mi esperas, ke ankaŭ vi, en tiu ĉi fatala momento jam pro la infano —"

"Neniam!" tondre ekkriis obstine la arbaristo ne atendinte, ĝis la kuracisto finis la parolon. "La infano estas kaj restos por ŝi mortinta..."

Evelino ekĝemis malespere kaj dispremite falis denove sur la seĝon.

En tiu ĉi momento la infano sur la lito en la malantaŭo konvulsie ektusis.

"Ah, la paciento!" rememorigis sin la kuracisto pri sia devo kaj rapidis en la malantaŭon.

Samtempe leviĝis ankaŭ Evelino kaj elpaŝis post la kuracisto.

"Halt! Nek unu paŝon!" tondre ekkriis la arbaristo kaj en la atako de plej forta kolero per la pugno faligis ŝin teren.

Evelino falis, kaj la arbaristo rapidis en la malantaŭon, kie la doktoro starante apud la infanlito rigardis explore la infanon.

"Ĉu eble mi povus, sinjoro doktoro?" demandis la arbaristo kun la servemo de frenezulo:

"Ne, ne!" respondis la kuracisto kun la imperativa kategorieco. "Tio ne estas por laikoj! Vi faros pli bone," li aldonis mallaŭtigite, "se vi kunigos la pordokurtenojn, por ke la patrino ne vidu la lastan teruran batalon..."

"La teruran batalon?... Do tamen la lastan batalon!" trakuris la animon de l' arbaristo, kiam li mekanike plenumis la ordonon de l' kuracisto.

Poste li staris momenton kvazaŭ subite dispremita post la kunigitaj pordokurtenoj, poste li rapide sin turnis kaj ŝanceliĝe trairinte la ĉambron laŭlarĝe li haltis antaŭ Evelino, kiu dume leviĝis de la tero kaj senatente rigardis, kio okazas antaŭ ŝi.

Dum kelke da minutoj neniuj ekparolis.

La turmenta silento estis interrompata sole de plenda bruo de l' ventego el ekstere, kie la uragano jam videble laciĝis, kaj de sufoke konvulsia tusado de l' infano el la malantaŭo post la pordokurtenoj.

Evelino, starante en la muta malespero antaŭ la arbaristo, havis atenton por nenio ĉirkaŭ si.

Subite ŝi denove rekonsciiĝis.

Kunmetinte la manojn ŝi ekĝemis:

"Pro la kompatato de Dio, patro, lasu min iri al la infano!"

"Neniam!" respondis la arbaristo surde, sed kun la kategoria severeeco.

"Kompaton — kompaton!" balbutis malespere Evelino post mallonga paŭzo.

En tiu momento la doktoro disigis la pordokurtenojn kaj eliris.

Podhradský alproksimiĝis rapide kaj kun la timema avideco demandis:

"La infano?!"

"La lasta medikamento efikis!" raportis mallaŭtigite la kuracisto. "La forta, intence kaŭzita atako de konvulsia tuso liberigis la traŭmon de la sufokanta muko kaj la spiro estas libera... La infano pasigis feliĉe la krizon kaj nun estas la espero —."

"Vi do opinias, sinjoro doktoro —?" demandis la arbaristo nekredante ankoraŭ.

"Ke mi esperas la resaniĝon!" intermetis la kuracisto. "Mia tasko estas finita; sed nun, sinjoro arbaristo, la plua zorgo pri la infano apartenu al la patrino..."

"Al la patrino?" rediris surde la arbaristo konsiderante, sed tuj poste li aldonis kategorie:

"Ne, ne — neniam!"

"Ĝi ne estas mortinta! Ĝi resaniĝas!" ekĝojegis Evelino en la subita ĝojiĝo.

"Mami — mami!" ekkriis sible la infano en la lito kvazaŭ ĝi estus rekoninta la voĉon de l' patrino kaj post la momento, kiam neniuj respondis, ĝi vokis plue:

"Avĉjo! Mi aŭdis mami..."

"Ĉu vi aŭdas? La infano vokas la patrino!" turnis sin la kuracisto al la arbaristo.

"Kie estas mia mami?" vokis denove la infano en la lito. "Avĉjo, avĉjo! Venigu al mi mami!"

Evelino, kiu momenton staris rektiĝinte kaj senmove, kvazaŭ ŝi ne komprenus, kio okazas, falis denove sur la genuojn kaj kunmetinte la manojn por ia muta peto fiksas la rigardon nebuligitan de la larmoj sur la arbariston.

Sed ankaŭ nun la arbaristo restis nedecidigebla.

La kuracisto provis ankoraŭ unufoje rompi lian obstinon. "Pardonu," li diris, "almenaŭ pro la memoro de l' malfeliĉa viro, kiu certe mem pardonus en tiel kriza momento — pardonu pro la memoro de via filo!..."

"De mia filo?" ripetis la arbaristo subite per la kortuŝanta mola voĉo kaj post la momenta animbatalo kovrinte al si la vizaĝon per la mano, li aldonis kun la eldevigita paciĝemo:

"Mi pardonas!"

Evelino salte leviĝis kaj kun la ĝojega ekkrio kuris en la malantaŭon... Apud la infanlito ŝi falis, sed tuj denove leviĝis kaj kun la mieno de senmezura feliĉo kliniĝis super la lito...

La doktoro, kiu kun la kompata intereso rigardis tiun scenon, turnis sin al la arbaristo:

"Tian neantaŭviditan ŝanĝon, kredu, mi mem ne atendis... Sed la perfekta feliĉo, kiun alportis iam al vi tiu ĉi virino, revenos neniam plu al vi en la ĉasdomon..."

"Jes, ĝi ne revenos!" rimarkigis maldolĉe la arbaristo, mallevinte la manon de l' vizaĝo...

"Sed kredu," aldonis la doktoro, "ke tiu ĉi pentofaranta Magdaleno fariĝos tia patrino al la infano, kia ŝi antaŭe laŭ sia karaktero neniam fariĝus sen la terura kulpo, je kiu ŝi pentofaras —"

Piednotoj

*[En la libro mem, la piednotoj troviĝas plejparte ĉe la piedoj de la koncernaj paĝoj.
Por ne interrompi la fluon de la rakonto en tiu ĉi unupaĝa versio preparita por
Projekto Gutenberg,
la piednotoj estas kolektitaj ĉi tie, ĉe la fino de la unu (longa!) paĝo.]*

¹Kvartalo de Praha.

²Germane Partitur, angle partition, france partiton, itale spartito.

³Parko de Wien.

⁴Montetoj apud Praha. (Rimarko de l' tradukinto).

⁵En slavaj landoj la monaĥinoj estas nomataj »fratinoj«. (Rim. de trad.)

⁶Šumava (legu Ŝumava) = montaro en suda Bohemujo.

⁷"Mami" aŭ "mama" nomas la slavaj infanoj la patrinon. (Rim. de l' trad.)

⁸Bohema proverbo. (Rim. de l' trad.)

⁹Diminutivo de "Kiliano". (Rim. de l' trad.)

¹⁰Ĉe kelkaj gentoj slavaj la mastro estas nomata "sinjoro patro". (Rim. de l' trad.)

¹¹Diminutivo de Emanuelo. (Rim. de l' trad.)

¹²Legu Podhracki, kun la akcento sur la unua silabo. (Rim. de l' trad.)

¹³Milena estas slava nomo (Rim. de l' trad.)

¹⁴Volšany (legu Volŝani) = antaŭurbo de Praha. (Rim. de l' trad.)

¹⁵Václav estas slava nomo; legu Vaclav, kun la akcento sur la unua silabo. (Rim. de l' trad.)

¹⁶Konvenienco = slušnost, Konvenienz, convénience, convenance, convenienza.

¹⁷Nomo de proksima vilaĝo. (Rim. de l' trad.)

¹⁸Milena estas slava baptномо virina. (Rim. de l' trad.)

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK RAKONTOJ ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE